



### **Przemysław Paweł Grzybowski**

–Doktoro pri pedagogio, instruisto en Universitato de Kazimierz Wielki en Bydgoszcz (Pollando). Li interesiĝas pri interkultura kaj kompara pedagogioj.

Kunordiganto de diskutlisto „Międzyszkolnik” de Forumo de Junaj Pedagogoj ĉe Komitato de Pedagogiaj Sciencoj de Pola Akademio de Sciencoj.

Prizorganto de Akademia Centro de Volontuloj ĉe Universitato de Kazimierz Wielki; volontulo en internacia movado de doktoroj – klaŭnoj de Patch Adams.

Elektitaj publikaĵoj de li: *Eŭropa edukado – de multukulturreco al interkultureco. (Edukacja europejska – od wielokulturowości ku międzykulturowości)* Oficyna Wydawnicza Impuls, Kraków 2008; *Interkultura edukado – gvidlibro. Nocioj, literaturo, adresoj. (Edukacja międzykulturowa – przewodnik. Pojęcia, literatura, adresy)* Oficyna Wydawnicza Impuls, Kraków 2008; *Interkultura edukado – kontekstoj. De idento al internacia lingvo. (Edukacja międzykulturowa – konteksty. Od tożsamości po język międzynarodowy)* Oficyna Wydawnicza Impuls, Kraków 2011; *Renkontoj kun Diferenculoj. Legaĵoj por interkultura edukado. (Spotkania z Innymi. Czytanki do edukacji międzykulturowej)* Oficyna Wydawnicza Impuls, Kraków 2011.

Kiel instruisto de Esperanto kaj preleganto li patroprenis plurajn internaciajn iniciatojn pri edukado – i.a. en Brazilo, Ĉinio, Francio, Peruo, Pollando, Rumanio kaj Vjetnamio.

Przemysław Paweł Grzybowski

Ankaŭ vi estas Fremdulo!

Przemysław Paweł Grzybowski

# **Ankaŭ vi estas Fremdulo!**

Malgranda traktato  
pri interkultura edukado  
kaj pri Esperanto kiel ilo de ĝi



***Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo***

***Bydgoszcz 2011***

Przemysław Paweł Grzybowski

# Ankaŭ vi estas Fremdulo!

Malgranda traktato

pri interkultura edukado

kaj pri Esperanto kiel ilo de ĝi



**Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo**  
Bydgoszcz 2011

Recenzis:

Prof. Renato Corsetti - Sapienza, Università di Roma, Italio

Red. Roman Dobrzyński, Warszawa, Pollando

*Ĉiuj rajtoj rezervitaj © Przemysław Paweł Grzybowski 2011*

*escepte de la Suplementoj, kiujn redaktis pluraj aŭtoroj kaj ĉiu rajtas  
utiligi ilin por edukado, kulturo kaj turismo indikante la fonton*

ISBN: 978-83-62323-17-3

Presita de:

Zakład Poligraficzny „Skonpres”  
86-005 Kruszyn Krajeński

## Enhavtabelo

<b>Antaŭparolo de la eldonisto</b> .....	3
<b>Enkonduko de la aŭtoro</b> .....	6

### UNUA PARTO

<b>1. Nocioj</b> .....	8
1.1. Kultura diverseco .....	20
1.1.1. Multkultureco .....	25
1.1.2. Interkultureco .....	31
1.1.3. Limoj kaj apudlimoj .....	39
1.2. Edukado en kondiĉoj de kultura diverseco .....	48
1.2.1. Multkultura edukado .....	51
1.2.2. Interkultura edukado .....	59
1.2.3. Regiona edukado .....	72
1.2.4. Civita edukado .....	78
<b>2. Interkultura pedagogio - de eduka praktiko al pedagogia subdisciplino</b> .....	83
<b>3. Universala lingvo kiel ilo de interkultura edukado</b> .....	92
3.1. Lingva bazo de dialogo .....	92
3.2. Esperanto-movado kaj Esperanto-kulturo .....	98
3.3. Esperanto kaj interkultura edukado .....	109
<b>Bibliografio (cititaj verkoj)</b> .....	114

### DUA PARTO

<b>Interretaj adresoj</b> .....	123
<b>Verkoj pri kultura diverseco</b> .....	126
• Metodologio de esploroj pri kultura diverseco .....	126
• Kultura diverseco, multkultureco, interkultureco - nocioj kaj teoriaj bazoj .....	126

- Komunikado kaj interkultura kompetenteco - problemoj, teknikoj, didaktiko ..... 134
- Multkultura edukado kaj interkultura edukado - fundamentoj kaj praktiko ..... 138
- Multkultureco kaj interkultureco en lernejoj ..... 150
- Kultura diverseco kaj instruistoj-klerigado kaj sociaj problemoj 156
- Diferenculoj kaj Fremduloj - idento, konfliktoj, edukado ..... 158
- Fremdaj lingvoj, dulingveco kaj plurlingveco - sociaj problemoj kaj didaktiko ..... 161
- Etnismo - sociaj problemoj, edukado de minoritatoj ..... 166
- Kultura diverseco kaj infanoj - migrado, rifuĝado, edukado ..... 170
- Migrado kaj migrantoj - institucioj kaj edukado ..... 172
- Sintenoj kaj antaŭjuĝoj - rasismo kaj ksenofobio ..... 175
- Kultura diverseco kaj civitaneco-sociaj problemoj kaj edukado . 178
- Kultura kaj psikologio - problemoj kaj esploroj ..... 179
- Ekonomio kaj profesia agado en kultura diverseco ..... 181
- Religioj kaj eklezioj - konfliktoj, dialogo, edukado ..... 183
- Kultura diverseco kaj amaskomunikiloj-Interreto, televido, filmo 184
- Arto, teatro, folkloro, muziko kaj danco ..... 185
- Enciklopedioj, leksikonoj kaj vortaroj ..... 186
- Maloftaj kunteksto de kultura diverseco en literaturo ..... 186

### SUPLEMENTO - **Materialoj de Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz**

- Programo pri instruado de turismo en Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz ..... 189
- Programo pri instruado de kulturo kaj pola lingvo en Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz ..... 220
- Programoj de Esperanto-instruado en Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz ..... 222
- Niveletoj de lingva lerteco laŭ klasifiko de Eŭropa Unio ..... 240

## Antaŭparolo de la eldonisto

*Ankaŭ vi estas Fremdulo!* estas verketo, kiu prezentas teoriajn fundamentojn kaj historion de interkultura edukado. Krom scienceca analizo de ĉefaj nocioj kaj sociaj problemoj ligitaj kun kultura diverseco, ĝi enhavas riĉan gvidilon pri literaturo kaj interretaj paĝoj ligitaj kun ideoj de interkulturo, tolero, civitaneco kaj edukado en plurkulturaj kaj pluretnaj medioj. La internacia lingvo Esperanto estas prezentita tie ĉi kiel praktika ilo de interhoma komunikado, firme ligita kun bazoj de edukado en kondiĉoj de kultura diverseco.

La libro certe interesos ne nur sciencistojn kaj instruistojn, sed ĉiujn legantojn konsciajn pri la gravega rolo de interkulturaj rilatoj en la nuntempa mondo.

Mi esperas, ke ĝi efike utilis kiel lernolibro de Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz.

*Andrzej Grzębowski*

## Enkonduko de la aŭtoro

Kultura diverseco de medio, en kiu oni naskiĝas kaj maturiĝas, ne nur influas disvolvadon de idento, sed ankaŭ estas gravega faktoro de estontaj elektoj en la vivo.

Mi naskiĝis en Lubsko - ĉarma urbeto proksime de landlima transirejo Gubin-Guben. Sur tiu ĉi unika apudlima teritorio, de jarcentoj kruciĝadis kulturoj germana, pola, luĵica, juda... kaj pro tio la loko estis konata ankaŭ kiel Sommerfeld kaj Zemsz.

Miaj Gepatroj - Krystyna Grzybowska kaj Eugeniusz Grzybowski venis de du malproksimaj regionoj: la Patrino el Bydgoszcz en Kujavio (centra Pollando), kaj la Patro el Sokoły en Podlahio (nordorienta Pollando). Ili renkontiĝis kaj kune lernis en Wrocław - hodiaŭ, pri sia historio, nomata la urbo de kvar kulturoj. Fininte lernejon ili ekloĝis en Lubsko. Kiel infanon, edukis min tie mirinda internacia paro: Herta Mikielinas (polino edukita en Germanio) kaj Romuald Mikielinas (litovo asimiliĝinta en Pollando). Niaj najbaroj estis elmigrintoj el iama Sovetio, kiuj ofte rakontadis pri vivo en sia iama patrujo.

Por kolekti necesan materialon, kiu permesis kompili tiun ĉi libreton, mi ricevis grandegan helpon de esperantistaj Geamikoj: Audrey Childs-Mee, Clovis Portes, Daniel Moirand kun Familio, Dominique Baron, Ghislaine Bayod kun Familio, Helga kaj John Rapley, Henri Boyet, Marie-Christine Pilon kun Familio, Marie Thérèse Lloancy kun Familio, Mayumi Deguchi, Mila van der Horst-Kolińska, Neus Moly kaj Ramon Perera, Pierre Babin kun Familio, Solange Goan kun Familio - kaj al neforgeseblaj skipoj de la Kulturodomo „Kastelo Grésillon“ kaj la Plouezekaj Renkontiĝoj en Francio kaj de institucioj direktataj de Andrzej Grzębowski en Bydgoszcz.

Profesoro Jerzy Nikitorowicz, kiu estis gvidanto de mia doktora disertacio, kies partoj estas citataj en tiu ĉi libreto, laboras kiel rektoro de Universitato en Białystok, en la plej kulture diversigita regiono de Pollando, kie kuntuŝiĝas kulturoj de poloj, rusoj, bjelorusoj, ukrainanoj, litovoj, lituanoj, rusoj,

judoj, tataroj... Li estis unu el la honoraj patronoj de la Universala Kongreso de Esperanto en 2009.

Kiel instruisto de la Lingvo Internacia, preleganto, ĵurnalisto kaj volontulo laboranta en hospitaloj, mi vizitis ĉirkaŭ dudek landojn, ĉiam havante okazon konatiĝi kun ties loĝantaro kaj kulturoj.

Post tiom da renkontoj kaj kunvivado kun diversaj Fremduloj, kaj post tiom da okazoj kiam mi mem estis natura Fremdulo diversloke, ne estas do surprize, ke pro mia historio, nun mi povas oferi al Vi la eseon pri teorio de interkultura edukado, kiu estas la temo de miaj profesiaj kaj privataj interesoj. La libreto kiun Vi tenas en la manoj estas scienceca laboraĵo, kiu prezentas ĉefajn nociojn ligitajn kun la temo en historia kunteksto, enhavas eseon pri Esperanto kiel ilo servanta por religi la pedagogian ideon. Enhavas ankaŭ listojn da retadreso de institucioj kaj libroj ligitaj kun interkultura edukado.

Mi dediĉas la verketon memore al ĉiuj Fremduloj, kiuj iĝis parto de mia vivo kaj donacas ĝin al simpatiantoj de interkulturaj idealoj esperante, ke ili akceptos ĝin bonvole.

*Przemysław Paweł Grzybowski*

Bydgoszcz, novembro 2011

## UNUA PARTO

\* \* \*

### 1. Nocioj

El inter distingoj kaj dividoj, kiuj permesas al homo situigi en la mondo, la plej grava estas distingo de individua kunteksto “Mi - Li”, kaj grupa kunteksto “Ni - Ili”.<sup>1</sup> Danke al tiuj ĉi distingoj, en socio oni kapablas konstrui grupan identon kaj konstati, kiu estas membro de grupo al kiu apartenas iu individuo (Ni), kaj kiu apartenas al aparta grupo (Ili) al kiu la individuo ne povas aŭ ne volas aparteni. Konflikto inter Ni kaj Ili permesas krei propran mapon de la mondo. Ĝi estas bazo de ordigado de dividita realo.<sup>2</sup>

Imagoj pri propra grupo, aliaj (fremdaj) grupoj kaj iliaj reciprokaj rilatoj, ligitaj kun ili sentoj de propreco kaj fremdeco, proksimeco kaj malproksimeco, estas bazaj elementoj de socia konscio kaj unuj el la plej gravaj aspektoj de homamasa vivo.

Imago pri propra grupo estas necesa por procezoj de kreado de propra loko en la mondo kaj de konstruado de idento, firmeco, solidareco kaj emocia stabileco de grupo. Komparo kun personoj apartenantaj al aliaj grupoj, helpas krei bildon de propra grupo. Ne eblas ja imagi ion, kio estas kutima, ĉiutaga kaj normala, ne kontraŭstarigante al ĝi ion, kio estas nekutima kaj escepta. Pri iu grupo eblas pensi kiel pri fremda nur tiam, kiam alian grupon oni opinias propra. Ju pli forte homo estas ligata al

---

<sup>1</sup> Tiu ĉi teksto, estas bazita sur doktoriga disertacio verkita en seminario de Prof. Jerzy Nikitorowicz en Universitato de Białystok (Pollando). Ĝiaj partoj estis utiligitaj en pollingvaj verkoj: P.P.Grzybowski: *Edukacja europejska - od wielokulturowości ku międzykulturowości*. Kraków 2008; P.P.Grzybowski: *Edukacja międzykulturowa - konteksty. Od tożsamości po język międzynarodowy*. Kraków 2011; P.P.Grzybowski: *Edukacja międzykulturowa - przewodnik. Pojęcia, literatura, adresy*. Kraków 2008.

<sup>2</sup> Z.Bauman: *Socjologia*, Poznań 1996, p.44 kaj sekvaj.



propra grupo, des pli forte sentas fremdecon de aliaj samniveleaj grupoj. Ju pli alta estas la sento de propreco, des pli alta estas sento de fremdeco de aliaj grupoj - kaj kiel des pli fremdaj estas perceptataj membroj de ili.

Signoj de propreco kaj fremdeco havas karakteron emocian (sentaj inklinoj al fremduloj; propraj sentoj kaj sentoj atribuataj al fremda grupo; konvinkoj kaj imagoj pri fremda grupo) kaj intelektan (reale posedata scio pri fremda grupo; volo akiri tiun scion).<sup>1</sup> Reciprokajn dependojn inter mondo de Mi kaj mondoj de aliaj personoj, Tzvetan Todorov karakterizas jene: „*Oni povas malkovradi aliulojn en si mem, konsciante pri fakto, ke mi mem estas substanco ne nur homogena, sed ankaŭ firme fremda al ĉio, kio ne estas mi; ke mi estas aliulo. Tamen ankaŭ aliuloj estas mi; ili estas subjektoj similaj al mi, kiujn verdire apartigas kaj diferencigas de mi nur mia propra vidpunkto laŭ kiu ĉiuj estas for, kaj nur mi estas tie ĉi. Mi povas percepti aliulojn kiel abstraktaĵon, kiel iun elementon de psika konfiguracio propra al ĉiu individuo, kiel Diferenculon, kiel aliulon, ĉu kiel kunestulon - aŭ kiel iun specifan socian grupon, al kiu oni ne apartenas. Tiu ĉi grupo sekve povas esti parto de socio: virinoj kompare al viroj, riĉuloj kompare al malriĉuloj, frenezuloj kompare al «normaluloj». La grupo povas ankaŭ ekzisti ekster socio, do kreadi alian sociaĵon - pli aŭ malpli proksiman, depende de kazo. Aliuloj povas esti estuloj proksimaj al ni laŭ vidpunktoj kultura, morala kaj historia. Ili povas esti nekonatuloj, fremduloj kies lingvon kaj morojn ni ne komprenas; povas esti fremdaj tiel, ke finfine ni dubas, ĉu konsideri nian komunan apartenon al la sama genro.*”<sup>2</sup>

Ĉiun homon karakterizas almenaŭ unu aŭ pluraj ecoj, kiuj permesas percepti sin mem kaj aliajn personojn laŭ diferencoj

<sup>1</sup> E.Nowicka: *Badanie pogranicza. Kilka propozycji metodologicznych* [en:] A.Sadowski (org.): *Pogranicze. Studia społeczne*, Białystok 1999, vol.8, p.15; E.Tarkowska: *Niepewność kulturowa a stosunek do inności* [en:] M.Kempny kaj al. (org.): *U progu wielokulturowości. Nowe oblicza społeczeństwa polskiego*, Warszawa 1997, p.89.

<sup>2</sup> T.Todorov: *Podbój Ameryki. Problem innego*, Warszawa 1996, p.9.

(diversecoj). Senfinan nombron de kategorioj de difercaj personoj eblas distingi ekzemple surbaze de jenaj trajtoj:

- biologiaj (sekso; aĝo; koloro de haŭto, okuloj, haroj; fizika aŭ psika sano/malsano),
- sociaj (aparteno al nacia aŭ etna grupo kaj ligita kun ĝi statuso),
- kulturaj (posedo de idento - kultura, religia ktp. kaj ligita kun la idento elmontrita de aparteco),
- politikaj (prefero de iu vidpunkto, doktrino, ideologio),
- ekonomiaj (materia pozicio kaj ĝiaj konsekvencoj) ktp.<sup>1</sup>

Karakterizaj normoj kaj valoroj estas propraj al individuoj aŭ homamasoj, kiujn oni perceptas kiel kulturaj grupoj aŭ subkulturoj. Tiel, pri kultura diverseco oni povas paroli ne nur rilate al naciaj minoritatoj, sed ankaŭ rilate al subkulturoj: regionaj, profesiaj, aĝaj, ŝatantoj de iuj sistemoj de valoroj, stiloj de komunikado, moroj, kutimoj, tradicioj, rasoj, manieroj de edukado de infanoj, seksaj inklinoj, politikaj konvinkoj, preferataj manĝaĵoj ktp. Kulturajn diferencojn oni povas kaj devas serĉi ankaŭ en unuigado de landoj (ekz. unuigo de Eŭropo), kaj en globaligo de ĉiutaga vivo. Tiu ĉi kategoriigo estas ĉiam malfermita kaj ĉiukaze necesas ĝin precizigi.<sup>2</sup>

Socia regulado inter individuoj, kiuj opinias sin apartaj de membroj de aliaj grupoj kun kiuj ili regule interagadas, estas etnismo. Ĝi estas ankaŭ bazita sur aparteco de aliaj personoj socia idento, kiun karakterizas metafora, aŭ fikcia parenceco. Socia rilato enhavas etnisman elementon, kiam kulturaj

<sup>1</sup> Pli vaste: M.Augé: *Le sens des autres*, Paris 1994, pp.13–88; Z.Benedyktowicz: *Portrety “obcego”*, Kraków 2000, pp.15–80; M.Dąbrowski: *Swój/obcy/inny. Z problemów interferencji i komunikacji międzykulturowej*, Izabelin 2001, pp.47–52; J.Kristeva: *Etrangers à nous-mêmes*, Paris 1988, pp.9–248; B.Waldenfels: *Topografia obcego. Studia z fenomenologii obcego*, Warszawa 2002, pp.11–40.

<sup>2</sup> M.Abdallah-Preteceille: *L'éducation interculturelle*, Paris 1999, p.45; M.Balicki: *Otoczenie kulturowe jako wyzwanie dla zarządzania w erze globalizacji* [en:] J.Nikitorowicz kaj al. (org.): *Międzygeneracyjna transmisja dziedzictwa kulturowego. Globalizm versus regionalizm*, Białystok 2003, p.83.

diferencoj provokas diversajn reagojn en interagado de membroj de specifaj grupoj, kaj sekve de tiu ĉi interagado aperas gajnoj kaj perdoj influantaj al kreado de idento.<sup>1</sup> Etnismo – kiel formo de organizo de socio, estas sekvo de interagado de grupa idento kaj de ĉirkaŭaĵo. Bazite sur apartecoj de homoj, ĝi posedas trajtojn politikajn, organizajn kaj simbolajn.<sup>2</sup>

Sento de etnisma ligo aperas en intergrupa kontakto kaj estas ĝia rezulto.<sup>3</sup> Por ĝi ne gravas do kvalitoj kaj trajtoj de grupo en si mem, sed pritrakto de la kvalitoj kaj trajtoj rilate al najbara grupo, en kunteksto kiu permesas distingi kulturajn diferencojn. Limoj de kulturoj ne estas klaraj kaj ne devas identiĝi kun etnaj limoj.<sup>4</sup>

Distingitajn sociajn homamasojn, kiujn karakterizas firmeco, solidareco kaj konscio de komuna deveno, oni nomas etnaj grupoj. De aliaj homamasoj distingas ilin etnoso - tio estas aro de trajtoj, kiuj karakterizas apartan kulturon de grupo, ekzemple valorajoj (bazaj, identigaj, simbolaj por la grupo kaj por ĝiaj unuopaj membroj). Tiuj ĉi valorajoj aperas danke al komuneco de origino, okupata teritorio, historio, lingvo, religio, tradicio, kutimoj, moroj, normoj, agmanieroj ktp. Etnoso la plej ofte ligiĝas kun propra grupo, kies membroj havas fortan senton de idento - eĉ eliteco, kio elmontriĝas en tendenco al ekskludo de personoj, kiuj ne apartenas al Ni.<sup>5</sup>

---

<sup>1</sup> E.Czykwin, D.Misiejuk: *Dwujęzyczność i dwukulturowość w perspektywie psychopedagogicznej*, Białystok 2002, pp.62–76.

<sup>2</sup> W.Burszta: *Antropologia kultury. Tematy, teorie, interpretacje*, Poznań 1998, p.136.

<sup>3</sup> Pli vaste: J.P.Folger kaj al.: *Konflikt i interakcja* [en:] J.Stewart (org.): *Mosty zamiast murów. Podręcznik komunikacji interpersonalnej*, Warszawa 2003, pp.491–501.

<sup>4</sup> W.Burszta: *Antropologia...*, op.cit., pp.136–140.

<sup>5</sup> J.Nikitorowicz: *Wartości etnosu jako podstawa kształtowania tożsamości wielokulturowej, podłoże konfliktów kulturowych i cel edukacji międzykulturowej* [en:] T.Lewowicki kaj al. (org.): *Świat wartości i edukacja międzykulturowa*, Cieszyn–Warszawa 2003, pp.35–36. – Cf.: J.Burszta: *Kultura ludowa – kultura narodowa. Szkice i rozprawy*, Warszawa 1973, p.12.

Sociajn rilatojn, kiuj dependas de perceptado de diferenco, permesas ordigi kaj priskribi jenaj nocioj:

- Diferenculo – persono diferenca, sed konata kaj malgraŭ la diferencoj komprenata kaj antaŭvidebla. Diferenculo povas samtempe aparteni al Ni (proksima Diferenculo - persone, senpere konata kaj komprenata, ekz. familiano kies diferenco iĝis familiara pro ĉiutaga kunvivado), kaj al Ili (malproksima Diferenculo - vivanta ekster Ni, kvankam persone, senpere nekonata, tamen komprenata almenaŭ unuavide kaj ŝajne danke al analogioj rimarkitaj dum komparado, kaj danke al ĝisnuna sperto de kontaktoj kun samspecaj personoj). Diferenculo depende de esenco de la diferenco kaj grado de konateco, povas provoki interesecon, scivolemon, emon de pli proksima kontakto kies celo estas konatiĝo - aŭ almenaŭ ne malinklinigas al tiuspeca kontakto.
- Fremdulo – persono diferenca, ĉiam alkalkulata al Ili, ne ebla priskribi per nocio “Diferenculo”, ĉar tute nekonata, aŭ konata tiom malmulte, ke tio malebligas komprenon kaj estas ligita kun neantaŭvidebleco, malfido, malcerteco, sento de danĝero. En sociaj kontaktoj, Fremdulo provokas pli grandajn emociojn ol aliaj personoj. Kiel eble danĝera, Fremdulo povas provoki malŝaton, forigemon, fuĝemon, agresemon, emon sin turni, separiĝi, diskriminacii, ekskludi ktp.

Diferenculoj kaj Fremduloj apartenas al pasintaj, nuntempaj kaj estontaj generacioj; ekzistas en diversaj kodoj de komunikado kaj diversaj statoj de vivo.<sup>1</sup> Diferenceco/fremdeco ne estas trajto senkondiĉa, kiu ĉiam karakterizas la saman personon, aŭ personojn de la sama kategorio. Ĝi estas trajto kondiĉa, kiun en specifaj cirkonstancoj oni posedas, kaj en la aliaj ne posedas - sendepende de propraj modifoj. Oni povas percepti ĝin en kunteksto intrakulturaj (mi mem fone de aliaj personoj), kaj interkulturaj (iu alia fone de mi mem kaj de aliaj personoj).<sup>2</sup>

---

<sup>1</sup> M.Jarymowicz: *Poznać siebie – zrozumieć innych* [en:] J.Kozielecki (org.): *Humanistyka przelomu wieków*, Warszawa 1999, p.190.

<sup>2</sup> Z.Bauman: *Socjologia...*, op.cit., p.49.

Kun Diferenculoj, malgraŭ diferencoj eblas amikiĝi, aŭ almenaŭ estas facile pensi pri tiu ĉi eblo, ĉar tiu ĉi penso kaj perspektivo ne provokas negativajn emociojn. Kontraŭe estas rilate Fremdulojn, kiuj kvankam foje aperas en la plej proksima medio (aŭ eĉ longtempe situigas tie, tamen apartece), sed karakterizas ilin malfacilaj, nekomprenablaj - do ĝenaj kaj interesvekaj - moroj, vivstilo, aspekto ktp. Oni ne scias, ĉu ili estas amikaj, aŭ malamikaj kaj pro tio ili ĉiam provokas malcerton kaj maltrankvilon. Oni ne scias precize kion fari kun ili, kion de ili atendi, kiel kunagadi.<sup>1</sup>

Tiu ĉi fakto ne surprizas, ĉar la ĉefa trajto de ĉiu fremdaĵo estas malkongruo kun propraĵoj - kaj eĉ se iu kongruo ekzistas, ĝi ne kontentigas.<sup>2</sup> Transiro de limo de fremdeco, de tro drasta diferenco, povas gvidi al situacio, kiam Fremdulo estas traktata kiel malamiko. Konscio pri diferenceco iĝas sento de fremdeco nur post apero de emocioj kaj sintenoj ligitaj kun perceptata kaj nekomprenata malsimileco. La emocioj povas esti kaj pozitivaj (fascino, ravo ktp.), kaj negativaj (malkompreno, surprizo, maltrankvilo, timo ktp.). Foje kaŭzas ilin realaj kialoj, sed pli ofte la kialojn ne eblas distingi. Tiam observado de faktoj iĝas duaranga, kaj la bazo de rilatoj kun Diferenculoj/Fremduloj iĝa ĉefe emocioj kaj rigida ekstersperta scio.<sup>3</sup>

Maltrankvilo aperanta dum kontakto kun diferenceco estas en kelkaj okazoj profita kaj kreiva, ĉar vekanta melcerton kaj timon imago de Diferenculo (kaj ĉefe tiu de Fremdulo), povas helpi integri kaj firmigi grupon. De tie ankaŭ venas pligrandigo de intereso pri Fremduloj, pri kontaktoj kun ili en situacioj, kiam ili estas bezonataj - ekz. en periodoj de grandaj ŝanĝoj, sociaj evoluoj, transformado de socia konscio ktp., en kiuj Fremduloj povas esti fonto de novaĵoj, aŭ servi kiel oferkapoj.<sup>4</sup>

<sup>1</sup> *Ibid.*, p.62.

<sup>2</sup> B.Waldenfels: *Topografia...*, *op.cit.*, p.3.

<sup>3</sup> E.Nowicka: *Badanie...*, *op.cit.*, pp.15–16.

<sup>4</sup> Pli vaste: R.Girard: *Koziół ofiarny*, Łódź 1991; E.Tarkowska: *Niepewność...*, *op.cit.*, p.89.

Individuaj manieroj percepti Diferenculojn/Fremdulojn ne estas fidelaj kopioj de specifaj vivmodeloj de grupo. Ensemblo de spertoj de grupo estas multe pli komplika kaj esence pli riĉa, ol praktikaj planoj kaj bezonoj de unuopa individuo kiu rilatas kun Diferenculoj/Fremduloj laŭ propra maniero. Krom tio, akceptitaj de individuo manieroj de perceptado de Diferenculoj/Fremduloj, ĉiam estas nur parto de komuna sperto de ĝia grupo, kaj nur helpas konstrui komunan percepton, ĉar ne ĉiuj unuopaj spertoj estas reproduktataj en procezo de konstruado de kulturo.<sup>1</sup>

Rilatoj kun Diferenculoj/Fremduloj okazas en jenaj dimensioj:

- aksiologia dimensio – valorigado de Diferenculo/Fremdulo (ĉu estas bona, aŭ malbona; mi ŝatas lin, aŭ malŝatas; li estas egala, pli bona, aŭ pli malbona ol mi mem ktp.),
- prakseologia dimensio – distanco al Diferenculo/Fremdulo (ĉu mi rimarkas lian valorecon; ĉu mi identiĝas kun li; ĉu mi provas asimiligi lin kaj perforte akceptigi al li mian vivideon; ĉu mi estas rilate al li neŭtrala, aŭ egaleca ktp.),
- epistemologia dimensio – scio pri Diferenculo/Fremdulo (ĉu mi konscias lian identon kaj ĝiajn konsekvencojn por mi mem, aŭ mi scias tute nenion ktp.).

En tiel difinitaj dimensioj, oni povas distingi senfinan nombron da niveloj de rilatoj, kiuj dependas de pli aŭ malpli granda kono de Diferenculoj/Fremduloj.<sup>2</sup>

La plej originaj arketipoj de rilatoj al fremdeco evoluantaj en homa historio – plej ofte en kulturaj formoj de malamikeco, maltolero kaj antaŭjuĝo - estas “disbepikado” kaj “formordado”. Socia sekvo de ili estas biologia eksterminado, aŭ almenaŭ simbola neniigo de homoj kaj valoroj perceptataj kiel diferencaj - kaj des pli kiel fremdaj.<sup>3</sup> Wojciech Pawlik opinias,

<sup>1</sup> Z.Boksański: *Stereotypy a kultura*. Wrocław 1997, p.58.

<sup>2</sup> T.Todorov: *Podbój...*, *op.cit.*, p.205. – Cf.: M.Abdallah-Preteille: *Vers une pédagogie interculturelle*, Paris 1996, p.42 kaj sekvaj.

<sup>3</sup> W.Pawlik: *Arogancja kultury odrzucającej “inność”*, “Kultura i Społeczeństwo”, No 4/1984, p.129.



ke: „*Observado de ĉiutaga agado elmontras, kiom multe da agreso ekzistas rilate al kultura diferenceco - ĉefe en kelkaj socioj. Tro longaj, aŭ tro mallongaj hararoj, uzado de «malĝustaj» koloroj, vizitado de malbone vidataj preĝejoj - ĉio ĉi estas sufiĉaj kialoj por socie izoligi, aŭ diskriminacii kulturan «diferencecon».*“<sup>1</sup>

La preteksto por forpuŝo de diferenceco estas fakto de „(...) ekzistas konflikto inter «niaj» kaj «fremdaj» modeloj de agado kaj pensado. La fakto, ke aliaj homoj agadas alimaniere, alimaniere sin vestas, ke ili ne estas tiaj kiaj ni estas, sufiĉas por esti preteksto por forpuŝo de ili kaj des pli por forpuŝo de ilia kulturo.”<sup>2</sup>

Krom la plej popularaj kategorioj de Diferenculoj/Fremduloj distingitaj laŭ raso kaj nacieco, kiel objektoj de antaŭjuĝo, maltolero kaj diskriminacio, povas funkcii malformalaj grupoj de junularo, kiu konstruadas kaj substrekas siajn identojn per eksteraj atributoj de aparteno; personoj biologie „malnormalaj” kaj socioj, kiuj estas perceptataj kiel danĝeraj al centraj valoroj de kultura sistemo.<sup>3</sup>

Liston de potenciale danĝeraj (eĉ malracie) trajtoj de Diferenculoj/Fremduloj, kiuj estas la kialo de individua aŭ grupa diskriminacio, oni povas kompletigi per senfinaj elementoj. Je diferenceco reagis kaj individuoj kaj homamasoj. Florian Znaniecki, analizante tensiojn kaj konfliktojn aperantajn pro kultura diverseco de medio, difinis jenajn specojn de antagonismoj:<sup>4</sup>

- amasa antagonismo kontraŭ amasa objekto (ekz. tribo, sekto, aŭ nacio kontraŭ fremda tribo, sekto, aŭ nacio),

<sup>1</sup> *Ibid.*, p.131.

<sup>2</sup> *Ibid.*, p.130.

<sup>3</sup> *Ibid.*, p.132. – Cf.: E.Czykwin: *Fenomen trwałości uprzedzeń etniczno-religijnych* [en:] J.Nikitorowicz (org.): *Edukacja międzykulturowa. W kręgu...*, op.cit., pp.347–363.

<sup>4</sup> Laŭ la Aŭtoro, antagonismo estas to aktuala, aŭ potenciala ago kontraŭ socia objekto.

- individua antagonismo kontraŭ amasa objekto (ekz. malamo de individuo kontraŭ grupo, de kiu li spertis damaĝojn kvankam ne estis ĝia membro),
- amasa antagonismo kontraŭ individua objekto (ekz. loĝantoj de vilaĝo kontraŭ fremda vizitanto),
- individua antagonismo kontraŭ individua objekto (ekz. konkurencantaj inter si individuoj).

Inter sinsekvaj specoj de antagonismoj ne ekzistas klaraj limoj, sed ŝtupaj transiroj.<sup>1</sup>

Venantaj de ĉirkaŭaĵo gestoj de malŝato kontraŭ Diferenculoj/Fremduloj, estas rimarkataj de ili kaj provokas konvenajn reagojn. Plifortigita sento de fremdeco estas ligita kun negativaj emocioj kaj ofte gvidas al agresplenaj agoj. Sentoj de soleco, humiligo, ĉu subigo, elvokas timon kaj provokas emon de revenĝo pro spertitaj moralaj kaj (foje) materiaj damaĝoj - realaj kaj atendataj, troige imagataj. Ju pli vivo de iu homamaso estas saturata de malŝato, malamikeco, antaŭjuĝo kontraŭ Diferenculoj/Fremduloj, des pli probable estas, ke kiel efiko de sociigaj kaj edukaj procezoj aperos antaŭjuĝo kontraŭ iuj personoj. Individuoj, aŭ grupoj troviĝantaj en medio perceptata kiel fremda, kies loĝantoj traktas ilin kiel Fremdulojn, vivas en senĉesa sento de minaco kaj premo, kiuj estas efiko de malpligrandigo de ilia sento de propra valoro, de manko de akcepto, aŭ de forpuŝo.<sup>2</sup>

Ekzistas du aliroj al problemo de Diferenculo/Fremdulo. Unuaflanke, diferencecon kaj fremdecon oni povas trakti grandanime kaj riĉige, eĉ komplezeme, sed tiuspeca paŝo gvidas al perdo de eblo kreadi realaĵojn bazitajn sur kunagado, kaj al koncentriĝo sur morta centro de propraj esencoj kaj valoraĵoj.<sup>3</sup>

<sup>1</sup> F.Znaniecki: *Studia nad antagonizmem do obcych*, Warszawa 1990, pp.330–331.

<sup>2</sup> Pli vaste: B.Karolczak-Biernacka: *Postawy młodzieży wobec mniejszości* [en:] J.Nikitorowicz (org.): *Edukacja międzykulturowa. W kręgu...*, op.cit., p.260; J.Nikitorowicz: *Pogranicze, tożsamość, edukacja międzykulturowa*, Białystok 1995, pp.35.

<sup>3</sup> *Ibid.*, p.18.

Duaflanke, laŭ evoluanta al megalomanio regulo de agresplena, etnocentrisma aliro al la mondo, apriorie eblas percepti Diferenculojn/Fremdulojn kiel malpli bonajn. Homo traktas sin mem kiel harmoniplenan kaj memkompreneblan tutajon, dum al Diferenculoj/Fremduloj oni atribuas ĉiujn mankojn kaj deklinojn de normo, kio ne permesas esti objektiva en interagado kun ili. Kun ĉio ĉi estas ligita konvinko de supereco de propra grupo, malestimo al personoj de ekster ĝi, kaj eĉ malamo al tiuj, kiuj estas diferencaj kaj malkompreneblaj.<sup>1</sup>

Ekstremaj reagoj je diferenceco bildiĝis en ideologioj kaj politikaj praktikoj. Ili apartenas al spektro difinita de unuaflanke troige altruismaj provoj aŭskulti voĉojn de Diferenculoj/Fremduloj kaj neniigi propran Mi - kaj duaflanke, de agresema subigo de Diferenculoj/Fremduloj al propra Mi kaj ŝanĝigo ilin je marionetoj, kies ŝnuretojn oni firme kontrolas.<sup>2</sup>

Kvalitan ŝanĝon en maniero de perceptado kaj spertado de diferenceco (almenaŭ en teorio kaj ideologio), alportis la turnopunkto de XIX-a kaj XX-a jarcentoj. Diferenculojn/Fremdulojn oni komencis trakti en kunteksto de kulturaj diferencoj, kaj ideologio de kulturo kiu permesas montri sian homecon diversmaniere iĝis la bazo de humanisma sinteno rilate al kultura diverseco de la mondo.<sup>3</sup>

Nuntempe tiu ĉi sinteno elmontriĝas en demokratiigo de vivo kaj en tolero, kies sekvoj estas akceptado de Diferenculoj/Fremduloj kaj konsento je kunloĝado kun ili sur sama (aŭ najbara) teritorio - prefere laŭ klare difinitaj kondiĉoj.<sup>4</sup> Difino de la kondiĉoj de kunvivado sur elektita teritorio kaj de kunvivado en la sama homamaso estas tre plaĉa, kiel leĝe sankciata (formale, aŭ malformale) defenda reago je diferenceco kaj fremdeco. Ĉar se oni ne provus „malsovaĝigi” diferencecon, la

<sup>1</sup> W.Burszta: *Antropologia...*, op.cit., p.18. – Cf.: E.Tarkowska: *Niepewność...*, op.cit., p.90.

<sup>2</sup> T.Todorov: *Podbój...*, op.cit., p.275.

<sup>3</sup> W.Burszta: *Wielokulturowość.Pytania pierwsze* [en:] M.Kempny kaj al. (org.): *U progu...*, op.cit., p.25.

<sup>4</sup> M.Golka: *Oblicza wielokulturowości* [en:] *Ibid.*, p.52.

vivo en komunumo senĉese endanĝerigita per streĉo, iĝus neeltenebla pro troa malcerto. Malcerto ja malofte estas plezura stato, do prefere oni fuĝas de ĝi. Tiu ĉi fuĝo elmontriĝas en diversaj formoj de premo kaj postulado de fidelo je normoj de gepatra kulturo. Elmontriĝas ankaŭ en malfermaj provoj ridindigi kaj malpligravigi normojn de aliaj kulturoj, kaj kreitajn en ili diferencajn ordojn de socio. Tiujn kulturojn oni montras kiel „malkulturecajn”, tio estas primitivaj, vulgaraj, sovaĝaj, kies vivstilo estas pli besta ol homa. Foje oni montras ilin kiel degeneraĵo aŭ malnormalaĵo - efiko de danĝera, patologia deklivo de normo. Tiuspecaj sintenoj estas metodo de defendo de sanĉeliĝanta ordo, kies sola stabila bazo povus esti komuna kulturkodo.

„*Politiko de respekto de rajtoj de minoritatoj* - skribas Jerzy Nikitorowicz - *gvidas al ilia pli granda aktiveco, publika elmontrado de atendoj kaj postulado de ilia kontentigo.*”<sup>1</sup> Tamen eĉ tiuj ĉi atendoj kaj postuloj, plej ofte renkontiĝas kun vakuo, kion pravas manko de politikaj reprezentantoj en majoritataj institucioj, manko de apogo de aŭtoritatuloj, kaj manko de materiaj rimedoj. Kiel rimarkas Zygmunt Bauman, kulturoj kutime decidas toleri aliajn kulturojn nur je distanco, per enkonduko de iuj malpermesoj kaj en formala maniero. Ekzemple, oni permesas al fremdlandanoj posedi butiketojn kaj restoracietojn, labori en malŝatataj kaj maldignaj postenoj. Oni reduktas iliajn eblojn de kontaktoj kaj klare limigas al ili amason da aferoj de vivo. Oni admiras kreaĵojn de fremdaj kulturoj nur en muzeoj, galerioj, kinejoj, teatrejoj kaj koncertejoj; ebligas kontaktojn okaze de ferio kaj festoj, kaj zorge akcentas disigon de ekzota kaj „normala” vivo. Laŭ Z.Bauman: „*«Stranguloj» estas danĝeraj, ĉar ili elmontras, ke interna ordo de socio estas arbitrala kaj kiel tia ĝi estas objekto de elekto - kio subfosas fundamentojn de dominantaj normoj. Kie unu apud la aliaj funkcias kelkaj kulturoj, kaj iliaj teritorioj de agado ne estas*

<sup>1</sup> J.Nikitorowicz: *Koncepcja tożsamości międzykulturowej jako wartości edukacyjnej społeczeństwa wielokulturowego*, manuscript, p.2.

*klare disigitaj (...), tie por paco kaj trankvilo estas bezonata reciproka tolero, kiun estas tre malfacile akiri.*<sup>1</sup>

Ankaŭ la citita ĉi supre W.Pawlik rimarkas, ke el vidpunkto de dominanta kulturo, la kondiĉo de toleri diferencecon estas civilizigo de Diferenculoj - tio estas ilia similiĝo al socia plimulto, aŭ prefere kompleta fandiĝo kun ĝi. En tia kunteksto, ostentacia elmontrado kaj substrekado de propra diferenco estas traktata de la plimulto ne kiel natura rajto je elmontrado de aparteco, sed kiel signo de orgojlo, arogo, troa sentiveco je diferenco, eĉ kiel signo de agreso - kaj almenaŭ (ofte prave) kiel preteksto de misuzoj.<sup>2</sup> Nuntempe Diferenculoj/Fremduloj ofte elmontras sian bezonon esti rimarkataj kaj komprenataj, pro kio aperadas diversaj iniciatoj, kies celo estas pruvi ilian ekziston en la medio: „(...) «kulturo» komprenata kiel personigita estaĵo, kiu posedas unikan neŝanĝeblan naturon, iĝas utila ilo de retoriko en politiko de konstruado de grupa idento de diversaj societoj, minoritatoj ktp., kiujn enhavas la dominanta kulturo. Tiuj ĉi minoritatoj traktadas sin mem kiel kulturajn minoritatojn, sed ofte iliaj postuloj de respekto al ilia «kultura» aparto estas ligitaj kun postuloj de forigo de sociaj kaj politikaj diferencoj, kiujn oni rimarkas en liberala demokratio.»<sup>3</sup>

Kresko de memkonscio provokis apartigon el pli larĝa fono de novaj valoraĵoj, substrekadon de ili kaj siaspecan flegadon de ili fare de Diferenculoj/Fremduloj - eĉ se tio kaŭzas iujn problemojn.

Heterodokseco de postmoderna socio helpas kreski al akceptado de diferenceco kaj diverseco.<sup>4</sup> Tio okazas eĉ kontraŭvole de interesatoj mem, ĉar hodiaŭ ne eblas ne voli renkontadi Diferenculojn/Fremdulojn. Ili aperas en ĉiu situacio: surstrate, en elektronikaj amaskomunikiloj troviĝantaj en ĉiu

<sup>1</sup> Z.Bauman: *Socjologia...*, op.cit., pp.164–166, 180.

<sup>2</sup> W.Pawlik: *Arogancja...*, op.cit., pp.132–133.

<sup>3</sup> M.Kempny: *Wielokulturowość “ante portas”!* [en:] M.Kempny kaj al. (org.): *U progno...* op.cit., p.284.

<sup>4</sup> A.Krause: *Integracyjne złudzenia ponowoczesności (sytuacja ludzi niepełnosprawnych)*, Kraków 2000, p.65.

hejmo, en internaciaj institucioj. Diferenculoj/Fremduloj estas neforigebla trajto kaj valoraĵo de nuntempo kaj de funkciaj en ĝi socioj, kaj karaktero de la socioj estas perforte determinita de ili.

En sia maniero ĉiu estas Diferenculo/Fremdulo. En plena je diferencoj socio ĉiu strebadas ne esti „formordita” aŭ „disbepikita”. **Unu el rimedoj, kiuj helpas mildigi konfliktojn kaj aperigi toleradon de diferenceco estas edukado, kiu preparas homojn al malkovrado kaj komprenado de Diferenculoj/Fremduloj.** Edukado permesas malkovri Diferenculon/Fremdulon en si mem - kio bildiĝas en sintenoj rilate al aliaj homoj kaj en ritualoj kun ili. Kiel bazo de tiu ĉi tezo servas ideo de Hans Georg Gadamer: „Ĉiuj ni estas Diferenculoj kaj ĉiuj ni estas ni mem. (...) Decidaj kaj elstaraj valoraĵoj al kiuj ni povas strebi kaj kiujn ni povas akiri, estas partopreno en Diferenculo, kunvivado en lia mondo. Do eble ne estos troige diri, ke eble ni transvivos kiel homaro, kiam ni sukcesos ellerni, ke (...) ni devas halti fronte al Diferenculo (...). Kaj ni devas spertadi, kio estas Diferenculoj, kion ili perceptas dum ni perceptadas ilin inter ni. Ni devas lerni partopreni en si reciproke.”<sup>1</sup>

Akcepto de tiu ĉi tezo permesas trairi de skemo „diferenca - fremda - malamika”, al „diferenca - interesa - amika”. Danke al tio, aliroj al kultura diverseco okazas en tute novaj perspektivoj.

### 1.1. Kultura diverseco

Laŭ Wojciech Burszta, kultura diverseco estas fakto, kaj la tasko de scienco estas priskribi tiun ĉi fakton kaj klarigi ĝin.<sup>2</sup> Zygmunt Komorowski opinias, ke perspektivoj de kultura estonto de la mondo kaj de homaro estas jenaj:

- strebado al firma unueco, en kiu ĉiuj diferencoj iom post iom malaperados;

<sup>1</sup> Za: J.Kuczyński: *Młodość Europy i wieczność Polski*, Warszawa 1999, pp.171–172.

<sup>2</sup> W.Burszta: *Wielokulturowość...*, op.cit., p.25.

- konservado de plureco de diferencaj kulturoj, kiel elementoj necesaj por evoluo.<sup>1</sup>

Post malbonaj spertoj el pasinto, estus malfacile realigi la unuan perspektivon, kiu pensigas pri totalitarismaj ideologioj. Tio eblus eventuale en malgranda dimensio kaj nur en limigita socikultura kunteksto, ĉar kaj universalismaj konceptoj de vivo (paradokse bazitaj sur ideoj de unuiĝo), kaj sistemoj de pensado eligitaj el fundamentalisma mondkoncepto, daŭre havas siajn ŝatantojn.<sup>2</sup>

Kiel pli reala ŝajnas do la dua perspektivo, en kiu kultura diverseco estas esenco kaj kondiĉo de disvolviĝado de socioj. Laŭ J.Nikitorowicz, nuntempa kultura diverseco estas plurdimensia. Oni povas pritrakti ĝin el du vidpunktoj: teritoria vidpunkto (rilatas al okupado de iu tereno) kaj proceza (rilatas al rimarkeblaj apartaĵoj, etnismaj kaj naciismaj movadoj, aperado de novaj sendependaj ŝtatoj, migrado kaj demokratiigo de vivo).<sup>3</sup>

Surbaze de karaktero de sociaj rilatoj ekzistantaj en iu medio, eblas distingi jenajn modelojn de kultura diverseco:

- Multkultureco – diversaj kulturoj kaj naciaj, etnaj, religiaj ktp. grupoj vivadas sur la sama teritorio, sed tio ne signifas, ke ili rilatas unuj kun la aliaj. Eĉ se okazas iliaj kontaktoj, plej ofte estas hazardaj kaj eblaj pro favoraj cirkonstancoj (ekz. najbareco). En tia situacio, diferenceco estas perceptata kiel negativa faktoro, eĉ kiel danĝero kaj estas rigardata kiel pravigo de diskriminacio. Minoritatoj povas esti pasive tolerataj, sed neniam akceptataj aŭ agnoskataj. Leĝo, en kiu oni antaŭvidis regulojn kiuj malpermesas diskriminaciajn praktikojn, reale tamen ne estas respektata. Loĝantoj de tiuspeca medio apartenantaj al diferencaj grupoj, vivadas do

<sup>1</sup> Z.Komorowski: *Pluralizm – wielokulturowość – diaspora*, “Kultura i Społeczeństwo”, No 2–3/1975, p.259.

<sup>2</sup> P.Kennedy: *U progu XXI wieku (przymiarka do przyszłości)*, London 1994, p.373 kaj sekvaj.

<sup>3</sup> J.Nikitorowicz: *Koncepcja...*, op.cit., p.3; idem: *Tożsamość międzykulturowa jako efekt edukacji w społeczeństwie wielokulturowym*, “Europejczycy”, No 1/2001, pp.63–73.

unuj APUD la aliaj, limiĝante nur al eksteraj kontaktoj devigaj pro fizika proksimeco. En la kontaktoj ne estas bezonata emocia engaĝiĝo. Socio estas do aro de apartaj grupoj, el kiuj ĉiu havas proprajn interesojn, pri kiuj oni zorgas en apartaj sociaj institucioj. Rimerkeblas tendencoj al izoliĝo, tensioj, premoj kaj konfliktoj dum kontaktoj de majoritato - minoritatoj. La majoritato strebas al asimiligo de minoritatoj. Sociaj rilatoj estas pritraktataj fone de grupoj kaj de iliaj statusoj. Situacio kaj rajtoj de individuoj estas aferoj duarangaj. En historio, la ekstremaj ekzemploj de tiuspecaj medioj estas: iama Norda Irlando, aŭ israel-palestina apudlimo.

- Interkultureco – diversaj kulturoj kaj naciaj, etnaj, religiaj ktp. grupoj vivadas KUNE sur la sama teritorio kaj partoprenas en malfermaj, regulaj kaj daŭraj interagoj, kiujn akompanas etoso de interŝanĝo, reciproka estimo, komprenemo rilate al diversaj vivstiloj, valoraĵoj, normoj ktp. gravaj por partoprenantoj de la kontaktoj. Ĉio ĉi permesas krei harmonian sistemon superantan diferencojn, sen forigo de ili. Diverseco estas perceptata kiel aktiva faktoro, kiu helpas en socia, politika kaj ekonomia evoluoj. En tiaj kondiĉoj okazas procezo de aktiva tolero kaj strebo al kreado kaj subtenado de justaj rilatoj, en kiuj ĉiu gravas egale - tio estas, ne ekzistas personoj privilegiataj kaj subigataj, pli bonaj kaj malpli bonaj pro tiu aŭ alia kultura idento. Loĝantoj de tiuspeca medio, apartenantaj al diferencaj grupoj ne limiĝas al eksteraj kontaktoj devigaj pro fizika proksimeco, sed en diversaj kampoj kunvivadas kaj kunlaboradas, strebante al solvado de tensioj kaj konfliktoj per negocado kaj atingado de kompromiso. La definitiva celo de kunvivado surbaze de socia ekvilibro estas reciproka integriĝo. Sociaj rilatoj estas pritraktataj ne fone de grupoj, sed fone de individuoj, al kiuj oni atribuas rajtojn posedi kaj elmontradi sian identon, diferencecon kaj apartecon - kondiĉe tamen, ke ili ne rompu rajtojn de aliaj personoj. Ekzemploj de tiuspecaj medioj estas familioj, loĝantaroj de etaj patrujoj (difinitaj medioj, kiuj



homoj traktas kiel proprajn “nestojn”, emocie akceptatajn loĝlokojn),<sup>1</sup> lokaj kaj regionaj komunumoj, etnaj societoj ktp.<sup>2</sup> Rilate al la ĉi supraj modeloj, kulturen diversecon oni povas percepti el perspektivoj de:

- socia realo – objektiva fakto de konekzisto de diversaj kulturoj en iu socio, kaj de konsekvencoj de tiu ĉi fakto al grupoj kaj individuoj;
- ideologio – idealo, doktrino, filozofio aŭ alispeca idea bazo de socia aktivado, kiu elmontriĝas ekzemple en lernejoj programoj;
- politika praktiko – socia aktivado surbaze de realigo de iu ideologio; ĝia objekto estas sociaj grupoj aŭ individuoj, kiujn karakterizas kulturaj trajtoj distingantaj ilin de dominanta kulturo.<sup>3</sup>

Fernand Ouellet indikas jenajn alirojn al la situacio de kultura diferenceco, utiligatajn de registaroj en diversaj landoj:

- unukultura (monokultura) – ŝtato respondecas pri ensociigo de ĉiuj civitanoj kadre de nacia kulturo, en kiu disfandiĝas kultura idento kaj specifeco de subkulturaj grupoj;

---

<sup>1</sup> Pli vaste: S.Ossowski: *O ojczyźnie i narodzie*, Warszawa 1984; *idem: Z zagadnień psychologii społecznej. Analiza socjologiczna pojęcia ojczyzny* [en:] *idem, Dziela*, Warszawa 1967, vol.3; A.Kłoskowska: *Kultury narodowe u korzeni*, Warszawa 1996, pp.52–75.

<sup>2</sup> C.Camilleri: *La communication dans la perspective interculturelle*, [en:] C.Camilleri, M.Cohen-Emerique (org.): *Chocs de cultures. Concepts et enjeux pratiques de l'interculturel*, Paris 1989, p.389; A.Grima Camilleri: *Comme c'est bizarre! L'utilisation d'anecdotes dans le développement de la compétence interculturelle*, Strasbourg 2002, pp.56–57; S.Martinelli, M.Taylor (org.): *Uczenie się międzykulturowe*, pakiet szkoleniowy No 4, Strasbourg 2000, p.98; M.Taylor: *Concepts-clés et bases de l'éducation interculturelle* [en:] P.Brandier kaj al.: *Kit pédagogique. Idées, ressources, méthodes et activités pour l'éducation interculturelle informelle avec des adultes et des jeunes*, Strasbourg 1995, p.25.

<sup>3</sup> W.Burszta: *Antropologia...*, *op.cit.*, p.152; D.Wojakowski: *Wielokulturowość pogranicza wyzwaniem dla edukacji (Z badań na pograniczu polsko-ukraińskim)*, [en:] T.Lewowicki (org.): *Edukacja...*, *op.cit.*, pp.116–117.

- multkultura – ŝtato respondecas pri helpado al ĉiuj subkulturaj grupoj rilate al konservado de idento kaj kultura heredaĵo;
- interkultura – ŝtato konforme agadas por apogi harmoniajn kontaktojn inter diversaj kulturaj grupoj, kreante por iliaj membroj okazojn de interŝanĝo kaj kunlaboro;
- transkultura – en situacio dependanta de globaligaj (ĉefe ekonomiaj) ŝanĝoj, ŝtato apogas membrojn de diversaj subkulturaj grupoj en kreiva kaj dinamika transirado de grupaj limoj.

Neniu el tiuj ĉi aliroj ekzistas en pura stato: plej ofte oni renkontas ligojn de du aŭ tri el ili - kun dominado de unu.<sup>1</sup>

Depende de ideologio kaj socia praktiko rilata al etnaj grupoj kaj unuopaj individuoj (precipe tiom specialaj kiel Diferenculoj/Fremduloj), eblas distingi jenajn modelojn de ordigo de kultura diverseco:

- fizika forigo de minoritatoj – detruo de minoritato konkurencanta por akiri teritorion aŭ dominadon (foje en formo de genocido);
- etna purigo – foririgo de malpli forta (sed ne necese malpli multnombra) grupo el ĝis nun kune okupata teritorio (ekz. deportado);
- asimiligo – perforta similigo de minoritato al majoritato, kiun akompanas forigo de rajtoj je propra lingvo, kulturo, religio ktp. (modeloj de asimiligo estas diversaj depende de ŝtata sistemo, karaktero de medio, grandeco de minoritatoj ktp.);
- sankciita etna pluralismo – realigado de liberalisma ideo „vivu kaj permesu vivi al aliaj”, kiu permesas akiri certan gradon de libereco, sed ĝenerale gvidas al ekskludo de subkulturoj kaj minoritataj grupoj el civitana societo (gettoigo, malplivalorigo de minoritatoj);

---

<sup>1</sup> F.Ouellet, M.Pagé (org.): *Pluriethnicité, éducation et société, construire un espace commun. Institut québécois de la recherche sur la culture*, Montréal 1991, pp.251–254.



- civitana integriĝo – integriĝo de soci-kultura sistemo, kiun akompanas estimo de rajto esti diferenca; ĝi estas postulata idealo de nuntempa standardo de demokratio, kiu strebas al samvalorigo de homoj el civitana vidpunkto, kun ebleco konservi kulturecan diferencecon)<sup>1</sup>.

Akcepto de iu el la modeloj kiel paradigmon kaj bazon de karakterizado de medio, estas ligita kun priskribo de situacio de individuoj kaj grupoj, kio videblas ekzemple en elirpunktoj de sciencaj esploroj kaj de konceptoj de edukado.

Estas interese rimarki, ke la modelo de multkultureco troviĝas en scienca diskurso kun anglosaksonaj epistemologiaj radikoj (ĉefe en usona kulturo). La modelo de interkultureco estas preferata en sciencaj rondoj ligitaj kun eŭropa pensmaniero (ĉefe kun franclingva kulturo - ankaŭ en Kebekio). Tiun ĉi situacion influas historiaj, ideologiaj, politikaj kaj sociaj faktoroj en ĉiu el ambaŭ medioj, dependaj de tradicio percepti homom kaj ties situacion en socio. Por pli bone kompreni la aferon, necesas pli detale priskribi ambaŭ modelojn.

### 1.1.1. Multkultureco

Laŭ Denis Lacorne, la nocio „multkultureco” (ang.: *multiculturalism*) aperis por la unua fojo en Usono, kiam la 27-an de junio 1941 ĵurnalo „New York Herald Tribune” aperigis recenzon de ĵus publikigita verko de Edward Haskell „Lance. Rakonto pri multkultureca homo” (ang. *Lance. A Novel About Multicultural Men*). En la libro oni prezentas novan usonan socion. La noveco konsistis el kosmopolitismo, multraseco, multlingveco kaj kultura diverseco. Patriotismo kaj aliaj valoroj, kiuj ligas civitanon kun ŝtato, estis priskribitaj kiel tute malgravaj al li.<sup>2</sup>

<sup>1</sup> K.Krzysztofek: *Wielokulturowość, demokracja i rynek kultury*, [en:] A.Sadowski (org.): *Pogranicze...*, op.cit., pp.35–37.

<sup>2</sup> Laŭ: W.Żelazny: *Etniczność.Lad – konflikt – sprawiedliwość*, Poznań 2004, p.219.

Multkulturecon kiel staton de socio, kaj ĝiajn konsekvencojn al individuoj kaj grupoj, karakterizas:

- Privilegiado de grupo de origino – individuo estas precipe parto de grupo, kaj ĝian agadon determinas aparteno al la grupo. Grupa idento superas personan identon. Substrekitaj estas etnaj, religiaj, teritoriaj, seksaj ktp. diferencoj. Grupoj estas kontraŭstarataj unuj al aliaj, kaj la socio havas formon de specifa mozaiko, en kiu privilegiataj estas iuj strukturoj, karakterizaj trajtoj kaj kategorioj.
- Ordigo de diferencoj – personoj posedataj diferencigan trajton (aŭ aron de la trajtoj), okupas klare difinitajn poziciojn. Pro tio ekzistas ekz. kvartaloj loĝataj de apartaj etnaj grupoj, kaj kelkaj el ili havas karakteron de getto. Tiu ĉi situacio celas substreki diferencecon surbaze de kreado de sociaj kaj teritoriaj enklavoj traktataj kiel homogenaj.
- Karakteriza jurisdikcio garantianta rajtojn al ĉiu – leĝa agnosko de minoritatoj (etnaj, religiaj, seksaj ktp.) gvidas al administraciaj sekvoj - ekz. al politiko de disponigado pri monrimedoj, pozitiva diskriminacio (t.e. favorigado) ktp. Leĝo determinas rilatojn inter grupoj kaj individuoj, kaj dinamiko de la leĝo estas sekvo de agnosko de ekzisto de diferencoj kaj de valorigado de la diferencoj.
- Agnosko de kultura relativismo –ĉiu elemento de kulturo devas esti traktata nur kiel parto de dominanta kulturo, kiun ĝi kunkreas. Tio ĉi helpas eviti decentriĝon kaj ebligas popularigi koncepton de kultura etnocentrismo. Normo iĝas faktoro ordinara kaj relative dogmigita. Sistemo de interpretado de la normo estas subjekto de politikaj kaj sociaj agadoj, pro kio valoro de la normo malkreskas.
- Diferenco estas esprimata en publika spaco – tiu ĉi trajto de komunuma kaj publika vivo estas traktata kiel la plej bona rimedo de agnosko de diferenceco. Diversgradaj lernejoj, kvartaloj kaj institucioj devas reprodukti kulturajn diferencojn kaj igi ilin sociologie rimarkeblaj.<sup>1</sup>

<sup>1</sup> M.Abdallah-Preteceille: *L'éducation...*, op.cit., pp.25–28.

La ĉi supraj reguloj estas nur ĝeneralaj trajtoj de multkultureco priskribata rilate al problemoj de heterogenaj socioj. Tamen ĉiu el la socioj posedas proprajn leĝojn dependantajn de historio kaj kulturo. Pro tio estas multaj variaĵoj de multkultureco kaj de ĉiu el ili dependas reguloj kaj formoj de socia kaj kleriga politiko.<sup>1</sup>

En multkultureco karakterizata kiel statika stato de socio, rilatoj inter kulturoj okazadas kutime pro hazardo kaj danke al favora konjunkturo. Krom tio, la kulturoj povas separiĝi unuj de la aliaj, aŭ eĉ funkcii en konflikto kiu malebligas objektivajn kontaktojn. Tio ĉi povas kaŭzi diversajn ekspansiojn – geografian, ekonomian, asimiligan, ideologian ktp.

**VI-a (de 1945 ĝis nun)** - multflanka evoluo de la Esperanto-movado en la tuta mondo, perfektigado de la lingvo, simpligado de skribo, pliriĉigado de vortaro.<sup>1</sup>

En la unua Esperanto-libro<sup>2</sup> L.L.Zamenhof aperigis kuponetojn kun teksto de promeso, ke la leganto eklernos Esperanton, se dek aliaj milionoj promesos la samon. Tamen pli multaj interesiĝintoj ne faris la promeson, sed tuj eklernis kaj ekuzis la lingvon. Sekve de tio L.L.Zamenhof ricevadis amason da leteroj kun multaj aproboj kaj amikaj kritikoj, proponoj aŭ konsiloj por plibonigo de la lingvo. Kompreneble estis tre

<sup>1</sup> Kompilitaj en tiu ĉi ĉapitro informoj pri historio kaj socia movado de Esperanto, estas ĉerpitaj el: R.Centassi, H.Masson: *L'homme qui a défié Babel: Ludwik Lejzer Zamenhof*. Paris 1995; L.Kökény, V.Bleier (org.): *Enciklopedio de Esperanto*. Budapeŝto 1986; E.Privat: *Historio de la lingvo Esperanto 1887-1927*. Den Haag 1982; J.Żytyński: *Esperanto i esperantysty*. Warszawa 1987.

<sup>2</sup> Dr.Esperanto: *Język międzynarodowy. Przedmowa i podręcznik kompletny*. Warszawa 1887.

malfacile rekoni ĉiujn el ili, precipe ke ili ofte kontraŭstaris unu la alian. En sekvaj verkoj L.L.Zamenhof deklaris, ke li ne volas esti agnoskata kiel la kreinto de la lingvo, sed kiel ĝia iniciatoro, kaj la afero de ĝia evoluiga plibonigo kuŝas jam en en la manoj de ĉiuj uzantoj, kiujn povus reprezenti ekzemple iuspeca senpartia lingva akademio. Tiucele devus aperi pli firmaj strukturoj, organizaĵoj, kies membroj povus libere interŝanĝi ideojn kaj antaŭenpuŝi la aferon.

En la jaro 1888, en Nurenbergo (Nürnberg) naskiĝis la unua esperantista grupo, gvidata de Christian Schmidt. Ĝi estis iama klubo de volapukistoj,<sup>1</sup> kies la plej fervora membro Leopold Einstein ricevis ambaŭ librojn de L.L.Zamenhof kaj tuj konvinkiĝis pri la supereco de Esperanto super volapuko, instigante al la studado siajn gekolegojn.

Unu jaron poste aperis monata gazeto „Esperantisto”, kiu ĉe fino de la unua jaro de sia ekzistado havis 113 abonantojn kaj rapide iĝis efika ligilo inter diverslandaj esperantistoj. Ĝiaj plej multaj abonantoj estis el Rusio, teritorio de Pollando (i.a. Antoni Grabowski) kaj Francio (i.a. Louis de Beaufront). Tiun tempon markis multaj financaj malfacilaĵoj de la Esperanto-movado, kiujn helpis solvadi la helpo de L.L.Zamenhof kaj aliaj, ne ĉiam riĉaj esperantistoj. Naskiĝis novaj grupoj en Germanio, Svedio, Hispanio kaj en multaj rusaj urboj. L.L.Zamenhof publikigis en „Esperantisto” gramatikon kaj vortaron de „nova” lingvo, konstruita laŭ proponitaj ŝanĝoj. Post dufoja voĉdonado de abonantoj oni decidis tamen lasi senŝanĝe la malnovan formon de la lingvo. Oni decidis, ke Esperanto estos kulturata danke al verkado, kaj ĝia parola kaj skriba uzado.

En 1895 okazis la unua politika skandalo ligita kun Esperanto. Kaŭzis ĝin aperigo en „Esperantisto” de artikolo de la rusa verkisto Lew Tolstoj, kiu mem fariĝis fervora apoganto de la internacia lingvo. La teksto ne plaĉis al imperiestraj cenzuristoj kaj ili malpermesis daŭran eldonadon de la revuo.

---

<sup>1</sup> *Volapuko - volapük*, la internacia lingvo kreita de Johann Martin Schleyer.

Kelkajn monatojn poste en sveda urbo Upsalo (Uppsala), loka Esperanto-grupo komencis eldonadon de nova gazeto - „Lingvo Internacia”. Ĝi estis iniciatita de universitatano Valdemar Langlet - unu el la unuaj, kiuj entreprenis eksterlandajn vojaĝojn per Esperanto. La gazeto aperadis en Svedio, kaj poste en Hungario kaj Francio, ĝis komenco de la unua mondmilito. En la lastaj sep jaroj de sia ekzistado, la gazeto estis tre konservativa, batalis kontraŭ ĉiu ŝanĝo en la lingvo kaj toleris nur ĝian naturan evoluadon.

Unuaj internaciaj vojaĝoj de kelkaj rusaj kaj svedaj esperantistoj vekis grandegan intereson de esperantista kaj eskstermovada medioj. Ili pruvis, ke la lingvo bonege taŭgas por senpera parola komunikado kaj interkompreno. Instigitaj de tiu ĉi sensacia afero, la francaj esperantistoj el Havro (Le Havre) aranĝis en 1903 kunvenon, invitante kelkajn alilandajn esperantistojn. Unu jaron poste simila renkonto okazis inter anglaj kaj francaj esperantistoj en Kalezo (Calais) kaj Dovro (Dover). Ĝuste danke al tiuj sukcesaj kunvenoj naskiĝis la ideo de internaciaj Esperanto-kongresoj.

La unuan tiuspecan renkontiĝon iniciatis André Michaux - franca advokato el Bulonjo ĉe Maro (Boulogne sur Mer). Ĝi okazis en aŭgusto de 1905. Partoprenis ĝin preskaŭ 700 esperantistoj, entuziasmitaj de la etoso. Dum la kongreso malaperis timo kontraŭ la hipotezo, ke Esperanto ne estos sufiĉe komprenebla parole kaj ekzistos tro grandaj diferencoj en prononcado de diverslandanoj. Post multaj diskutoj kaj paroladoj oni okazigis eĉ teatran vesperon, dum kiu estis prezentita la komedio de Molière „Edziĝo kontraŭvola”. Dum la unua kongreso sian definitivan formon ricevis ankaŭ la esperantista flago - laŭ la projekto de A.Michaux verdkolora, kun blanka kvadrato kaj kvinpinta verda stelo en angulo. Por Esperanto-movado la unua kongreso havis gravegan signifon. Oni decidis pri fondo de Lingva Komitato kaj Organiza Komitato, kiuj konforme zorgis pri evoluo de la lingvo kaj organizado de universalaj kongresoj. La plej grava tamen montriĝis „Deklaracio pri Esperanto” - nomata ankaŭ la „Bulonja Deklaracio”, en kiu

oni priskribis ideologiajn bazojn de la movado, aktualajn ankaŭ nuntempe. Jen ĝia kompleta teksto:

„Ĉar pri la esenco de la Esperantismo multaj havas tre malveran ideon, tial ni subskribintoj, reprezentantoj de la Esperantismo en diversaj landoj de la mondo, kunvenintaj al la Internacia Kongreso Esperantista en Boulogne sur Mer, trovis necesa, laŭ la propono de la aŭtoro de la lingvo Esperanto, doni sekvantan klarigon:

1. La Esperantismo estas penado disvastiĝi en la tuta mondo la uzadon de la lingvo neŭtrale homa, kiu «ne entrudante sin en la intiman vivon de la popoloj kaj neniom celante elpuŝi la ekzistantajn lingvojn naciajn», donus al la homoj de malsamaj nacioj la eblon kompreniĝadi inter si, kiu povus servi kiel paciga lingvo de publikaj institucioj en tiuj landoj, kie diversaj nacioj batalas inter si pri la lingvo, kaj en kiu povus esti publikigataj tiuj verkoj, kiuj havas egalan intereson por ĉiuj popoloj. Ĉiu alia ideo aŭ espero, kiun tiu aŭ alia esperantisto ligas kun la Esperantismo, estos lia afero pure privata, por kiu la Esperantismo ne respondas.

2. Ĉar en la nuna tempo neniu esploranto en la tuta mondo jam dubas pri tio, ke Lingvo Internacia povas esti nur lingvo arta, kaj ĉar el ĉiuj multegaj provoj faritaj en la daŭro de la lastaj jarcentoj, ĉiuj prezentas nur teoriajn projektojn, kaj la lingvo efektive finita, ĉiuflanke elprovita, perfekte vivipova kaj en ĉiuj rilatoj plej taŭga montriĝis nur unu sola lingvo, Esperanto, tial la amikoj de la ideo de Lingvo Internacia, konsciante, ke teoria disputado kondukos al nenio kaj ke la celo povas esti atingita nur per laborado praktika, jam delonge ĉiuj grupiĝis ĉirkaŭ la sola lingvo Esperanto kaj laboras por ĝia disvastigado kaj riĉigado de ĝia literaturo.

3. Ĉar la aŭtoro de la lingvo Esperanto tuj en la komenco rifuzis unu fojon por ĉiam ĉiujn personajn rajtojn kaj privilegiojn rilate tiun tingvon, tial Esperanto estas «nenies propraĵo», nek en rilato materia, nek en rilato morala. Materiala mastro de tiu ĉi lingvo estas la tuta mondo, kaj ĉiu deziranto povas eldonadi en aŭ pri tiu ĉi lingvo ĉiajn verkojn kiajn li deziras kaj uzadi la

lingvon por ĉiaj eblaj celoj, kiel spiritaj mastroj de tiu lingvo estos ĉiam rigardataj tiuj personoj, kiuj de la mondo esperantista estos konfesataj kiel la plej bonaj kaj la plej talentaj verkistoj en tiu ĉi lingvo.

4. Esperanto havas neniu personan leĝdonanton kaj dependas de neniu aparta homo. Ĉiuj opinioj kaj verkoj de la kreinto de Esperanto havas, simile al la opinioj kaj verkoj de ĉiu alia esperantisto, karakteron absolute privatan kaj por neniu devigan. La sola unu fojon por ĉiam deviga por ĉiuj esperantistoj fundamento de la lingvo Esperanto estas la verketo «Fundamento de Esperanto», en kiu neniu havas la rajton fari ŝanĝon. Se iu dekliniĝas de la reguloj kaj modeloj donitaj en la dirita verko, li neniam povas pravigi sin per la vortoj „tiel deziras kaj konsilas aŭtoro de Esperanto». Ĉiun ideon, kiu ne povas esti oportune esprimata per tiu materialo, kiu troviĝas en la «Fundamento de Esperanto», ĉiu esperantisto havas la rajton esprimi en tia maniero, kiun li trovas la plej ĝusta, tiel same, kiel estas farate en ĉiu alia lingvo. Sed pro plena unueco de la lingvo al ĉiuj esperantistoj estas rekomendate imitadi kiel eble plej multe tiun stilon, kiu troviĝas en la verkoj de la kreinto de Esperanto, kiu la plej multe laboris por kaj en Esperanto kaj ta plej bone konas ĝian spiriton.

5. Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto tute egale, por kiaj celoj li ĝin uzas. Apartenado al ia aktiva societo esperantista por ĉiu esperantisto estas rekomendinda, sed ne deviga.”<sup>1</sup>

Okaze de la 25-a datreveno de Esperanto, la universala kongreso okazis en Krakovo (Kraków). Tie LL.Zamenhof definitive rezignis pri sia oficiala rolo en la Esperanto-movado. Dum la unua mondmilito la Esperanto-movado spertis multajn problemojn. Tamen nepre substrekinda estas la agado en Svislando de Hector Hodler - la kreinto de Universala Esperanto-Asocio (UEA), kiu ne nur gvidis agadon de la organizaĵo kaj redaktadis la revuon „Esperanto”, sed ankaŭ aranĝis servon por

<sup>1</sup> L.L.Zamenhof: *Fundamento de ...*, op.cit., pp.33-37.

helpi al homoj disigitaj de ilia familio. En militkaptitejoj, la Tutmonda Komitato de YMCA<sup>1</sup> disdonis milojn da Esperanto-lernolibretoj inter diverslingvaj milit-kaptitoj, kio donis al la Esperanto-movado tute novan karakteron. La intermilita periodo pruvis al ekstermovadaj observantoj, ke Esperanto transvivis provon de tempo. Malgraŭ forpaso de multaj pioniroj de la movado, okazis pluraj sukcesaj kongresoj, kiuj havis gravan politikan signifon. Propagandado pri Esperanto ŝanĝis sian aspekton kaj celis precipe progreson en la utiligado de Esperanto, ĉefe rilate al fakaj aferoj.

En 1922 Edmond Privat iniciatis en Ĝenevo (Genève) ĉe Ligo de Nacioj, la unuan fakan konferencon pri instruado de Esperanto. Sekvis ĝin Komerca kaj Turisma Konferenco en Venecio (Venezia) preparita de UEA kaj Itala Komerca Ĉambro en Ĝenevo, kaj multaj similaj aranĝoj. Samtempe komenciĝis la triumfa vojo de rektmetoda Esperanto-instruado, kies pioniro estis hungara pastro Andreo Cseh. Oni kreis Sennaciecan Asocion Tutmondan kaj Somerajn Universitatojn. Esperanto aperadis en variaj formoj sur diversaj komunikiloj: poŝtmarkoj, poŝtkartoj, glumarkoj kaj paneloj uzataj en trajnoj. En 1925 el Budapeŝto (Budapest) estis disaŭdigita la unua programo en Esperanto en radio. Turismaj vojaĝoficejoj amase eldonadis reklamfoliojn, afiŝojn kaj aliajn propagandilojn uzante la internacian lingvon. Pri ĝia praktika uzebleco kaj efikeco, precipe kiel rimedo de integrado de nacioj super politikaj dividoj, bonege konsciis dezirantoj de monda paco kaj ekvilibro, kiuj proponis, ke ĝi iĝu komuna lingvo de Ligo de Nacioj, aŭ de poŝto.

La unua pruvo de praktika efikeco de Esperanto kiel lingvo uzebla en diversaj socioj, estis disvastigo en la tridekaj kaj kvardekaj jaroj de la XX-a jarcento de libro de Eugène Aisberg „Mi komprenas fine la radion!” Ĝi estis verkita en 1934 en Esperanto, kaj poste tradukita en 21 lingvojn.<sup>2</sup>

---

<sup>1</sup> YMCA - ang. Young Men's Christian Association - Junulara Vira Kristana Asocio.

<sup>2</sup> E.Aisberg: *Mi komprenas fine la radion!* Budapest 1934.

La periodon de 1934-1946 en la Esperanto-movado markis ĝenerala nervozeco, ligita kun politikaj kaj militaj konfliktoj en la mondo. Kreintoj de totalitarismaj politiksistemoj plurfoje provis detrui Esperanto-movadon, i.a. per negativa propagando kaj ankaŭ per fizika forigo de esperantistoj kaj de familio de L.L.Zamenhof. Komenciĝis planita persekutado de esperantistoj fare de nazioj kaj komunistoj, ekmankis kontaktoj, revuoj, eldonaĵoj, kaj en multaj landoj la organizita esperantista agado tute kolapsis. Multaj esperantistoj fariĝis mortviktimoj en bataloj, koncentrejoj kaj ekzekutoj.<sup>1</sup> Fortan krizon travivadis UEA kaj laboristaj Esperanto-organizaĵoj. Post la dua mondmilito komenciĝis periodo de repaciĝo kaj rekonstruado de la Esperanto-movado. Reviviĝis ĉefaj organizaĵoj kaj universalaj kongresoj, kaj Esperanto-kulturo pliriĉiĝis danke al firma funkciado de Internacia Somera Universitato, belartaj kaj oratoraj konkursoj. En la kvindekaj jaroj komenciĝis intensa agado de UEA kaj ĝia ĝenerala sekretario Ivo Lapenna por krei firmajn rilatojn kun UNESKO - la ĉefa oficiala kultura organizo de la mondo. Tiun ĉi agadon kronis en 1954 „Rezolucio IV.1.4.422-4224 de UNESKO”, en kiu por la unua fojo en tiom prestiĝaj cirkonstancoj oni oficiale parolis pri Esperanto:

„IV.1.4.422 *La Ĝenerala Konferenco, diskutinte la Raporton de la Ĝenerala Direktoro pri la Internacia Peticio favora al Esperanto;*

*IV.1.4.4221 Notas la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo;*

*IV.1.4.4222 Rekonas, ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de Unesko;*

*IV.1.4.4223 Notas, ke pluraj Ŝtatoj-Membroj informis pri sia preteco enkonduki aŭ ampleksigi la instruadon de Esperanto en siaj lernejoj aŭ superaj edukaj institucioj, kaj petas tiujn*

---

<sup>1</sup> U.Lins U.: *La danĝera lingvo. Studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto.* Gerlingen 1988.



*Ŝtatojn-Membrojn informadi la Ĝeneralan Direktoron pri la rezultoj atingitaj sur tiu kampo;*

*IV.1.4.4224 Komisias la Ĝeneralan Direktoron sekvi la kurantan evoluon en la uzado de Esperanto en scienco, edukado kaj kulturo, kaj tiucele kunlabori kun Universala Esperanto-Asocio en aferoj koncernantaj ambaŭ organizaĵojn.*

**Ĝenerala Konferenco de Unesko, Montevideo, 1954”<sup>1</sup>.**

UNESKO aperigis siajn afiŝojn pri homaj rajtoj kun Esperanto-tekstoj, kaj en sia oficiala organo ofte publikigis favorajn artikolojn kaj sciigojn pri la Esperanto-movado. Esperanto ankoraŭfoje aperis en la dokumentaro de tiu ĉi organizo en la rezolucio de 1985 pri festado de la centjariĝo de Esperanto:

#### **„La Ĝenerala Konferenco**

*Konsiderante, ke ĝi en sia sesio de 1954, okazinta en Montevideo, per rezolucio IV.1.4.422-4224 notis la rezultojn, atingitajn pere de la internacia lingvo Esperanto sur la kampo de internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj reciproka kompreniĝo inter la popoloj de la mondo, kaj rekonas, ke tiuj kongruas kun la celoj kaj idealoj de Unesko,*

*Memorigante, ke Esperanto intertempe faris konsiderindan progreson kiel ilo de kompreniĝo inter popoloj kaj kulturoj de malsamaj landoj, penetrante en la plimulton de la regionoj de la mondo kaj ia plimulton de ia homaj agadoj,*

*Rekonante la grandajn eblecojn, kiujn Esperanto prezentas por la internacia kompreniĝo kaj komunikado inter popoloj de malsamaj naciecoj,*

*Notante la tre gravan kontribuon de la Esperanto-movado, kaj precipe de Universala Esperanto-Asocio, al la disvastigado de informoj pri la agado de Unesko, same kiel ĝian partoprenon en tiu agado,*

---

<sup>1</sup> Universala Esperanto-Asocio: *Jarlibro 2010*. Rotterdam 2010, p.8.

*Konscia pri la fakto, ke en 1987 oni festos la centjariĝon de la ekzisto de Esperanto,*

1. **Gratulas** la Esperanto-movadon okaze de ĝia centa datreveno;

2. **Petas** la Ĝeneralan Direktoron daŭre sekvi kun atento la evoluon de Esperanto kiel rimedo por plibonigi la komprenon inter malsamaj nacioj kaj kulturoj;

3. **Invitas** la Ŝtatojn-Membrojn marki la centjariĝon de Esperanto per konvenaj aranĝoj, deklaroj, eldono de specialaj poŝtmarkoj kaj simile, kaj instigi al la enkonduko de studprogramo pri la lingvo-problemo kaj pri Esperanto en siaj lernejoj kaj siaj institucioj de supera edukado;

4. **Rekomendas** al la internaciaj neregistaraj organizaĵoj aliĝi al la festado de la centjariĝo de Esperanto kaj pristudi la eblecon utiligi Esperanton kiel rimedon por disvastigi inter siaj membroj ĉiajn informojn, inkluzive de tiuj pri la agado de Unesko.

**Ĝenerala Konferenco de Unesko, Sofio, 1985”<sup>1</sup>.**

Parolante pri la kunagado de UEA kaj UNESKO necesas menciigi la Centron de Esploro kaj Dokumentado, kiu naskiĝis en la komenco de la kvindekaj jaroj, kiam UEA povis kandidatiĝi por Nobel-Pacpremio. Dum multaj jaroj de sia agado la Centro kolektis valoregan materialon, kiu signas ĉiun paŝon de la Esperanto-movado. Inter la 25-a de julio kaj la 1-a de aŭgusto 1987 en Varsovio (Warszawa), okazis la jubilea universala kongreso, kiun partoprenis ĉirkaŭ ses mil esperantistoj. Laŭ „Libro de rekordoj de Guinness” el la jaro 2004, en la mondo estas ĉirkaŭ 6 milionoj de esperantistoj.

Nuntempa Esperanto-movado evoluas sur multaj kampoj - ankaŭ en populara kulturo. Nombro de titoloj do libroj originale verkitaj en Esperanto superas foje nombron de similaj naciaj literaturoj. Danke al Esperanto servanta kiel lingvo-ponto, oni tradukis plurajn verkojn - ekz. en aziajn lingvojn oni tradukis

---

<sup>1</sup> Universala Esperanto-Asocio: *Jarlibro...*, op.cit., pp.8-9.

tiamaniere polan nacian epopeon „Sinjoro Tadeo” de Adam Mickiewicz.<sup>1</sup> En Esperanto aperas reta eldono de „Le Monde Diplomatique” - unu el la plej prestiĝaj francaj revuoj pri sociopolitikaj kaj ekonomiaj temoj.<sup>2</sup> Unu el la plej popularaj nuntempe lernolibroj de Esperanto estas plurfoje reeldonita „Saluton! Esperanto aŭtodidakte” de Audrey Childs-Mee.<sup>3</sup>

Dekkelkaj radiostacioj en la mondo disaŭdigas ĉiutage diversajn elsendojn en Esperanto, pruvante, ke ĝi estas lingvo moderna kaj vere utila en la „tutmonda vilaĝo”. La plej gravaj kaj popularaj estas la interretaj elsendoj de Esperanto-redakcioj de Pola Radio el Varsovio kaj de Ĉina Radio Internacia. Krome, Esperanto aŭdeblas en: Radio 3.ZZZ (Aŭstralio), Radio CBN Clube de Sorocaba (Brazilo), Radio Havano (Kubo), Radio Kanalsud (Francio), Radio Libertaine (Francio), Radio Onda Interior (Kanariaj Insuloj), Radio Rio de Janeiro (Brazilo), Radio Vasteras (Svedio), Radio Vaticana (Vatikano) kaj pluraj aliaj stacioj.<sup>4</sup>

Pli kaj pli populara iĝas la uzado de Esperanto en komputilaj retoj, el kiuj la plej vasta estas Interreto. Krom centoj da personoj kontaktiĝantaj danke al elektronika poŝto, ekzistas jam bone organizitaj komputilaj diskut- kaj babilforumoj, koresponda servo, senpagaj elŝuteblaj lingvaj kursoj, adresaroj kaj arkivoj. Danke al Esperanto naskiĝis unika, riĉa kaj originala reta kulturo - i.a. danke al senpagaj interretaj kursoj).<sup>5</sup> Eĉ la famaj Wikipedia,

---

<sup>1</sup> A.Mickiewicz: *Sinjoro Tadeo*. Varsovio 1955. - Pli vaste: W.Auld: *The international languages as a medium for literary translation*. London 1959; J.-R.Ladmiral: *Traduction et communication interculturelle*. [en:] L.Colin, B.Müller (org.): *La Pédagogie des rencontres interculturelles*. Paris 1996, pp.89-100.

<sup>2</sup> eo.monedediplo.com. (25.10.2010)

<sup>3</sup> A.Childs-Mee: *Saluton! Esperanto Aŭtodidakte. Internacia Lernolibro de la Internacia Lingvo*. Antverpeno 1983.

<sup>4</sup> Frekfenoj kaj aktualaj informoj pri Esperanto-elsendoj, aperas en Esperanto-revuoj kaj en la retpaĝo de Amikaro de Esperanto en Radio: [www.bongo.ne.jp/~teg/radio/esperanto.htm](http://www.bongo.ne.jp/~teg/radio/esperanto.htm). (25.10.2010)

<sup>5</sup> Ekz.: [www.kurso.com.br](http://www.kurso.com.br). (25.10.2010)

serĉilo Google kaj pluraj aliaj retejoj havas sian Esperanto-version.<sup>1</sup>

En la tuta mondo eblas renkonti stratpanelojn, memoraĵojn kaj monumentojn ligitajn kun Esperanto kaj L.L.Zamenhof. Paradoxse, ekzemple en Brazilo la homo, al kiu oni dediĉis la plej gradan nombron da monumentoj estas ĝuste la kreinto de la internacia lingvo. Kun lia portreto kaj diversaj simboloj ligitaj kun Esperanto, daŭre aperas filatelaĵoj kaj numismataĵoj. En 1991 aperis 416-paĝa, verkita de Richard Hirsch „Katalogo de la Esperanto-filatelo”.<sup>2</sup> Tekstoj en Esperanto flugas eĉ en spaco danke al kosmoŝipoj de NASA. Pri registrado de la tiel nomataj ZEO-j (Zamenhof/Esperanto-Objektoj - stratoj, placoj, monumentoj k.a.) UEA komisiis Hugo Röllinger, Raymond Boré, kaj hodiaŭ Robert Kamiński. Kompilita de ili, daŭre aktualigata katalogo priskribas ĉirkaŭ 1500 ZEO-jn en ĉirkaŭ 60 landoj.<sup>3</sup> En la Interancia Esperanto-Muzeo en Vieno (Wien) kaj foje sur fotoj publikigataj en Esperanto-revuoj, oni povas rimarki diversajn familiarajn objektojn uzatajn en ĉiutaga vivo, kies markoj estas ĉerpitaj ĝuste el esperantista vortaro, ekz.: sapo, alumetoj kaj la mondfama trinkaĵo „Mirinda”.

Danke al peno de esperantistoj Esperanto estas la sola artefarita lingvo uzata de papo dum la beno *Urbi et Orbi*. En la fama parko „Eurodisney” en Parizo (Paris) oni lanĉis projekton de uzado de Esperanto kiel de unu el lingvoj parolataj de gvidantoj de turistoj. Belga esperantisto Germain Pirlot - instruisto en mezgranda lernejo en Ostendo (Oostende) inventis kaj sugestis la nomon „euro” de la ĉefa monunuo de Eŭropa Unio...

Similajn ekzemplojn pri partopreno de esperantistoj en monda civilizo eblus citi plu longtempe.

---

<sup>1</sup> Informoj pri Esperanto-paĝoj kaj novaĵoj en Interreto aperas en: [uea.org/rete](http://uea.org/rete) (25.10.2010) kaj [esperanto.net/info/index\\_eo.php](http://esperanto.net/info/index_eo.php). (25.10.2010)

<sup>2</sup> R.Hirsch: *Katalogo de la Esperanto-filatelo*. Bad Hersfeld 1990.

<sup>3</sup> Ĉiam aktualigata listo troviĝas en: [eo.wikipedia.org/wiki/Listo\\_de\\_ZEO-j](http://eo.wikipedia.org/wiki/Listo_de_ZEO-j). (25.10.2010) Pli vaste: H.Röllinger: *Monumente pri Esperanto*. Rotterdam 1997.

### 3.3. Esperanto kaj interkultura edukado

Por malkovri valorojn de Esperanto kiel la lingvo de interkultura edukado, necesas menciigi ideologiajn elementojn en ĝia historio, ligitajn kun personaj spertoj de la kreinto.

Laŭ L.L.Zamenhof, la kreita de li lingvo devintus servi kiel ilo por konstitui novajn formojn de internaciaj rilatoj, bazantajn sur strebo de homaro al paca kunvivado en unu granda familio, ligata kun lingva, kultura kaj religia pluralismo.<sup>1</sup> Unu el originoj de tiu ĉi idealo estis la juda nacieco de L.L.Zamenhof kaj liaj malbonaj spertoj pro antisemitismo. Dum pogromoj de judoj en Rusio, en la periodo de 1881-1882 jaroj, L.L.Zamenhof studadis en Moskva Universitato kaj laboris kiel korespondanto de peterburga ĵurnalo *Tagiĝo*. Li priskribadis i.a. kontraŭjudajn tumultojn en varsovia kvartalo Nalewki.<sup>2</sup> En letero el 1905 jaro, L.L.Zamenhof substrekis: „(...) *se mi ne estus «hebreo el getto», «la ideo pri la unuigo de la homaro» ne okupus min tiel obstine kaj ke neniu tiel forte kiel judo povas senti la neceson de «lingvo sennacia, neŭtrale homa».*”<sup>3</sup> Tiu ĉi aserto estas alegoria, ĉar L.L.Zamenhof neniam loĝis en getto, sed estante viktimo de antisemitismo li rigardis ĝin kiel esprimon de simbola apartigo. Interesiĝante pri la ideo de sionismo (kvankam li mem neniam aliĝis al la movado kaj ne kunlaboradis kun ĝi), en la periodo de tagiĝo de koncepto de la internacia lingvo li esperis, ke kreo de rimedo de interkompreno de kontraŭuloj, povas gvidi al reciproka konatiĝo kaj proksimiĝo - eĉ se ne politika aŭ kultura, ja almenaŭ en homa perspektivo. Li esperis pri unuigo de hebrea diasporo, malaperigo de malamikaj sintenoj kaj pri kreo el lingvo la rimedon de komunikado de judoj kun aliaj popoloj.<sup>4</sup>

<sup>1</sup> W.Żelazny: *Doktrino de Zamenhof. Ĉirkaŭe de la penso de Zamenhof kaj ties percepto*. Warszawa 1983, p.103.

<sup>2</sup> N.Z.Maimon: *La kaŝita vivo de Zamenhof. Originalaj studoj*. Tokio 1978, pp.86-88.

<sup>3</sup> Laŭ: U.Lins: *La danĝera...*, op.cit., p.16.

<sup>4</sup> Pli vaste: N.Z.Maimon: *La kaŝita...*, op.cit., pp.57-70 kaj 161-194.

Kiam Esperanto iĝis pli kaj pli populara, kaj ĝiaj ŝatantoj komencis kreadi unikan socian movadon, la ideologia koncepto de L.L.Zamenhof pri komuna lingvo evoluis kaj iĝis pli universaleca. Li volis, ke la lingvo fariĝu propraĵo ne nur de minoritatoj, sed ankaŭ de la plimulto. Li opiniis necesa lingvon, kiu de unu flanko ne estus ekskluzive propraĵo de iu aparta nacio kaj de dua flanko povus esti libere uzata de popoloj senlingvaj kaj subpremataj. Tio signifas, ke lia koncepto de la internacia lingvo tuŝis ne nur neŭtralecon, sed ankaŭ planon de evoluiga moralalo. Temis pri kreo de iu subtila ponto, per kiu diversigitaj laŭ rasoj, religioj, naciecoj kaj ekonomipolitikaj sistemoj homoj povus unuiĝi en frata kunvivado.

En marto 1906 L.L.Zamenhof aperigis la broŝuron „Homaranismo”, en kiu li detale priskribis sian koncepton de la ideo, laŭ kiu ĉiuj popoloj kaj religioj, ne rezignante pri siaj specifaj trajtoj, renkontiĝu sur neŭtrale homa fundamento, laŭ principoj de reciproka frateco, egaleco kaj justeco.<sup>1</sup> Ĝi tamen ne plaĉis al tutmonda esperantistaro, ĉar gvidis al danĝero, ke la Esperanto-movado povus akiri trajtojn de iu religia (kvankam teorie neŭtrala) mistikismo. Tiun penson L.L.Zamenhof anstataŭis per koncepto de la interna ideo postulante, ke esperantistoj uzadu la lingvon ne nur surbaze de la penso pri ĝia praktika utileco, sed la penso pri frateco kaj justeco inter ĉiuj popoloj.

Dum la unua Universala Kongreso de Esperanto en Bulonjo ĉe Maro, la kreinto de Esperanto diris: „*Ofte kunvenas personoj de malsamaj nacioj kaj komprenas unu la alian; sed kia grandega diferenco estas inter ilia reciproka kompreniĝado kaj la nia!... Tie la membro de unu nacio humiliĝas antaŭ la membro de alia nacio, parolas lian lingvon, hontigante la sian, balbutas kaj ruĝiĝas, kaj sentas sin ĝenata antaŭ sia kunparolanto, dum tiu ĉi lasta sentas sin forta kaj fiera; en nia kunveno ne ekzistas*

<sup>1</sup> L.L.Zamenhof: *Homaranismo*. Petersburg 1906. - Pli vaste: D.Pereira de Souza: *Homaranismo. La interna ideo*. Rio de Janeiro 1994; B.A.Zozulja: *Soci-polikitaj konceptoj de L.L.Zamenhof*. Movado, Rostov-Don 1997.

*nacioj fortaj kaj malfortaj, privilegiitaj kaj senprivilegiitaj, neniu humiliĝas, neniu sin ĝenas; ni ĉiuj estas plene egalrajtaj; ni ĉiuj sentas nin kiel membroj de unu nacio, kiel membroj de unu familio; kaj la unuan fojon en la homa historio ni, membroj de la plej malsamaj popoloj, staras unu apud alia ne kiel fremduloj, ne kiel konkurantoj, sed kiel fratoj, kiuj, ne altrudante unu al alia sian lingvon, komprenas sin reciproke, ne suspektas unu alian pro mallumo ilin dividanta, amas sin reciproke kaj premas al si reciproke la manojn, ne hipokrite kiel alinaciano al alinaciano, sed sincere, kiel homo al homo. Ni konsciu bone la tutan gravecon de la hodiaŭa tago, ĉar hodiaŭ, inter la gastamaj muroj de Bulonjo-sur-Mar, kunvenis ne Francoj kun Angloj, ne Rusoj kun Poloj, sed homoj kun homoj...”<sup>1</sup>*

La ĉi subaj ideoj, malgraŭ paso de pli ol unu jarcento, daŭre estas aktualaj kaj sonas kiel fragmento de programo de interkultura edukado. Interkulturecan karakteron de Esperanto kaj de nuntempa Esperanto-movado substrekis partoprenantoj de la 95-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazis en Havano en julio 2010. Ili akceptis jenan rezolucion:

*„Konsiderante ke Unuiĝintaj Nacioj deklaris la jaron 2010 jaro de interproksimigo de kulturoj, konstatas*

- *ke la diverseco de kulturoj en la mondo grave kontribuas al la riĉeco de la homaro,*
- *ke jam 123 jaroj Esperanto kiel naŭtrala lingvo helpas konstrui pontojn inter popoloj kaj kulturoj, kaj*
- *ke la Universalaj Kongresoj de Esperanto, kunigante homojn el plej diversaj landoj tra la mondo, mem atestas tiun kapablon konstrui pontojn.*

*Deklaras la deziron de Esperanto-parolantoj kunagi kun Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko por stimuli komprenemon inter popoloj kaj samtempe protekti la identecon de ĉiuj homgrupoj, kaj*

<sup>1</sup> E.Privat: *Vivo de Zamenhof*. Leipzig 1923, pp.48-49.

*Invitas Unuiĝintajn Naciojn kaj Uneskon plene eluzi siajn rilatojn kun Universala Esperanto-Asocio por plej efike realigi siajn celojn.”<sup>1</sup>*

Pruvita plurfoje praktika utileco de Esperanto kiel internacia lingvo, permesas rigardi ĝin kiel efikan rimedon de interkultura edukado. Ĝi estas uzata de pluraj fakuloj (ekz. instruistoj, sciencistoj) okupiĝantaj pri kultura diverseco kaj interkultura edukado. Unu el tiuspecaj internaciaj iniciatoj estas la subvenciata i.a. de Eŭropa Unio projekto *Interkulturo*, en kiu kunlaboradas instruistoj kaj pedagogoj el pluraj landoj.<sup>2</sup>

Kompreneble tio ne signifas, ke baldaŭ Esperanto iĝos fremdlingvo mondvaste instruata en lernejoj, aŭ uzata por komunikado ekz. inter sciencistoj el diversaj landoj. Por tion atingi, necesus rompi negativajn stereotipojn pri universalaj lingvoj; necesus profundaj ŝanĝoj en edukpolitikoj de sinsekvaj landoj - ĉefe en sistemo klerigado de instruistoj kaj edukistoj; necesus konvinki pri tiu ĉi ideo gepatrojn, gelernantojn kaj aliajn eblajn uzantojn de la lingvo. Ĝis nun subtenado de instruado de naturaj lingvoj estas forte ligita kun interna aŭ eksterlanda politiko de kultura superado de certaj landoj kaj rezingi pri tio simple ne eblas. Plej verŝajne tamen ĝi restados longtempe grava elemento de memedukado kaj meminstruado, kaj en la sistemo de publika klerigado ĝi funkcios ĉefe danke al entuziasmo de esperantistoj, kiuj scias konvinki pri la valoro de ilia lingvo - kiel ekz. en Ĉinio.<sup>3</sup>

Serĉado de komuna lingvo - precipe en la medio de internaciaj kontaktoj kaj interŝanĝoj de grupoj de gelernantoj, studentoj, sciencistoj ktp., ofte okazas helpe de alternativaj komunikrimedoj, precipe neparolaj. Ekkonado de aliuloj kaj de iliaj kulturoj okazas pere de kontaktoj kun ilia muziko, plastaj

<sup>1</sup> G.Greatrex: *Jaro de interproksimigo de kulturoj: Ni spertiĝu pri interkulturaj rilatoj*. [en:] La Revuo Esperanto, No 9/2010, p.174.

<sup>2</sup> www.interkulturo.net. (25.10.2010)

<sup>3</sup> En la Universitato de Nankino (Nanĵing), kadre de projekto realigata de Dennis Keefe, oni preparas kursojn por studentoj, kiuj deziras utiligi Esperanton en propraj fakoj (medicino, komerco ktp.).



artaĵoj kaj multimedia arto. En tiuj ĉi rimedoj troviĝas grandega kvanto de universaleco. Tial do, emocia komunikado pere de ili, tute ne ŝajnas utopia, kaj tio helpas instigi al tiuspecaj kontaktoj. En nuntempa klerigado oni sukcese uzasadas modernajn teknologiojn de transmeto de sono kaj bildo, kio bonege pliriĉigas la jam uzatajn antaŭe metodojn, kiel tiun ĉi de Célestin Freinet.<sup>1</sup>

Sed jam la ligita kun ilia uzo fakto de kontaktoj kun fremda kulturo, kunestado, kuna travivado kaj empatia ekkunlaboro kun membroj de tiu ĉi kulturo dum diversflanka arta kreado, estas aloga perspektivo - precipe por la medioj, kies kulturoj grave diferencas kaj bezonas reciprokan klarigon. Simbola komunikado per bildo, sono kaj movo, ne plu vekas grandajn kontraŭstarojn - precipe en la globala vilaĝo, kies limoj senĉese plilarĝiĝas, danke al progresanta tekniko. Tiuj ĉi rimedoj estas nur la unua paŝo al vera dialogo kaj interkompreniĝo, kiujn povus antaŭenpuŝi nur klasika internacia, aŭ universala lingvo, ebliganta plenan komunikadon. - Kial ne uzi tiucele Esperanton? Ĝi jam estas preta, sufiĉe disvolviĝinta kaj ĝia pli ol centjara ekzisto pruvis ĝian utilecon.

<sup>1</sup> C.Frenet: *Œuvres pédagogiques*. Paris 1994.

## Bibliografio (cititaj verkoj)

1. Abdallah-Preteille M., Porcher L.: *Éducation et communication interculturelle*. Paris 1996.
2. Abdallah-Preteille M.: *Des enfants non-francophones à l'école: quel apprentissage? Quel français?* Paris 1982.
3. Abdallah-Preteille M.: *L'école face au défi pluraliste. Choc des Cultures*. Paris 1989.
4. Abdallah-Preteille M.: *L'éducation interculturelle*. Paris 1999.
5. Abdallah-Preteille M.: *La pédagogie interculturelle*. Paris 1986.
6. Abdallah-Preteille M.: *Vers une pédagogie interculturelle*. Paris 1996.
7. Abou S.: *L'identité culturelle. Relations interethniques et problèmes d'acculturation*. Paris 1981.
8. Adamczyk M.J., Ładyżyński A.: *Edukacja w krajach rozwiniętych*. Stalowa Wola 1999.
9. Aisberg E.: *Mi komprenas fine la radion!* Budapest 1934.
10. Amselle J.-L.: *Vers un multiculturalisme français. L'empire de coutume*. Paris 1996.
11. Augé M.: *Le sens des autres. Actualité de l'anthropologie*. Paris 1994.
12. Auld W.: *The international languages as a medium for literary translation*. London 1959.
13. Balicki M.: *Otoczenie kulturowe jako wyzwanie dla zarządzania w erze globalizacji*. [en:] J.Nikitorowicz, J.Halicki, J.Muszyńska (org.): *Międzygeneracyjna transmisja dziedzictwa kulturowego. Globalizm versus regionalizm*. Białystok 2003.
14. Banks J.A. (org.): *Handbook of Research on Multicultural Education*. New York 1995.
15. Banks J.A., McGee Banks A. (org.): *Multicultural education: issues and perspectives*. Boston 1993.
16. Banks J.A.: *Teaching Strategies for Ethnic Studies*. Boston 1997.
17. Bartz B.: *Idea wielokulturowego wychowania w nowoczesnych społeczeństwach*. Duisburg-Radom 1997.
18. Bastide H.: *Les Enfants d'immigrés et l'enseignement français*. Paris 1982.
19. Bauman Z.: *Socjologia*. Poznań 1996.
20. Bekemans L., Ortiz de Urbina Y.: *Étude sur l'éducation: l'enseignement des immigrés dans l'Union européenne*. Luxembourg 1997.
21. Benattig R.: *Insertion des immigrés et cohabitation interculturelle. Recueil et évaluation d'expériences*. Paris 1986.
22. Benedyktowicz Z.: *Portrety „obcego”. Od stereotypu do symbolu*. Kraków 2000.
23. Berger P.L., Luckmann T.: *Spoleczne tworzenie rzeczywistości*. Warszawa 1983.
24. Bokszański Z.: *Stereotypy a kultura*. Wrocław 1997.
25. Borzyszkowski J.: *Istota ruchu kaszubskiego i jej przemiany od połowy XIX wieku po współczesność*. Gdańsk 1982.
26. Boulton M.: *Zamenhof - Creator of Esperanto*. London 1980.
27. Bourquin J.-F.: *Violence, conflit et dialogue interculturel*. Strasbourg 2003.
28. Burney P.: *Les langues internationales*. Paris 1962.
29. Burszta J.: *Kultura ludowa - kultura narodowa. Szkice i rozprawy*. Warszawa 1973.
30. Burszta W.: *Antropologia kultury. Tematy, teorie, interpretacje*. Poznań 1998.
31. Burszta W.: *Antropologia kultury. Tematy, teorie, interpretacje*. Poznań 1998.
32. Burszta W.: *Wielokulturowość. Pytania pierwsze*. [en:] M.Kempny, A.Kapciak, S.Łodziński (org.): *U progu wielokulturowości. Nowe oblicza społeczeństwa polskiego*. Warszawa 1997.
33. Camilleri C.: *La communication dans la perspective interculturelle*. [en:] C.Camilleri, M.Cohen-Emerique (org.): *Chocs de cultures: Concepts et enjeux pratiques de l'interculturel*. Paris 1989.
34. Camilleri C.: *Les conditions de base de l'interculturel*. [en:] *Quaderni - Pour une société interculturelle*, No 6/1992.

35. Centassi R., Masson H.: *L'homme qui a défié Babel: Ludwik Lejzer Zamenhof*. Paris 1995.
36. Chałasiński J.: *Antagonizm polsko-niemiecki w osadzie fabrycznej „Kopalnia” na Górnym Śląsku*. Warszawa 1935.
37. Cherpillod A.: *Espéranto ou Babel: faut choisir*. Courgenard 1995.
38. Cherpillod A.: *L.L.Zamenhof - datoj, faktoj, lokoj*. Courgenard, 1997.
39. Childs-Mee A.: *Saluton! Esperanto Aŭtodidakte. Internacia Lernolibro de la Internacia Lingvo*. Antverpeno 1983.
40. Clanet C. (org.): *L'interculturel en éducation et sciences humaines*. Toulouse 1985, vol.1-2.
41. Clanet C.: *L'interculturel - introduction aux approches interculturelles en Éducation et en Sciences Humaines*. Toulouse 1993.
42. Cohen-Emerique M.: *Choc culturel et relations interculturelles dans la pratique des travailleurs sociaux. Formation par la méthode des incidents critiques*. [en:] *Cahiers de sociologie économique et culturelle*, No 2/1984.
43. Cohen-Emerique M.: *Connaissance d'autrui et processus d'attribution en situations interculturelles*. [en:] J.Retschitzky, M.Bossel-Lagos, P.Dasen (org.): *La recherche interculturelle*. Paris 1989, vol.1.
44. Cohen-Emerique M.: *L'approche interculturelle auprès des migrants*. [en:] G.Legault (org.): *L'intervention interculturelle*. Montréal-Paris 2000.
45. Couillard X.: *De la „culture d'origine” et de la „pedagogie interculturelle”*. Paris 1981.
46. Couturat L., Leau L.: *Histoire de la langue universelle*. Paris 1903.
47. Cuhe F.X.: *La revendication interculturelle. Colloque CLAP: Vers une société interculturelle*. Paris 1983.
48. Cylkowska-Nowak M.: *Edukacja obywatelska w szkołach Wielkiej Brytanii, Francji i Polski*. [en:] Z.Melosik, K.Przyszczykowski (org.): *Wychowanie obywatelskie. Studium teoretyczne, porównawcze i empiryczne*. Toruń-Poznań 1998.
49. Czykwin E., Misiejuk D.: *Dwujęzyczność i dwukulturowość w perspektywie psychopedagogicznej*. Białystok 2002.
50. Czykwin E.: *Fenomen trwałości uprzedzeń etniczno-religijnych*. [en:] J.Nikitorowicz (org.): *Edukacja międzykulturowa. W kręgu potrzeb, oczekiwań i stereotypów*. Białystok 1995.
51. Dąbrowski M.: *Swój/obcy/inny. Z problemów interferencji i komunikacji międzykulturowej*. Izabelin 2001.
52. Dasen P., Retschitzki J.: *Recherches interculturelles*. [en:] ARIC: *Socialisations et cultures. Actes du premier colloque de l'ARIC „Socialisations”*. Toulouse 1989.
53. Demorgon J.: *L'exploration interculturelle. Pour une pédagogie internationale*. Paris 1989.
54. Demorgon J.: *L'histoire interculturelle des sociétés*. Paris 1998.
55. Denoux P.: *La recherche interculturelle en France*. [en:] M.Abdallah-Prechteille, A.Thomas (org.): *Relations et apprentissages interculturels*. Paris 1995.
56. Dinello R., Perret-Clermont A.-N.: *Psycho-pédagogie interculturelle*. Fribourg 1987.
57. Dr.Esperanto: *Język międzynarodowy. Przedmowa i podręcznik kompletny*. Warszawa 1887.
58. Durand J.-C., Tunidis-Durand B.: *Quelle formation pour les enseignants?* [en:] *Cahiers de CERES*, No 2-3/1989.
59. eo.monediplo.com. (25.10.2010)
60. eo.wikipedia.org/wiki/Listo\_de\_ZEO-j (25.10.2010)
61. esperanto.net/info/index\_eo.php. (25.10.2010)
62. Filtzinger O.: *Interculturalité européenne dans le travail social*. [en:] J.Demorgon, E.M.Lipiansky (org.): *Guide de l'interculturel en formation*. Paris 1999.
63. Fitouri Ch.: *Biculturalisme, bilinguisme et éducation*. Neufchatel 1983.
64. Folger J.P., Scott Poole M., Stutman R.K.: *Konflikt i interakcja*. [en:] J.Stewart (org.): *Mosty zamiast murów. Podręcznik komunikacji interpersonalnej*. Warszawa 2003.
65. Frankiewicz W., Kossak-Główniewicz K.: *Edukacja regionalna i alternatywna. Założenia i program pierwszego Podyplomowego Studium Edukacji Regionalnej i Alternatywnej w Uniwersytecie Gdańskim*. [en:] T.Lewowicki, B.Grabowska (org.): *Spoleczności pogranicza, wielokulturowość, edukacja*. Cieszyn 1996.
66. Frenet C.: *Œuvres pédagogiques*. Paris 1994.
67. Gelpi E.: *Świadomość ziemską. Badania i kształcenie*. Kraków 1996.
68. Girard R.: *Kozioł ofiarny*. Łódź 1991.
69. Giroux H.A.: *Teoria krytyczna i racjonalność w edukacji obywatelskiej*. [en:] Z.Kwieciński, L.Witkowski (org.): *Spory o edukację. Dylematy i kontrowersje we współczesnych pedagogiach*. Warszawa 1993.
70. Golka M.: *Oblicza wielokulturowości*. [en:] M.Kempny, A.Kapciak, S.Łodziński (org.): *U progu wielokulturowości. Nowe oblicza społeczeństwa polskiego*. Warszawa 1997.
71. Golka M.: *Problemy i dylematy edukacji dla wielokulturowości*. [en:] J.Nikitorowicz, M.Sobecki, D.Misiejuk (org.): *Kultury tradycyjne a kultura globalna. Konteksty edukacji międzykulturowej*. Białystok 2001, vol.1.
72. Greatrex G.: *Jaro de interproksimigo de kulturoj: Ni spertiĝu pri interkulturaj rilatoj*. [en:] *La Revuo Esperanto*, n-ro 9/2010.
73. Grima Camilleri A.: *Comme c'est bizarre! L'utilisation d'anecdotes dans le développement de la compétence interculturelle*. Strasbourg 2002.
74. Groombridge B.: *Komunikowanie*. [en:] P.Lengrand (org.): *Obszary permanentnej samoedukacji*. Warszawa 1995.
75. Grzybowski P.P.: *Edukacja europejska - od wielokulturowości ku międzykulturowości*. Kraków 2007, 2008.
76. Grzybowski: *Edukacja międzykulturowa - konteksty. Od tożsamości po język międzynarodowy*. Kraków 2011
77. Grzybowski P.P.: *Edukacja międzykulturowa - przewodnik. Pojęcia, literatura, adresy*. Kraków 2008.
78. Grzybowski P.P.: *Interkultura edukado en Europo kaj la ideo de Internacia Lingvo*. [en:] *Almanako Lorenz*. Rio de Janeiro 2000.
79. Grzybowski P.P.: *Materialoj pri Esperanto-kulturo. Lingvo kaj Movado*. Bydgoszcz 1999.
80. Grzybowski P.P.: *Wspólny język - utopia, czy nadzieja edukacji międzykulturowej?* [en:] T.Lewowicki, J.Urban, A.Szczyпка-Rusz (org.): *Język, komunikacja i edukacja w społecznościach wielokulturowych*. Cieszyn - Warszawa 2004.
81. Guirardon V.: *Multiculturalisme et droit étrangers dans l'Union européenne*. [en:] R.Kastoryano (org.): *Quelle identité pour l'Europe?* Paris 1998.
82. Habermas J.: *Obywatelstwo a tożsamość narodowa. Rozważania nad przyszłością Europy*. Warszawa 1993.
83. Hannoun H.: *Les ghettos de l'école. Pour une éducation interculturelle*. Paris 1987.
84. Hermet G.: *Multiculturalisme et démocratie en Europe*. [en:] R.Kastoryano (org.): *Quelle identité pour l'Europe?* Paris 1998.
85. Hirsch R.: *Katalogo de la Esperanto-filatelio*. Bad Hersfeld 1990.
86. Jarymowicz M.: *Poznać siebie - zrozumieć innych*. [en:] J.Kozielecki (org.): *Humanistyka przełomu wieków*. Warszawa 1999.
87. Jurkowski M.: *Od wieży Babel do języka kosmitów*. Białystok 1986.
88. Karolczak-Biernacka B.: *Postawy młodzieży wobec mniejszości*. [en:] J.Nikitorowicz (org.): *Edukacja międzykulturowa. W kręgu potrzeb, oczekiwań i stereotypów*. Białystok 1995.
89. Kempny M.: *Wielokulturowość «ante portas»!* [en:] M.Kempny, A.Kapciak, S.Łodziński (org.): *U progu wielokulturowości. Nowe oblicza społeczeństwa polskiego*. Warszawa 1997.
90. Kennedy P.: *U progu XXI wieku (przymiarka do przyszłości)*. London 1994.
91. Klimowicz A. (org.): *Edukacja międzykulturowa. Poradnik dla nauczyciela*. Warszawa 2004.

92. Kłoskowska A.: *Kultury narodowe u korzeni*. Warszawa 1996.
93. Kłoskowska A.: *Otwarte i zamknięte postawy narodowe w sytuacji pogranicza*. [en:] *Kultura i Społeczeństwo*, No 3/1995.
94. Knight J., Smith R., Sachs J.: *Dekonstrukcja hegemonii. Polityka wielokulturowości i populistyczna reakcja*. [en:] S.J.Ball: *Foucault i edukacja. Dyscypliny i wiedza*. Kraków 1994.
95. Kökény L., Bleier V. (org.): *Enciklopedio de Esperanto*. Budapest 1986.
96. Komorowski Z.: *Pluralizm - wielokulturowość - diaspora*. [en:] *Kultura i Społeczeństwo*, No 2-3/1975.
97. Komorowski Z.: *Rozważania o wielokulturowości*. [en:] *Kultura i Społeczeństwo*, No 2/1974.
98. Korporowicz L.: *Wielokulturowość a międzykulturowość: od reakcji do interakcji*. [en:] M.Kempny, A.Kapciak, S.Łodziński (org.): *U progu wielokulturowości. Nowe oblicza społeczeństwa polskiego*. Warszawa 1997.
99. Kossak-Główniczewski K.: *Edukacja regionalna - pytania o realizację*. [en:] J.Brzeziński, L.Witkowski (org.): *Edukacja wobec zmiany społecznej*. Poznań-Toruń 1994.
100. Kossak-Główniczewski K.: *Edukacja regionalna, wielokulturowa i międzykulturowa a pytanie o „prywatne ojczyzny” - zarys problemu*. [en:] J.Nikitorowicz (org.): *Rodzina wobec wyzwań edukacji międzykulturowej*. Białystok 1997.
101. Kossak-Główniczewski K.: *Niektóre aspekty niezależnej edukacji regionalnej*. [en:] E.Rodziewicz, M.Szczepanska-Pustkowska (org.): *Od pedagogiki ku pedagogii*. Toruń 1993.
102. Kowalikowa J.: *Regionalizm w wymiarze społecznym, kulturowym i edukacyjnym*. [en:] M.T.Michalewska (org.): *Edukacja regionalna. Z historii, teorii i praktyki*. Kraków 1999.
103. Kowalski P.: *Granica. Próba uporządkowania kategorii antropologicznych*. [en:] T.Smolińska (org.): *Pogranicze jako problem kultury*. Opole 1994.
104. Krause A.: *Integracyjne złudzenia ponowoczesności (sytuacja ludzi niepełnosprawnych)*. Kraków 2000.
105. Kristeva J.: *Etrangers à nous-mêmes*. Paris 1988.
106. Krzysztofek K.: *Wielokulturowość, demokracja i rynek kultury*. [en:] A.Sadowski (org.): *Pogranicze. Studia społeczne*. Białystok 1999, vol.8.
107. Kubiak-Pokrzywniak D.: *Model obywatela w wybranych koncepcjach zachodniej myśli pedagogicznej*. [en:] Z.Melosik, K.Przyszczykowski (org.): *Wychowanie obywatelskie. Studium teoretyczne, porównawcze i empiryczne*. Toruń-Poznań 1998.
108. Kuczyński J.: *Młodość Europy i wieczność Polski*. Warszawa 1999.
109. Kurzępa J.: *Eksplanacyjna użyteczność teorii zróżnicowanych powiazań w odniesieniu do zachowań patologicznych na pograniczu*. [en:] T.Lewowicki, E.Ogrodzka-Mazur (org.): *W poszukiwaniu teorii przydatnych w badaniach międzykulturowych*. Cieszyn 2001.
110. Kwieciński Z.: *Edukacja do globalnego przetrwania*. [en:] K.Przeclawska (org.): *Tradycja i wyzwania*. Kraków 1996.
111. Kwieciński Z.: *Przedmowa*. [en:] Z.Kwieciński, B.Śliwerski (org.): *Pedagogika - podręcznik akademicki*. Warszawa 2003, vol.1.
112. Kwieciński Z.: *Socjopatologia edukacji*. Olecko 1995.
113. Ladmirał J.R., Lipiansky E.M.: *La communication interculturelle*. Paris 1989.
114. Ladmirał J.-R.: *Traduction et communication interculturelle*. [en:] L.Colin, B.Müller (org.): *La Pédagogie des rencontres interculturelles*. Paris 1996.
115. Leray C.: *Langues de culture et langue(s) d'enseignement(s) dans une éducation interculturelle*. [en:] L.Marmoz, M.Derrij (org.): *L'interculturel en questions. L'autre, la culture et l'éducation*. Paris 2001.
116. Lewowicki T.: *W poszukiwaniu modelu edukacji międzykulturowej*. [en:] T.Lewowicki (org.): *Edukacja międzykulturowa w Polsce i na świecie*. Katowice 2000.
117. Lewowicki T.: *Wprowadzenie*. [en:] T.Lewowicki (org.): *Edukacja międzykulturowa w Polsce i na świecie*. Katowice 2000.
118. Lins U.: *La danĝera lingvo. Studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto*. Gerlingen 1988.
119. Llaumett M.: *Les Jeunes d'origine étrangère. De la marginalisation à la participation*. Paris 1984.
120. Łobos A.: *Z dziejów śląskiego regionalizmu - Paweł Musioł*. [en:] M.T.Michalewska (org.): *Edukacja regionalna. Z historii, teorii i praktyki*. Kraków 1999.
121. Łoś-Nowak T.: *Euroregion jako czynnik kreujący tożsamość europejską. Przesłanki, możliwości zagrożenia*. [en:] W.Malendowski, M.Szczepaniak (org.): *Euroregiony - mosty do Europy bez granic*. Warszawa 2000.
122. Machaj I.: *Pogranicze*. [en:] Z.Bokszański (org.): *Encyklopedia socjologii*. Warszawa 1998, vol.3.
123. Maimon N.Z.: *La kaŝita vivo de Zamenhof. Originalaj studoj*. Tokio 1978.
124. Malewska H. (org.): *Crise d'identité et déviance chez les jeunes immigrants*. Paris 1982.
125. Malewska H., Cachon C.: *Le travail social et les enfants de migrants. Racisme et identité, recherche-action*. Paris 1988.
126. Malewska-Peyre H.: *Les enfants de migrants et l'école*. Grenoble 1984.
127. Martinelli S., Taylor M. (org.): *Uczenie się międzykulturowe. Pakiet szkoleniowy No4*. Strasbourg 2000.
128. Mauviel M.: *La communication interculturelle - constitution d'une nouvelle discipline. Colloque UNESCO*. [en:] *Phénomènes d'acculturation et de déculturation dans le monde contemporain*, No 2/1980.
129. Mauviel M.: *Qu'appelle-t-on études interculturelles en sciences humaines et en sciences de l'éducation? Esquisse d'un état de la question*. [en:] C.Clanet (org.): *L'interculturel en éducation et en sciences humaines*. Toulouse 1985, vol.1.
130. Mauviel M.: *Vers une solution éducative à l'ethnocentrisme, la communication interculturelle*. [en:] *Recherche, Pédagogie, Culture*, No 1/1980.
131. McLaren P.: *Critical Pedagogy, Multiculturalism and the Politics of Risk and Resistance. A Reponse to Kelly and Portelli*. [en:] *Journal of Education*, No 3/1991.
132. Melosik Z.: *Obywatelstwo, czas (historia) i przestrzeń (geografia)*. [en:] Z.Melosik, K.Przyszczykowski (org.): *Wychowanie obywatelskie. Studium teoretyczne, porównawcze i empiryczne*. Toruń-Poznań 1998.
133. Melosik Z.: *Wychowanie obywatelskie, nowoczesność, ponowoczesność (próba konfrontacji)*. [en:] Z.Melosik, Przyszczykowski K. (org.): *Wychowanie obywatelskie. Studium teoretyczne, porównawcze i empiryczne*. Toruń-Poznań 1998.
134. Mialaret G.: *La multiculturalité et l'éducation au XXI siècle*. [en:] L.Marmoz, M.Derrij (org.): *L'interculturel en questions. L'autre, la culture et l'éducation*. Paris 2001.
135. Michalewska M.T. (org.): *Edukacja regionalna. Z historii, teorii i praktyki*. Kraków 1999.
136. Michaud G. (org.): *Identités collectives et relations interculturelles*. Bruxelles 1978.
137. Mickiewicz A.: *Sinjoro Tadeo*. Varsovia 1955.
138. Miguez R.: *La comparaison interculturelle. Logique et méthodologie d'un usage empiriste de la comparaison*. Montreal 1977.
139. Morin E., Kern A.B.: *Ziemia -ojczyzna*. Warszawa 1998.
140. Mostwin D.: *Trzecia wartość. Wykorzenie i tożsamość*. Lublin 1995.
141. Muszyński J.: *Zarys historii języków międzynarodowych a językoznawstwo*. Łódź 1947.
142. Nikitorowicz J.: *Edukacja międzykulturowa na pograniczach kultur (propozycje realizacyjne)*. [en:] T.Lewowicki, B.Grabowska (org.): *Społeczności pogranicza, wielokulturowość, edukacja*. Cieszyn 1996.
143. Nikitorowicz J.: *Edukacja międzykulturowa wobec dylematów kształtowania tożsamości w społeczeństwach wielokulturowych*. [en:] T.Lewowicki, J.Nikitorowicz, T.Pilch, S.Tomiuk (org.): *Edukacja wobec ładu globalnego*. Warszawa 2002.
144. Nikitorowicz J.: *Koncepcja tożsamości międzykulturowej jako wartości edukacyjnej społeczeństwa wielokulturowego*. manuscript.
145. Nikitorowicz J.: *Młodzież pogranicza kulturowego Białorusi, Polski, Ukrainy wobec integracji europejskiej. Tożsamość, plany życiowe, wartości*. Białystok 2000.



146. Nikitorowicz J.: *Od podmiotowości do międzykulturowości i z powrotem. Próba interpretacji niektórych perspektyw teoretycznych*. [en:] T.Lewowicki, E.Ogrodzka-Mazur (org.): *W poszukiwaniu teorii przydatnych w badaniach międzykulturowych*. Cieszyn 2001.
147. Nikitorowicz J.: *Pogranicze, tożsamość, edukacja międzykulturowa*. Białystok 1995.
Al la kompilado de la instruprogramoj plej multe da tempo dediĉis Ewa Bondar kaj Andrzej Grzębowski. La programkajeron pres-preparis Regina Grzębowska. La programoj ankoraŭ ne estas perfektaj, tial volonte ni ricevos Viajn rimarkojn, opiniojn kaj proponojn, kiuj helpos al ni plibonigi la programojn tiel, ke oni povu esti realigataj ne nur en Bydgoszcz, sed ankaŭ internacie.

Atendante Viajn proponojn

Vicprezidanto  
de Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo  
kaj Prezidanto de la Program-Konsilio  
de la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo  
/-/ ASci. mag. Andrzej Grzębowski

**Baza programo por instruado de Esperanto  
en Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz  
1-a studjaro – lektoro de Esperanto**

- |   |              |
|---|--------------|
| 1. Kurso por komencantoj „o” (septembro)  | 20 h.        |
| 2. Kurso de 1-a grado (oktobro, novembro) | 50 h.        |
| 3. Kurso de 2-a grado (decembro, januaro) | 60 h.        |
| 4. Seminario „A” laŭ Cseh metodo dum      | <u>20 h.</u> |

Vintra sesio + lektora ekzameno (ripetekzameno en aprilo) 150h.

**Kurso de nula grado** (septembro) por komencantoj laŭ Cseh-metodo 20h.

*Temoj:*

Prezenco -as, preterito -is, futuro -os,

Volitivo -u

Substantivo – singularo kaj pluralo – deklinacio

Adjektivo: komparacio

Adverbo

Akuzativo postransitivaj verboj, akuzativo de direkto, akuzativo de tempo, mezuro kaj pezo

Prefiksoj: mal-, ge-, bo-

Sufiksoj: - in, -id, -ul, -ist, -an, -ar, -et, -ej, -end

Korelativa tabelo de pronomoj kaj adverboj

Bazaj kaj ordaj numeraloj

Skriba ekzameno: 1. Mia familio 2. Mia urbo 3. Mia hobio

Buŝa ekzameno: Gramatikaj demandoj, traduko de frazoj

**Kurso de 1-a grado (oktobro – novembro)** 50 h.

*Temoj pri gramatiko kaj vorta bazo:* 20h.

Kondicionalo -us

Infinitivo -i

Volitivo -u

Nedifinitaj pronomoj, refleksiaj pronomoj

*Temoj de la Esperanta literaturo kaj poezio* 10 h.

L. L. Zamenhof: *Ho mia kor’*, *La preĝo sub la verda standardo*

Tradukoj: Fabeloj de Andersen, Malnova Testamento

Antoni Grabowski: *Mazepo* – libretto por opero *Halka – Sinjoro Tadeo*

Kazimierz Bein (KABE) Vortaro de Esperanto, *La Faraono* – 1907, kabeigi – signifo de la vorto

Edmond Privat: Poemaro *Tra l’ silento*, *Vivo de Zamenhof*

**Temoj pri historio de Esperando movado** 10 h.

Ludoviko Zamenhof

Unuaj pioniroj de E-movado (A. Grabowski, KABE)

Unuaj renkontiĝoj kaj 1-a Kongreso en Boulogne-sur-Mer 1905 j.



Komparo de Esperanto kaj Volapuko	
Fundamento de Esperanto	
Esperanto en turismo – praktikaj okupoj	10 h.
Fundamentaj ĝeneralaj esprimoj pri turismo en Esperanto	
Fundamentaj esprimoj pri historio de arto (stiloj, vidindaĵoj)	
Fundamentaj teknikaj esprimoj (tranokto, tagnokto, ....)	
Fundamentaj dokumentoj en Esperanto	
Provoj gvidi ekskurson en Esperanto	
<b>Kurso de 2-a grado (decembro – januaro)</b>	60 h.
<i>Temoj de gramatiko kaj vortprovizo</i>	20 h.
Tabelo de montraj kaj neaj pronomoj	
Prefiksoj ek-, eks-, pra-	
Sufiksoj –aĵ, -ind, -ebl, -uj, -ing	
<i>Temoj pri historio de E-movado</i>	10 h.
Esperanto movado dum 1906 – 1920	
Esperanto movado dum 1921 – 1939	
Periodo de 2-a Mondmilito kaj Esperanto	
Postmilita historio de Esperanto-movado	
<i>Esperanto en turismo</i>	10 h.
Programo de la ekskurso en Esperanto (skribe)	
Gvidado de la ekskurso en Esperanto	
Ĉiĉeronado en la urbo en Esperanto	
Ekstremaj situacioj en turismo – difekto de la buso, malsano, akcidentoj, kpt.	
<i>Temoj pri E-literaturo:</i>	dum 10 h.
(originalaj verkoj – tradukoj – disvolvo) en periodo 1919 – 1939	
Julio Baghy: <i>Verda koro</i> , Jean Forge: ps. de Jan Fethke-polo	
Tradukliteraturo	
Bibliografio	
Kabe: <i>Unua legolibro</i> , Pechan A.: <i>Gvidlibro por supera ekzameno</i> , A. Pettyn: <i>Esperanto laŭ amuzmetodo</i>	
<b>Nuntempa E – movado</b>	10 h.
Buŝa ekzameno dum vintra sesio pri la 1-a periodo ĝis 1919 r.	
<b>Seminario „A” laŭ Cseh – metodo</b>	20 h.
<b>Februaro</b> – 5 minuta provlecio laŭ Cseh-metodo, analizo de frazoj kaj skriba parto, enmanigo de atestoj de IEI por gvidado de kursoj por komencantoj	

### Instruado de Esperanto por bakalaŭriĝo ĉe AIS 1-a studjaro - lektoro de Esperanto

1. Gramatiko	92 horoj	=	12 STU
2. Metodiko	20 horoj	=	2 STU
3. Historio de E-movado	24 horoj	=	3 STU
4. Literaturo	<u>24 horoj</u>	=	<u>3 STU</u>
	160 horoj		20 STU

*Temoj:*

#### 1. Gramatiko

Baza Cseh-kurso laŭ programo de IEI

Leksiko

gramatikoj reguloj 2° :

interpunkcio, leksikaj kaj gramatikaj morfemoj, radikkarakteroj  
verbo – divido laŭ transitiveco, simplaj tempoj – modaj, helpvortoj  
faktitivo –IG, medialo –IGĜ, Esperanto en turismo = fakaj vortoj,  
A-seminario laŭ programo de IEI

#### 2. Metodiko

diversaj instru-metodoj, maniero de instruado,  
konsiloj pri plano de la leciono

#### 3. Historio de E- movado

Ludoviko Zamenhof – datoj – faktoj

Familianoj de Ludoviko Zamenhof

Lingve Universala

Eldono de la Unua Libro

La unua Kongreso en Bulonjo-ĉe-Maró

Fundamento de Esperanto

Lingva Komitato kaj Akademio

#### 4. Literaturo

La unuaj pioniroj – verkoj kaj tradukoj, Antoni Grabowski  
Kazimierz Bein – KABE, Julio Baghy kaj Kalocsay



### 2-a studjaro – lekcianto de Esperanto

1. Gramatiko + metodiko	30 h.	=	3STU
2. Historio de E–movado	20 h.	=	2STU
3. Literaturo	20 h.	=	2STU
4. Praktiko	<u>20 h.</u>	=	<u>2STU</u>
	90 h.		10 STU

Temoj:

#### 1. Gramatiko

Participoj aktivaj kaj pasivaj  
Fakaj afiksoj – afiksoidoj  
Artikolo – reguloj de ĝia uzo  
Frazsintakso – kunorditaj kaj suborditaj  
Prepozicioj – diferenco inter *da* kaj *de*, *kun* kaj *per*, *tra* kaj *trans*  
Reguloj de vortkunmetado  
Verbo – aspektoj, kunmetitaj tempoj – voĉoj  
Mnemoniko, metodikaj konsiloj, atribua predikativo

#### 2. Historio – intermilita periodo

Lingvaj projektoj de internacia lingvo, Ido – Idoskismo  
Junulara movado – TEJO; SAT, k. a.

#### 3. Literaturo

Diversaj skoloj, Esperanto kiel fonto–lingvo  
Originala literaturo

### 3-a studjaro – instruanto de Esperanto

1. Gramatiko + praktiko	30 h.	=	3STU
2. Historio de E-movado	20 h.	=	2STU
3. Literaturo	20 h.	=	2STU
4. Konsultacioj pri diplomaj laboroj	<u>20 h.</u>	=	<u>2STU</u>
	80 – 100 studhoroj	=	10 STU

Temoj:

#### 1. Gramatiko + praktiko

propozicio – sintakso – akordo al la subjekto,  
speco de propozicioj  
reguloj pri refleksivo,  
adjektoj lokaj kaj stataj,  
principo de neceso kaj sufiĉo,  
multaj ekzercoj diversspecaj,  
preparado de plano de la leciono kaj gvidado de la leciono laŭ mem elektita metodo

Stilo – bona kaj malbona, stiloj apartaĵoj de Esperanto  
Homonimo – sinonimo – neologismo

#### 2. Historio de E–movado

Nuntempa periodo

#### 3. Literaturo: nuntempaj famaj verkistoj

## Instruado de Esperanto por magistriĝo ĉe AIS

### 4-a studjaro – instruisto por elementaj lernejoj

1. Gramatikaj kaj metodikaj okupoj	48 h.	=	6STU
2. Historio de E–movado	20 h.	=	2STU
3. Literaturo	20 h.	=	2STU
4. Kulturaj konoj	20 h.	=	2STU
5. Konsultacioj pri diplomaj laboroj (metodologio)	20	=	2STU
6. Diversaj praktikoj	<u>50 h.</u>	=	<u>6STU</u>
	178h.	=	20STU

Temoj:

#### 1. Gramatikaj kaj metodikaj okupoj

Ripetado kaj plivastigo de jam konata materialo – ekzercoj  
Korektado de eraroj fare de gestudentoj  
Diversaj specoj de analizo de kunmetitaj vortoj  
Diferenco inter lerneja kaj kursa – instruadoj  
Produktiva kaj receptiva kapabloj – formigo de ili  
Enmemorigo de materialo per mnemoniko – akrostiko – kanto

#### 2. Historio de E–movado

rolo de Lingva Akademio – sekcioj,  
fakaj asocioj,  
Kongresoj

#### 3. Literaturo

nuntempaj aŭtoroj,  
fragmentoj el diversaj libroj,  
recenzo de minimume unu tralegita libro

#### 4. Kulturaj konoj

laŭ materialo de ILEI

## 5-a studjaro – instruisto por mezgrada lernejo

1. Gramatikaj kaj metodikaj okupoj	48 h. = 6STU
2. Historio de E-movado	20 h. = 2STU
3. Literaturo	20 h. = 2STU
4. Kulturaj konoj	20 h. = 2STU
5. Konsultacioj pri diplomaj laboroj (metodologio)	20h.=2STU
6. Diversaj praktikoj	<u>50 h. = 6STU</u>
	178 h. =20STU

temoj:

### 1. Gramatikaj kaj metodikaj okupoj ligitaj kun praktiko

Diskutoj pri uzo de neologismoj dum kursgvidado

Principoj de beletra tradukado

Rakontoj – memverkitaj laŭ bildoj

Eseoj - memverkitaj pri sociaj aŭ aliaj problemoj

Problecionoj fare de lernantoj - poste diskuto

- Metodika principo
- Nivelo (flueco – klareco de instruado)
- Eventualaj eraroj

### 2. Historio

Enciklopedio de Esperanto,

bibliografio,

dokumentoj,

lingvaj problemoj

### Literaturo

Recenzoj pri artikoloj, libroj

Internacia art' tradukado

### Kulturaj konoj

Laŭ programo de ILEI

## Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo

### PREMISOJ DE LA PROGRAMO

#### 1-a STUDJARO

Celo: Prepari gestudentojn por laboro kun grupo dum turismaj aranĝoj

Studhoroj: sume 800 – en tio 500 da lecionoj, 300 da turismaj praktikoj

Kvalifikoj:

- Turisma informanto
- Mondovojaĝanto
- Gvidanto de porinfanaj aranĝoj
- Lektoro de Esperanto (gvidanto de informaj kursoj)
- Landa kaj internacia vojaĝgvidanto

Findokumento: diplomo de organizanto de la internaciaj turismo kaj kulturo

#### 2-a STUDJARO

Celo: Prepari por planado kaj finkalkulado de turismaj kaj kulturaj aranĝoj

Studhoroj: sume 800 – en tio 500 da lecionoj, 300 da turismaj praktikoj

Kvalifikoj:

- Turisma ĉiĉerono en Esperanto
- Verkanto de arta ceramiko
- Organizanto de kultura agado
- Kursgvidanto de Esperanto (gvidanto de bazaj kursoj)

Findokumento: atestilo de memstara laboranto de la internaciaj turismo kaj kulturo

#### 3-a STUDJARO

Celo: Prepari gestudentojn por gvidi turisman firmaon

Studhoroj: sume 800 – en tio 500 da lecionoj, 300 da turismaj praktikoj

Kvalifikoj:

- Gvidanto de turismo kaj kulturo
- Instruisto de Esperanto (gvidanto de kursoj por progresantoj)

Findokumento: ŝtata licenco de specialisto pri organizado kaj disvolvado de turismo aŭ licenco de specialisto pri organizado de kulturo; krome ebleco fariĝi bakalaŭro de AIS pri morfosciencoj aŭ pri humanistiko

**Sekretario de la Program-Konsilio**    **Prezidanto de la Program-Konsilio**  
mag. Wojciech Rumiński                      ASci. mag. Andrzej Grzębowski

**Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino**  
Morfosciencia Sekcio

Projekto de morfosciencia studadplanado: *Turismiko – 1a, 2a, 3a*  
(laŭ la modelo de la studadplanado *Komunikadscienco*, aprobita de la  
**Dicastero Instruzione e Cultura in Republica di San Marino**)

Celo:

- a) Magistriĝo en turismiko (Ekologio kaj mediprotektado)
- b) Okazintaĵorganizado (marketingo kaj administrado de konferencoj, ekspozicioj, foiroj ktp.)
- c) Aŭdvida dokumentado (filmado, fotado, muzea prezentado)
- d) Sanprotektata organizado (organizado de rekreiĝo kaj de sportaj aktivecoj)

Al la kursoj necesaj apartenas:

30 studunuoj en kernaj fakoj por ĉiuj medihumanigistoj

10 studunuoj en specialfakoj tipaj al la koncerna fokuso

magistriĝ-disertacio

40 studunuoj libere elekteblaj (ekzemple el la posta kromfako por la eventuala magistriĝo)

De la kursoj nepre devas esti minimume 3 SUS-kursoj, minimume entute 40 studunuoj en kursoj realigataj en ILO kaj organizataj de AIS, minimume 14 studunuoj kun noto.

Kernkampoj (teoriaj kaj praktikaj):

Elementoj de scienca fotado – 1 STU

Elementoj de aŭdvida surbendigo – 2 STU

Elementoj de ergonomiko (produktformigo) – 1 STU

Elementoj de arkitekturo – 1 STU

Elementoj de naturekologio – 2 STU

Elementoj de kulturekologio – 1 STU

Elementoj de mediprotektado – 1 STU

Elementoj de trafikplanado – 1 STU

Elementoj de gastigado – 1 STU

Ĝenerala folkloriko - 1 STU

Elementoj de merkato-komunikado (marketingo) – 1 STU

Elementoj de administrado kaj dokumentado en turismiko – 1 STU

Enkonduko en turismikon (nocioj, kategorioj, klasifikoj,

tendencoj) - 3STU

Enkonduko en uzadon kaj programadon de komputiloj - 3STU

Enkonduko en la muzeologion – 1 STU

Interlingvistiko inkluzive bazan ILO- kurson – 4 STU

(libere elektenda po 1 kurso – minimume po 1 studunuoj el la sekcioj kibernetiko, humanistiko, struktursciencoj, filozofio, natursciencoj

sume – minimume 30 studunuoj

Specialkampoj por la fokuso Turismiko

po 1 kurso el:

- geografio de la mondo

- mastrumado (librotenado, bilancigo)

- ekonomiko de turismo – 3 STU

Baza fremdlingva komunikado en elektita oficiala lingvo de AIS aŭ de najbaraj landoj (speciale por turistoj)

Enkonduko en psikologion – 1 STU

Enkonduko en sociologion – 1 STU

Enkonduko en pedagogion – 1 STU

Integriga seminario (normalaj kaj esceptaj situacioj en turismo – 2 STU)

Entute: 10 STU

Ekonomiko de konsumado – 2 STU

Turisma mastrumado en la lando – 2 STU

Esplorado de turisma merkato – 3 STU

Jur-financaj aspektoj de turismo – 2 STU

Estado pri turisma mastrumado (kazaj studoj) – 2 STU

Inform- kaj rezerv-sistemoj en turismo – 1 STU

Mastruma leĝaro de Europa Komunumo – 2 STU

**Prilaboris:**

**Prof. dr hab. Helmar Frank**

**Prof. dr hab. Tyburcjusz Tyblewski**



**INTERNACIA STUDUMO PRI TURISMO KAJ KULTURO  
KLERIGEJO DE LA AKADEMIO INTERNACIA DE LA SIENCOJ - SAN MARINO**

**Studobjektoj kaj studhoroj:**

N-R	STUODOBJEKTO	1 j.	2 j.	3 j.	SUME
1	La internacia lingvo	90	60	60	210
2	Glottodidaktiko	16	8	8	32
3	Enkonduko en psikologion	8	16	8	32
4	Ekzercoj pri komunikado kaj laboro kun hom-grupo	16	16	16	48
5	Metodiko de laboro de gvidanto de porinfanaj ferioj	40			40
6	Retoriko	8	8	8	24
7	Enkonduko en turismikon	8	8	8	24
8	Fundamentoj de sociologio	8	8	16	32
9	Fundamentoj de pedagogio	8	8	8	24
10	Historio de Kujavia-Pomerelia regiono	8	32	8	48
11	Historio de Pollando	8	8	8	24
12	Historio ĝenerala de la mondo	16	16	16	48
13	Historio de kulturo kaj arto	16	40	16	72
14	Kulturscienco	16	16	16	48
15	Elementoj de politikaj sciencoj	8	8	8	24
16	Europa integriĝo	16	24	24	64
17	Historio de Europo	16	16	16	48
18	Arta ceramiko	8	8	80	96
19	Kultura animado	8	8	8	24
20	Enkonduko en prakseologion kaj teorion de organizado	8	8	8	24
21	Merkatiko de turismaj servoj	8	8	16	32
22	Ekologiaj aspektoj de turismo	8	8	8	24
23	Geografio de la mondo	16	24	24	64
24	Geografio de Europo	16	20	20	56
25	Geografio de Pollando	8	8	8	24
26	Geografio de Kujavia-Pomerelia regiono	8	40	8	56
27	Teknikaĵoj en oficeja uzo (ĉefe komputilo)	16	16	16	48
28	Lingvoj kaj kulturoj de diversaj popoloj (precipe la lingvoj: angla, hispana)	90	60	60	210
	Kune studhoroj	500	500	500	1500
	Praktikoj dum turismaj kaj kulturaj aranĝoj	300	300	300	900
	Horoj entute	800	800	800	2400

Prilaboris:

Sekretario de la Program-konsilio  
Mag. Wojciech Rumiński

Prezidanto de la Program-konsilio  
ASci. mag. Andrzej Grzębowski

**Studadprogramo pri turismiko en la Internacia Akademio  
de la Sciencoj Klerigejo en Bydgoszcz – Pollando  
(disdivido de studunuoj laŭ kvalifikoj)**

JARO	KURSOJ – DIPLOMOJ pri turismiko	HOROJ	STUD- UNUOJ
1. Esperanto – kvalifikoj Informanto – lektoro de Esperanto	1. Turisma informanto de 3-a klaso	24'	3
	2. Enlanda vojaĝgvidanto	60'	6
	3. Prizorganto dum junularaj feriadoj		
	4. Vojaĝanto – internacia	36'	4
	5. Eksterlanda vojaĝgvidanto	30'	3
	6. Oficisto de vojaĝoficejo	120' 30'	15 3
		300'	34
2. Lekcianto – instruktoro de Esperanto	7. Turisma informanto de 2-a klaso	24'	3
	8. Turisma ĉiĉerono	120'	15
	9. Animatoro de kulturo	76'	8
	10. Organizanto de turisma priservado	80'	10
		300'	36
3. Instruanto de Esperanto	11. Turisma informanto de 1-a klaso	30'	3
	12. Turisma menaĝero	150'	15
	13. Specialisto de internacia turismo kaj kulturo – bakalaŭro de AIS	120'	12
		----- 300'	----- 30
4. Instruisto por kursoj	14. Aviadila kasisto	300'	30
5. Instruisto de Esperanto por lernejoj	15. Turisma agento – magistro de AIS	300'	30
KUNE:		1500'	160

Prilaboris  
Andrzej Grzębowski



## Baza Cseh-Kurso - Plano de instruado

La plano ampleksas 20 – 24 studhorojn

### 1-a renkontiĝo

- personoj – mi, vi, li, ŝi, ĝi
- demandaj pronomoj – kiu? kia? kie? kiom? kio?
- substantivoj – singularo kaj pluralo
- numeraloj – ĝis 5
- koloroj
- adjektivoj – granda, longa
- prefikso – mal-
- sufikso – -in
- verbo – nuna tempo
- prepozicioj – sur, en

### 2-a renkontiĝo

- substantivo – deklinacio
- akuzativo post transitivaj verboj
- daŭrigo de koloroj
- adjektivoj – juna + forta + sana = feliĉa
- mapo – kontinento, lando, urbo, strato, domo
- seĝo = meblo, rozo = floro, kato = besto, viro = homo

### 3-a renkontiĝo

- numeraloj – ĝis 100
- prepozicioj – antaŭ, inter, apud, sub
- prefiksoj – ge-, bo-
- temoj:
  - Eroj de la kapo
  - Kion vi faras per diversaj partoj: vidas, aŭdas, ktp.
  - Eroj de la ĉambro
  - Familio

### 4-a renkontiĝo

- akuzativo de direkto: kien? iras - metas
- pronomoj montraj kaj rilataj
- diferenco inter amas kaj ŝatas
- temoj: parko, trinkaĵoj kaj manĝaĵoj
- analizo de frazo

### 5-a renkontiĝo

- kalkulado
- verbo – imperativo (volitivo)
- kalendaro – nomoj de monatoj – tagoj, jarsezonoj

- de kie mi prenas.... de sur...
- adresado de letero (dato)
- teatraĵeto – amletero

### 6-a renkontiĝo

- substantivo
  - genro kaj sekso
  - kazoj prepoziciaj (en la domo, pri la domo)
  - uzo de difina artikolo
- sufiksoj – ej-, -ist-
- komparado
- vortfarado per aldonajoj:
  - prefikso + radiko + sufikso aŭ participo
  - temoj: loĝejo – lernejo – poŝtoŝejejo
  - nomoj de ĉambroj – dormoĉambro ktp.

### 7-a renkontiĝo

- demandaj pronomoj: kiam? kies?
- posedaj pronomoj: mia, via, ktp.
- verbo: pasinta tempo kaj futuro
- sufiksoj: -il, -uj, -et, -eg
- akuzativo de mezuroj
- refleksivo
  - Temoj: horloĝo (partoj de la tago)

### 8-a renkontiĝo

- akuzativo de tempodaŭro kaj datoj
- demanda pronomo – kial?
- prepozicio – pri
- enkonduko de moda helpvorto: povi (regulo –as, -i)
- temoj: naskiĝo kaj vivo, vendejo
- sufiksoj: -ar-, -aĵ-

### 9-a renkontiĝo

- modaj helpvortoj: devi, voli
- sufiksoj: -id, -ul, -an
- diferenco inter prepozicioj *pro* kaj *por*
- demanda pronomo: kiel?
- diferenco inter adjektivo kaj adverbo
- Temoj:
  - veturiloj
  - frukto- kaj legomĝardenoj

### 10-a renkontiĝo

- ripetado de gramatiko
- Temoj:
  - mapo de Pollando - nordo, sudo, oriento, okcidento
  - maro, rivero, lago
  - monto, montaro
  - ebenaĵo, altaĵo
  - signifo de vorto: krokodilo

### Skriba ekzameno:

1. Analizo de 10 frazoj  
Ekz. En la parko la sinjoro salutas la fraŭlinon  
kie? kiu? kion faras? kiun?
2. Respondo al demandoj  
Kiu estas vi?  
Kio estas vi?  
Kion vi ŝatas? ktp.  
En kia ĉambro manĝas vi? (granda, bela)  
En kiu ĉambro manĝas vi? (speco – manĝoĉambro)  
2 frazoj kun truoj:  
ekz. Mi iras..... piedoj.  
Mi aĉetis florojn..... mia patrino.  
(oni devas enskribi konvenan prepozicion)  
2 frazoj en kiuj estas eraro  
ekz. La kato kuras al la fenestro(n)  
/(n) ne bezona litero *n* –ĉar /al/, montras direkton.

Laŭ opinio de aŭtorino tiuj 2 lastaj frazoj estas gravaj, ĉar montras, ĉu kursano ekregis la gramatikon.

### Parola ekzameno

- Rakonto pri lotumata bildo (minimume 10 frazoj)  
Ekz. Vendejo, poŝtoŝtanco, ĝardeno  
(dum la antaŭaj renkontiĝoj mi preparolis tiujn bildojn)
- Tiun planon mi uzis dum la lasta sesio en la Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz.

Ewa Bondar

Diplomita instruisto

De la Internacia Esperanto-Instituto en Hago (Nederlando)

### Programo

de pedagogia kurso por lektoroj de Esperanto lingvo

Programo preparita surbaze de la Direktivo de la Kleriga kaj Eduka Ministro de la 12 marto de 1975 j. n-ro KU – 0162 kaj de la direktivo pri organizado de la pedagogiaj kursoj gvidataj de la fakaj centroj pri la edukado de la kadroj kaj de la sociaj asocioj (aldono por notita Direktivo).

La kurso estas destinita por lektoroj de la lingvo Esperanto, kiuj gvidos okupojn dum la kursoj de la lingvo.

Programo de la kurso inkluzivas elektitajn demandojn de pedagogio, psikologio, glottodidaktiko, Esperanto-movado kaj pluan disvolvon de la lingvokono. Oni konsideris ankaŭ okupojn pri priservo de teknikaj didaktikaj rimedoj (filmaparataro, komputiloj, laboratorioj, ktp.) kaj informojn pri la organizado de la kursoj kaj ĝia dokumentado. Kurso finiĝas per ekzameno pri glottodidaktiko kaj praktika kono de la lingvo.

### Enhavo de la instruado

- 1-a. Kurso edukado en Pollando 4h.
  - Kurso kiel eduka organiza formo.
  - Organizado de la instruado en la kadro de Esperanto-organizaĵoj en Pollando.
  - Planado kaj organizado de la laboro en la kurso de lingvo Esperanto.
  - Programoj de la instruado, lernolibroj, helpmaterialoj, dokumentado, fina ekzameno.
- 2-a. Bazaj scioj de pedagogiko kaj psikologio 40 h.  
Pedagogiko (20 h.)
  - Bazaj pedagogiaj principoj: edukado, klerigado, instruado, personeco, medio, kulturo.
  - Didaktiko. Epistemologiaj kaj psikofiziologiaj fundamentoj de instruado kaj lernado. Trarigardo de nuntempaj didaktikaj sistemoj kaj organizaj formoj de instruado.
  - Ĝenerala didaktiko kaj detalaj didaktikoj. Ligo de instruado kun edukado kaj klerigado. Celoj de la ĝenerala kaj faka klerigado. Elektro kaj kompostado de la enhavo de la klerigado. Planoj kaj programoj de la instruado. Lernolibroj.
  - Procedo de la instruado – de la lernado, ĝiaj ĉenoj. Kontrolo kaj pritakso de la rezultoj de la instruado.
  - Ĉefaj reguloj de la instruado – difino kaj trarigardo de la reguloj. Metodoj de la instruado, disvolvo kaj klasifikado. Elektro de la metodo de la instruado pere de instruisto. Didaktikaj taskoj.
  - Organizaj formoj de la instruado. Individua, grupa kaj komuna instruado. Klaso – leciona sistemo. Leciono, ĝia strukturo kaj tipoj. Kromlekciaj kaj kromlernejaj okupoj.



- Didaktikaj rimedoj, ilia disdivido kaj funkcioj. Didaktikaj maŝinoj. Rimedoj de publika komunikado kaj uzo de ili en didaktika laboro.
- Lernejoj malsukcesoj de la lernantoj, iliaj specoj kaj kialoj. Metodaj rimedoj en la batalo kontraŭ lernejoj malsukcesoj.

#### Ĝenerala psikologio (20 h.):

- Objektoj kaj taskoj de psikologio. Ĝia loko en la scienca sistemo. Fakoj de la psikologio kun speciala agnosko de ĝenerala, disvolva, eduka kaj klinika psikologioj. Regulado de la reciproka rilato de la homo kun la ĉirkaŭanta medio kiel ĉefa problemo de psikologio. Psikologio kaj pedagogiko. Signifo de la psikologia scio por pedagogia praktiko.
- Neurofiziologia fundamento de la psikologiaj procedoj. Rolo de la centra nerva sistemo en la regulado kaj integriĝo de psikaj funkcioj de la homo.
- Homa personeco kiel fundamenta problemo de la interesiĝoj de la psikologoj. Elektikaj teorioj de la personeco. La plej popularaj tipologioj de la personeco.
- Difino de personeca strukturo. Karakterizo de fundamentaj strukturoj: kapableco kaj talento, temperamento, bezonoj kaj interesiĝoj, sindeteno, karaktero, motivado, bildo pri si mem.
- Difino de pensado kaj parolo. Rilato kun la agado. Fundamentaj pensaj operacioj. Specoj de la pensado. Rilato inter pensado kaj parolo. Difino kaj funkcioj de la parolo.

#### 3-a. Principoj de nuntempa glottodidaktiko 10 h.

- Fundamentaj difinoj
- Interdisciplina karaktero de la glottodidaktiko, ekz. psikolingvistiko, sociolingvistiko, ĉefaj celoj.
- Trarigardo de didaktikaj konceptoj de la instruado de fremdaj lingvoj.
- Fundamentoj de la kolekto de la instruprogramo kaj elekto de glottodidaktikaj materialoj.
- Elektro kaj funkcioj de la aŭdio-vizualaj materialoj dum la procedo de la instruado.

#### 4-a. Glottodidaktika aspekto de la fremdlingva instruado 10 h.

- Ĉefaj metodikaj difinoj: metodo, tekniko, scienco, kapableco, alkutimiĝo.
- Disvolvo de la lingva lerteco: kompreno de la aŭskultita teksto, parolo, legado, skribado.
- Rolo de la gramatiko en la instruado de fremdaj lingvoj
- Metodaj rimedoj por la semantizado de la leksiko.
- Planado de la lekciaj unuoj.
- Tipoj de la leciono de fremda lingvo.
- Kontrolo kaj pritakso de la fremdlingva instruado.
- Ludoj kaj distrajoj kiel didaktikaj helpiloj.
- Didaktikaj rimedoj kaj ilia uzado.

#### 5-a. Informoj pri la lingvo kaj E-movado 15 h.

- Historio de la internaciaj lingvoj
- Esperanto - ĝia genezo, strukturo kaj disvolvo. Akademio de Esperanto, ĝia rolo kaj agado.
- Historio de E-movado, reformataj tendencoj la 1-a Esperanto Kongreso, Bulonja Deklaracio (1905), internaciaj konferencoj, seminarioj (1922 - 1934), Rezolucio de Unio de Nacioj (1924), Universalaj Kongresoj, landaj Kongresoj kaj aliaj aranĝoj, atingoj en UNO kaj Unesco (1954 kaj 1985), jaro de Zamenhof (1959), nuntempa situacio.
- Esperanta literaturo - franca kaj slava skoloj (ĝis 1917, germana kaj hungara skoloj (intermilita periodo), skota skolo, la plej gravaj verkistoj kaj iliaj verkoj.
- Nuntempa Esperanto-movado - ĝia strukturo (internaciaj, landaj kaj fakaj organizaĵoj).

#### 6-a. Praktika lernado de la lingvo Esperanto 25 h.

- *Fundamento de Esperanto*, ĝia signifo, rolo, *Ekzerco*
- Pli gravaj gramatikaj principoj: Uzado de formantoj, prepozicioj, akuzativo en deklinacio, participoj, difino de la tempo, modo, ktp., sintakso de la frazo
- Lingvaj ekzercoj, testoj.

#### 7-a. Didaktikaj iloj 6 h.

- Preparado de lernolibroj kaj helpmaterialoj por instruado de Esperanto
- Prilaboro de la plano por kursa instruado
- Dokumentado de la kurso

Kune: 130 h.

#### Rimarkoj:

- Partoprenantoj de la kurso devas havi almenaŭ mezan klerecon kaj bone koni la lingvon Esperanton (finita 3-a grada gramatika kurso)
- Pri akcepto al la kurso decidigas enkonduka ekzameno en Esperanto
- Aprobo de la kurso okazas post ĝia fino surbaze de la partoprenlisto, aktiveco dum la lecionoj, plenigo de la taskoj donitaj de la prelegantoj kaj sukceso en la fina ekzameno.
- Profesiaj instruistoj povas esti liberigitaj de la okupoj laŭ tiu - ĉi programo notita en punkto 2.

**Prilaboris:**

**dr Halina Barcikowska, Józef Paweł Bieliński**

## Bazaj informoj pri pedagogio kaj psikologio

### Pedagogio:

- Studobjekto kaj taskoj de pedagogio – ilia loko en la scienca sistemo
- Bazaj konceptoj de pedagogia edukado – sociologio – ligoj kaj ecoj konstitujaj
- Edukado – kontraŭversioj teme de kreitaĵoj kaj edukaj ecoj. Edukado kaj aliaj procedoj kaj sociaj fenomenoj. Edukado kaj socialaj problemoj. Memlernado pseŭdo-edukado.
- Proceso de edukado – rolo kaj proceso.
- Subjekto-rolo en edukado – devo aŭ ebleco
- Ligo de edukado kun instruado
- Instruado kaj lernado
- Principoj de instruado kaj edukado
- Metodoj de instruado kaj edukado
- Problemoj pri celo de instruado kaj edukado
- Didaktikaj kaj edukaj malfacilaĵoj
- 

### Psikologio

- Psikologio kiel studobjekto – taskoj – loko en scienca sistemo
- Reciprokaj rilatoj de homo kaj ĉirkaŭaĵo kiel baza problemoj de psikologio
- Personeco de homo kiel grava problemoj por psikologiaj – bazaj strukturoj

La scio pri si mem.

- Malfacilaĵ-problemoj – kialaj – maniero de reagoj sinsekvo de longdaŭra streso.
- Faktoroj determinantaj la evoluon de homa psiko.
- Lernado – lernado kaj maturigado – formoj de lernado – helpantaj elementoj
- Signifo de psikologia (scio) por pedagogia praktiko.



## INTERNACIA CENTRO PRI KULTURO KAJ TURISMO “KUJAVIO KAJ POMERELIO”

str. M.Sklodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz

tel./fax: (+48-52) 346-11-51

retpaĝoj: [www.esperanto.bydgoszcz.eu](http://www.esperanto.bydgoszcz.eu), [www.esperanto-turismo.za.pl](http://www.esperanto-turismo.za.pl)

retadresoj: [info@esperanto.bydgoszcz.eu](mailto:info@esperanto.bydgoszcz.eu), [esperanto-turismo@wp.pl](mailto:esperanto-turismo@wp.pl),  
[andreo@rubikon.net.pl](mailto:andreo@rubikon.net.pl)

Bydgoszcz, la 1.12.2011 j.

### Estimataj!

Okaze de 152 naskiĝdatreveno de Ludoviko Zamenhof – Kreinto de Esperanto, ni decidis eldoni aktualajn *NIVELOJN DE ESPERANTO – INSTRUADO* en Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz (ISTK) - Klerigejo de Akademio Internacia de la Sciencoj – AIS-Klerigejo Bydgoszcz (AKB), kiel suplemento “D”.

La instruado de Esperanto en ISTK daŭras jam pli ol 20 jarojn (1991-2011) kaj vi trovos en la sama eldonaĵo (Suplemento C) la programojn de Esperanto-Instruado en ISTK en Bydgoszcz – ili plu estas aktualaj. Tamen nuntempe oni pli kaj pli klopodas akiri *Eŭropajn Lingvajn Certigilojn (European Language Certificate) la plej multe por lingvoj: angla, dana, franca, hispana, japana, nederlanda, germana, pola, portugala, rusa, sveda kaj Esperanto*. Tial ni ankaŭ decidis adapti niajn instru-programojn de Esperanto por akiri *Eŭropajn Lingvajn Certigilojn* ankaŭ por studentoj de ISTK kaj aliaj, kiuj ankaŭ volus adapti tiun ekzamen-sistemon. Pri Esperanto la plej rekonata estas Certigilo de lingva ekzameno ORIGO ILEI/UEA – tiun Certigilon por lingvo Esperanto akiris jam pli ol 500 kandidatoj, la 500-a dum la 96 UK de Esperanto en Kopenhago – julio 2011. Jam en 2008 jaro aperis libreto “*Esperanto de nivelo al nivelo*” – Lingva Ekzameno ORIGO eldonita de ELTE-JTK en Budapeŝto (Hungario) lingvo-niveloj B1, B2, C1. Por Esperanto-vojaĝgvidantoj kaj Esperanto-ĉiĉeronoj la plej bezonataj estas lingvaj certigiloj laŭ nivelo B-2, kvankam laŭ ĉiuj niveloj valoras edukiĝi en Esperanto. Tamen la niveloj A1, A2, B1, B2, C1 kaj C2 prezentas nur postulojn (kriteriojn), laŭ kiuj eblas ekzameniĝi por akiri tiujn Certigilojn. La NIVELOJ mem ne sufiĉas, necesas verki la studad-programojn por prepari studentojn al la ekzamenoj, tio mankas. Tial ni publikigas la kriteriojn por la Niveloj kaj samtempe anoncas konkurson verki programojn en Esperanto por tiuj Niveloj, por ke studentoj de ISTK kaj aliaj povu studi Esperanton en ISTK semestre po 120 horoj – lecionoj, por dum kvin jaroj atingi la nivelojn A1 ĝis C2, do, studante dum 10 semestroj almenaŭ 1200 horojn en Esperanto. La Konkurso por ĉiuj daŭros ĝis la 37-aj Esperanto-Tagoj de Bydgoszcz kun la 41-a AIS/AKB Studadsesio dum 21-26 de aprilo 2012 en Bydgoszcz, Pollando. Ni klopodos publikigi prilaboritajn Esperanto-programojn kaj aŭtoroj de la plej bonaj programoj ricevos rabatojn por Esperantotur-vojaĝoj en 2012 jaro al pluraj internaciaj Esperanto-kongresoj, inkluzive de la 97 Universala Kongreso de Esperanto en Hanoi (Vjetnamio) kaj 45-a ILEI-Konferenco en Kunming (Ĉinio). Tio estos unu el niaj komunaj konkretaj kontribuoj por la Jubileo de 125 jaroj de Esperanto (1887-2012).

Sukcesojn al Vi en la preparado de la studadprogramoj laŭ prezentataj niveloj: A1, A2, B1, B2, C1 kaj C2 bondeziras –

/ - / Asc. Andrzej Grzębowski  
Vicprezidanto de la Internacia Centro pri  
Kulturo kaj Turismo  
en Bydgoszcz, Pollando





**INTERNACIA STUDUMO PRI TURISMO KAJ KULTURO  
CENTRO de KONSTANTA EDUKADO en BYDGOSZCZ  
KLERIGEJO DE LA INTERNACIA AKADEMIO DE LA  
SCIENCOJ AKB/AIS**

STR. M.SKŁODOWSKIEJ-CURIE 10, PL-85-094 BYDGOSZCZ, tel./fax: (+48-52) 346-11-51

retpaĝoj: [www.esperanto.bydgoszcz.eu](http://www.esperanto.bydgoszcz.eu); [www.esperanto-studium.za.pl](http://www.esperanto-studium.za.pl)  
retadreso: [stud@esperanto.bydgoszcz.eu](mailto:stud@esperanto.bydgoszcz.eu) ; [stud-esperanto@wp.pl](mailto:stud-esperanto@wp.pl)

**NIVELOJ DE ESPERANTO-INSTRUADO**

en INTERNACIA STUDUMO PRI TURISMO KAJ KULTURO  
en BYDGOSZCZ - KLERIGEJO DE LA INTERNACIA AKADEMIO  
DE LA SCIENCOJ – AKB/AIS laŭ klasifiko de lingvo-kono akceptitaj de  
KONSILIO DE EŬROPO

- **unua studjaro en ISTK/AKB**
  - semestro aŭtuna – vintra - 120 lecionoj – Nivelo A1 Komencanta “0” 80-120
  - semestro vintra – printempa - 120 lecionoj – Nivelo A2 Komencata elementa 180-200
  - Entute 240 horoj Kune: 240 lecionoj – 30 STU horoj
- **dua studjaro en ISTK/AKB**
  - semestro aŭtuna – vintra - 120 lecionoj – Nivelo B1 Meze progresinta 350-400
  - semestro vintra – printempa - 120 lecionoj – Nivelo B1 Meze progresinta horoj
  - Entute 240 horoj Kune: 240 lecionoj – 30 STU
- **tria studjaro en ISTK/AKB**
  - semestro aŭtuna – vintra - 120 lecionoj – Nivelo B2 Pli ol Meze progresinta 500-600
  - semestro vintra – printempa - 120 lecionoj – Nivelo B2 Pli ol Meze progresinta horoj
  - Entute 240 horoj Kune: 240 lecionoj – 30 STU
- **kvara studjaro en ISTK/AKB**
  - semestro aŭtuna – vintra - 120 lecionoj – Nivelo C1 Progresinta 700
  - semestro vintra – printempa - 120 lecionoj – Nivelo C1 Progresinta horoj
  - Entute 240 horoj Kune: 240 lecionoj – 30 STU
- **kvina studjaro en ISTK/AKB**
  - semestro aŭtuna – vintra - 120 lecionoj – Nivelo C2 Tre progresinta 1000-1200
  - semestro vintra – printempa - 120 lecionoj – Nivelo C2 Tre progresinta horoj
  - Entute 240 horoj Kune: 240 lecionoj – 30 STU

**ENTUTE 1000-1200 horoj**

Entute 5 jaroj x 240 lecionoj = 1200 lecionoj en ISTK/AKB = 150 STU /studunuoj/.

/-/ Asc. Andrzej Grzębowski  
Prezidanto de Program-Konsilio  
de la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo  
- Klerigejo de la Internacia Akademio de la Sciencoj  
(AKB/AIS) en Bydgoszcz

**Nivelo de lingva lerteco**

**Niveletoj de lingva lerteco** – grado de la kono de fremda lingvo de la persono en difinita klasifiko, do, kapableco paroli, aŭskulti, legi kaj skribi.

Ekzistas diversaj klasifikoj de la lingvokono. Unu el ili akceptis Eŭropa Konsilio, enkondukante ses nivelojn indikitajn per granda litero kaj aldona cifero: A1, A2, B1, B2, C1, C2. Nivelo A1 egalas al la plej eta lerteco, kaj nivelo C2 – al la plej alta.

nivelo	priskribo
A1	Persono uzanta la lingvon sur tiu nivelo komprenas kaj kapablas apliki ĉiutagajn eldirojn kaj esprimojn de ĉiutaga vivo. Li/ŝi kapablas prezenti sin kaj aliajn, starigi demandojn pri privata vivo, pri ekz. loko, en kiu loĝas, pri homoj, kiujn konas, kaj pri aĵojn, kiujn posedas. Li/ŝi kapablas simple konversacii kondiĉe, ke kunparolanto parolas malrapide, klare kaj helpeme.
A2	Persono uzanta la lingvon sur tiu nivelo komprenas eldirojn kaj ofte uzatajn esprimojn de ĉiutaga vivo (ekz. bazajn informojn pri la kunparolanto kaj pri lia familio, pri aĉetaĵoj, pri ĉirkaŭmedio, pri laboro). Li/ŝi kapablas interkompreniĝi en simplaj, rutinaj komunikaj situacioj, kiuj postulas nur simplan, rektan inform-interŝanĝon pri konataj kaj tipaj temoj. Li/ŝi kapablas en simpla maniero priskribi sian devenon, ĉirkaŭmedion, kaj ankaŭ tuŝi problemojn de la plej gravaj bezonoj de la ĉiutaga vivo.
B1	Persono uzanta la lingvon sur tiu nivelo komprenas signifon de la plej gravaj komunik-sufetoj de klaraj, standartaj eldiroj, kie temas pri konataj al li/ŝi aferoj kaj eventoj tipaj por laboro, lernejo, libera tempo ktp. Li/ŝi kapablas sukcesi en multaj komunikaj situacioj, kiuj povas okazi dum vojaĝo en la regiono, kie oni parolis en tiu lingvo. Li/ŝi kapablas krei simplajn, ligitsencajn eldirojn pri la konataj al li/ŝi temoj aŭ pri la temoj, kiuj interesigas lin/ŝin. Li/ŝi kapablas priskribi

	spertojn, eventojn, revojn, esperojn kaj aspirerojn, mallonge argumentante siajn opiniojn kaj planojn.
<b>B2</b>	Persono uzanta la lingvon sur tiu nivelo komprenas signifon de la plej gravaj komunik-sufetoj en la komplikitaj tekstoj pri konkretaj kaj abstraktaj temoj, inkluzive komprenon de la diskuto pri teknikaj temoj je amplekso de lia/ŝia fako. Li/ŝi kapablas interkomunikiĝi tiel flue kaj spontane, ke eblas gvidi normalan interparolon kun denaska uzanto de tiu lingvo, sen streĉado de iu ajn flanko. Li/ŝi kapablas formuli eldirojn buŝajn kaj skribajn en vasta gamo de la temoj, kaj ankaŭ klarigi sian starpunkton pri la diskutataj aferoj, konsiderante mankojn kaj avantaĝojn de diversaj solvoj.
<b>C1</b>	Persono uzanta la lingvon sur tiu nivelo komprenas vastan gamon de malfacilaj, longecaj tekstoj, rimarkante ankaŭ kaŝitan signifon, esprimitan malrekte. Li/ŝi kapablas esprimi sin flue, spontane, sen pli granda peno trovante ĝustajn esprimojn. Efike kaj libere li/ŝi kapablas uzi la lingvon en societaj kaj sociaj, edukaj aŭ fakaj kontaktoj. Li/ŝi kapablas formuli klarajn, bone konstruitajn, detalajn eldirojn pri komplikitaj problemoj, lerte kaj ĝuste uzante regulojn pri organizado de la eldiro, konjunkciojn kaj indikilojn de la teksta interligo.
<b>C2</b>	Persono uzanta la lingvon sur tiu nivelo povas facile kompreni praktike ĉion, kion ekaŭdos aŭ tralegos. Li/ŝi kapablas resumi informojn de aliaj fontoj, skribajn aŭ parolajn kunligmetode reproduktante ĝiajn tezojn kaj klarigojn. Li/ŝi kapablas esprimi siajn pensojn tre flue, spontane kaj precize, subtile diversigante signifecajn nuancojn eĉ en pli komplikaj eldiroj.

### Bibliografio

- Goethe-Institut USA (USONO): Priskribo de la niveloj laŭ Common European Framework of Reference for Languages<sup>[1]</sup>

### Piednoto

[1] <http://www.goethe.de/lms/us/lp/prj/ger/cfl/enindex.htm>

**TABULO DE NIVELOJ POR MEMPRITAKSO POR STUDENTO  
laŭ Eŭrop-Sistema priskribo de Lingva Edukado**

		<b>A1 KOMENCANTA "0"</b>	<b>A2 KOMENCANTA ELEMENTA</b>
K O M P R E N O	AŬSKULTE	Mi komprenas konatajn al mi vortojn kaj tre elementajn eldirojn (esprimojn) pri mia persono, familio, proksima konkreta ĉirkaŭmedio, kiam oni parolas al mi malrapide kaj klare	Mi komprenas eldirojn kaj ofte uzatajn vortojn pri plej proksimaj al mi sferoj de la vivo (ekz. bazaj informoj pri mi kaj pri mia familio, pri aĉetoj, geografio de mia regiono, pro laborejo). Mi kapablas kompreni ĉefan ideon de la mallongaj, simplaj komunikoj, anoncoj.
	DE SKRIBITA TEKSTO	Mi komprenas konatajn al mi esprimojn, ekz. nomojn, tre simplajn frazojn, ekz. en la anoncoj, plakatoj aŭ katalogoj.	Mi komprenas tre mallongajn, simplajn tekstojn. Mi kapablas trovi detalan, antaŭvideblan informon en simplaj ĉiutagaj materialoj, kiel anoncoj, reklamo, informiloj, menuoj, horaroj, simplaj privataj leteroj.
P A R O L O	INTERAKCIE	Mi kapablas interkompreniĝi, kondiĉe, ke mia kunparolanto ripetos lub parafrasos pli malrapide tion, kion diris kaj helpas al mi formuli tion, kion mi provas diri. Mi scipovas respondi al demandoj pri miaj proksimaj bezonoj aŭ, kiam temas pri konataj al mi temoj.	Mi kapablas interkompreniĝi en simplaj kaj rutinaj situacioj, kiam okazas rekta intersanĝo de simplaj informoj pri konataj al mi temoj. Mi sukcesas en mallongaj societaj interparoloj eĉ, se mi ne kapablas kompreni tuton kaj mi ne scipovas ankoraŭ memstare daŭrigi la konversacion.
	PRODUKTE	Mi kapablas uzi simplajn esprimojn kaj frazojn, por priskribi lokon, de kie mi devenas kaj homojn, kiujn mi konas.	Mi kapablas uzi serion de esprimoj, frazojn por priskribi en simpla maniero mian familion kaj aliajn personojn, kondiĉojn de la vivo, de mia edukeco kaj de mia nuntempa kaj antaŭa laboro.
S K R I B A D O	SKRIBE	Mi kapablas skribi mallongan, simplan tekston, ekz. sendante salutojn de la ferioj. Mi kapablas plenigi formularon pri miaj donitaĵoj kaj ekz. doni personajn informojn, naciecon, adreson en la formularo de la hotela akceptejo.	Mi scipovas skribi mallongan, simplan noton, novaĵon pri la aferoj proksimaj al mi. Mi scipovas skribi privatan leteron ekz. dankleteron.

		<b>B1 MEZE PROGRESINTA</b>	<b>B2 PLI OL MEZE PROGRESINTA</b>
K O M P R E N O	AŬSKULTE	Mi komprenas la ĉefan klare formulitan penson de la eldiro, en la literatura lingvo, pri la konata al mi temo, kun kiu mi havas kontakton en la laboro, lernejo, dum libera tempo ktp. Mi komprenas la plej ĉefajn informojn dum radiaj kaj TV elsendoj pri nuntempaj eventoj aŭ temojn ligitajn kun miaj personaj aŭ fakaj interesiĝoj, kiam oni parolas prefere malrapide kaj klare.	Mi komprenas pli longajn eldirojn kaj prelegojn kaj eĉ komplikajn argumentadon kondiĉe, ke la temo de la eldiro estas konata al mi. Mi kapablas kompreni la plimulton de la novaĵoj TV kaj programojn pri la nuntempaj eventoj. Mi komprenas filmojn en la originala versio, se la aktoroj uzas literaturan lingvon.
	DE SKRIBITA TEKSTO	Mi kapablas kompreni tekstojn kun la plej ofte uzataj esprimoj ligitaj kun ĉiutaga vivo kaj laboro. Mi komprenas priskribon de la eventoj, sentoj kaj deziroj en la privataj leteroj.	Mi komprenas artikolojn kaj raportaĵojn pri nuntempaj problemoj, kies aŭtoroj prezentas detalajn opiniojn kaj argumentojn. Mi kapablas kompreni nuntempan literaturan prozon.
	INTERAKCIE	Mi sukcesas en la plej multaj situacioj, kiuj povas okazi dum la vojaĝo, kiam estas kontakto kun lingvo parolata. Mi kapablas sen la preparo partopreni en la interparoloj je la konataj al mi temoj kaj pri kiuj mi enteresiĝas aŭ tiuj pri la ĉiutaga vivo (ekz. familio, hobbio, laboro, vojaĝoj kaj nuntempaj eventoj)	Mi kapablas interkompreniĝi sufiĉe flue kaj spontane, kio ebligas konversacion kun eksterlandanoj, denaskaj uzantoj de la lingvo. Mi povas aktive partopreni en la diskuto, klarigante kaj apogante mian vidpunkton.
P A R O L O	PRODUKTE	Mi kapablas kunligi vortoj kaj esprimojn simplamaniere, por priskribi spertojn kaj eventojn, miajn revojn, esperojn kaj ambiciojn. Mi scipovas prezenti la motivojn, kialojn, klarigi planojn kaj prezenti sian opinion. Mi scipovas rakonti iun historion aŭ rakonti enhavon de la filmo aŭ libro aŭ priskribi siajn reagojn.	Mi kapablas prezenti precizan kaj detalan priskribon en diversaj sferoj ligitaj kun miaj interesiĝoj. Mi scipovas prezenti mian vidpunkton je la donita temo, prezentate argumentojn por kaj kontraŭ.
	SKRIBE	Mi kapablas skribi simplan tekston, konstruitan de komplikigitaj frazoj je la temo, kiu min interesas. Mi scipovas skribi privatan leteron, priskribante miajn spertojn kaj impresojn.	Mi scipovas skribi klaran, detalan tekston je multaj temoj ligitaj kun miaj interesiĝoj. Mi povas skribi eseson aŭ raporton, transdonante la informojn aŭ prezentante argumentojn por kaj kontraŭ. Mi scipovas skribi leterojn, prezentante esencon kaj pezon de la spertoj kaj impresoj.
		<b>C1</b>	<b>C2</b>

		<b>PROGRESINTA</b>	<b>TRE PROGRESINTA</b>
K O M P R E N O	AŬSKULTE	Mi komprenas pli longajn, disvolvitajn eldirojn, eĉ se ili ne estas klare konstruitaj kaj kiam ligojn inter ili mi povas nur supozi, ĉar ne estas ili eksplicite signalitaj. Sen pli granda strebo mi komprenas programojn TV kaj filmojn.	Mi ne havas iujn ajn klopodojn por kompreni parolan lingvon, same en rektaj komunikoj kiel pere de la medioj, nek kiam oni parolas rapide. Mi bezonas nur iom da tempo por adaptiĝi al la nova akcento.
	DE SKRIBITA TEKSTO	Mi komprenas longajn kunmetitajn tekstojn faktografiajn kaj literaturajn, kapablante diferencigi ilian stilon. Mi komprenas fakajn artikolojn kaj pli longajn teknikajn instrukciojn, eĉ se ili ne tuŝas mian fakon.	Mi legas sen klopodoj ĉiujn tekstojn, eĉ tiujn, kies formo kaj enhavo havas altan gradon de abstrakcio, ekz. lernolibro, artikolo kun fakaj temoj, literatura verko.
P A R O L O	INTERAKCIE	Mi kapablas esprimi sin flue kaj spontane, sen bezono serĉi esprimojn kaj sen cerbumi. Mi scipovas uzi lingvon elaste kaj efike por societaj kaj fakaj celoj. Mi kapablas formuli precize pensojn kaj opiniojn kaj aktive partopreni en la konversacio, reagi al eldiro de aliaj parolantoj.	Mi kapablas sen iu ajn strebo partopreni en ĉiuj konversacioj kaj diskutoj libere uzante idiomajn kaj ĉiutagajn vortojn. Mi kapablas esprimi sin flue kaj esprimi precize nuancojn de signifo. En kazo de problemoj, mi kapablas lerte ripari eraron tiel, ke tiu manevro restos nerimarkebla.
	PRODUKTE	Mi kapablas prezenti klaran, detalan priskribon de komplikaj temoj, inkluzivate subtemojn, disvolvi apartajn punktojn kaj finante per adekvata konkludo.	Mi kapablas priskribi kaj gvidi klaran kaj fluan argumentadon en konvena por la konteksto, prezenti koncize kaj logike la temon kaj rememorigi al miaj aŭskultantoj ĉefajn punktojn de la prezentado.
S K R I B A D O	SKRIBE	Mi kapablas esprimi miajn pensojn en klara kaj bone konstruita teksto, prezentante sufiĉe vaste sian vidpunkton/opinion. Mi scipovas detale sinesprimi je komplika temo en la formo de letero, esejo aŭ raporto, substrekante la plej gravajn por mi aferojn. Mi scipovas formuli divers-specajn tekstojn uzante adekvatan, personan stilon atentante la adresaton.	Mi scipovas skribi klaran, fluan kaj stile adoptitan tekston al la situacia konteksto. Mi scipovas redakti leterojn, raportojn, referaĵojn pri komplikaj temoj, je klara strukturo, kiu permesas al la leganto kompreni ĉiujn la plej gravajn punktojn. Mi kapablas resumi kaj prezenti skriban kritikon de la scienca aŭ literatura teksto.

## POSTULOJ POR AKIRI LA NIVELOJN DE LINGVOKONO DE ESPERANTO

ISTK/AIS studado	Nivelo	Postuloj
<b>Unua studjaro - Unua semestro</b> 15 STU	<b>Nivelo A1 Komencanta</b> (80-120 horoj)	Persono uzanta la lingvon sur tiu nivelo komprenas kaj kapablas apliki ĉiutagajn eldirojn kaj esprimojn de ĉiutaga vivo. Li/ŝi kapablas prezenti sin kaj aliajn, starigi demandojn pri privata vivo, pri ekz. loko, en kiu loĝas, pri homoj, kiujn konas, kaj pri aĵojn, kiujn posedas. Li/ŝi kapablas simple konversacii kondiĉe, ke kunparolanto parolas malrapide, klare kaj helpeme.
<b>Unua studjaro - Dua semestro</b> 15 STU	<b>Nivelo A2 Komencanta elementa</b> (180-200 horoj)	Persono uzanta la lingvon sur tiu nivelo komprenas eldirojn kaj ofte uzatajn esprimojn de ĉiutaga vivo (ekz. bazajn informojn pri la kunparolanto kaj pri lia familio, pri aĉetaĵoj, pri ĉirkaŭmedio, pri laboro). Li/ŝi kapablas interkompreniĝi en simplaj, rutinaj komunikaj situacioj, kiuj postulas nur simplan, rektan inform-interŝanĝon pri konataj kaj tipaj temoj. Li/ŝi kapablas en simpla maniero priskribi sian devenon, ĉirkaŭmedion, kaj ankaŭ tuŝi problemojn de la plej gravaj bezonoj de la ĉiutaga vivo.
<b>Dua studjaro - Tria kaj kvara semestroj</b> 30 STU	<b>Nivelo B1 Meze progresinta</b> (350-400 horoj)	Persono uzanta la lingvon sur tiu nivelo komprenas signifon de la plej gravaj komunik-sufetoj de klaraj, standartaj eldiroj, kie temas pri konataj al li/ŝi aferoj kaj eventoj tipaj por laboro, lernejo, libera tempo ktp. Li/ŝi kapablas sukcesi en multaj komunikaj situacioj, kiuj povas okazi dum vojaĝo en la regiono, kie oni parolis en tiu lingvo. Li/ŝi kapablas krei simplajn, ligitsencajn eldirojn pri la konataj al li/ŝi temoj aŭ pri la temoj, kiuj interesigas lin/ŝin. Li/ŝi kapablas priskribi spertojn, eventojn, revojn, esperojn kaj aspirojn, mallonge argumentante siajn opiniojn kaj planojn.

<b>Tria studjaro - Kvina kaj sesa semestroj</b> 30 STU	<b>Nivelo B2 Pli meze progresinta</b> (500-600 horoj)	Persono uzanta la lingvon sur tiu nivelo komprenas signifon de la plej gravaj komunik-sufetoj en la komplikitaj tekstoj pri konkretaj kaj abstraktaj temoj, inkluzive komprenon de la diskuto pri teknikaj temoj je amplekso de lia/ŝia fako. Li/ŝi kapablas interkomunikiĝi tiel flue kaj spontane, ke eblas gvidi normalan interparolon kun denaska uzanto de tiu lingvo, sen streĉado de iu ajn flanko. Li/ŝi kapablas formuli eldirojn buŝajn kaj skribajn en vasta gamo de la temoj, kaj ankaŭ klarigi sian starpunkton pri la diskutataj aferoj, konsiderante mankojn kaj avantaĝojn de diversaj solvoj.
<b>Kvara studjaro - Sepa kaj oka semestroj</b> 30 STU	<b>Nivelo C1 Progresinta</b> (700-800 horoj)	Persono uzanta la lingvon sur tiu nivelo komprenas vastan gamon de malfacilaj, longecaj tekstoj, rimarkante ankaŭ kaŝitan signifon, esprimitan malrekte. Li/ŝi kapablas esprimi sin flue, spontane, sen pli granda peno trovante ĝustajn esprimojn. Efike kaj libere li/ŝi kapablas uzi la lingvon en societaj kaj sociaj, edukaj aŭ fakaj kontaktoj. Li/ŝi kapablas formuli klarajn, bone konstruitajn, detalajn eldirojn pri komplikitaj problemoj, lerte kaj ĝuste uzante regulojn pri organizado de la eldiro, konjunkciojn kaj indikilojn de la teksta interligo.
<b>Kvina studjaro - Naŭa kaj deka semestroj</b> 30 STU	<b>Nivelo C2 Tre progresinta</b> (1000-1200 horoj)	Persono uzanta la lingvon sur tiu nivelo povas facile kompreni praktike ĉion, kion ekaŭdos aŭ tralegos. Li/ŝi kapablas resumi informojn de aliaj fontoj, skribajn aŭ parolajn kunligmetode reproduktante ĝiajn tezojn kaj klarigojn. Li/ŝi kapablas esprimi siajn pensojn tre flue, spontane kaj precize, subtile diversigante signifecajn nuancojn eĉ en pli komplikaj eldiroj.



## Esperanto Organizoj en Bydgoszcz en 2011 jaro



**Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo  
„KUJAVIO kaj POMERELIO”  
Międzynarodowe Centrum Kultury i Turystyki  
„KUJAWY i POMORZE”**

str. M. Skłodowskiej–Curie 10, PL85–094 Bydgoszcz, Pollando  
tel/fakso: +48 52 346 11 51,

retpaĝoj: [www.esperanto.bydgoszcz.eu](http://www.esperanto.bydgoszcz.eu); [www.esperanto-turismo.za.pl](http://www.esperanto-turismo.za.pl)  
retadreso: [info@esperanto.bydgoszcz.eu](mailto:info@esperanto.bydgoszcz.eu); [esperanto-turismo@wp.pl](mailto:esperanto-turismo@wp.pl)



**Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo - Centro de Konstanta  
Edukado – Klerigejo de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS/AKB)  
Międzynarodowe Studium Turystyki i Kultury - Centrum Kształcenia  
Ustawicznego – Uczelnia Międzynarodowej Akademii Nauk (AIS/AKB)**

str. M. Skłodowskiej – Curie 10, PL85–094 Bydgoszcz, Pollando  
tel/fakso +48 52 346 11 51

retpaĝoj: [www.esperanto.bydgoszcz.eu](http://www.esperanto.bydgoszcz.eu); [www.esperanto-studium.za.pl](http://www.esperanto-studium.za.pl)  
retadreso: [stud@esperanto.bydgoszcz.eu](mailto:stud@esperanto.bydgoszcz.eu) ; [stud-esperanto@wp.pl](mailto:stud-esperanto@wp.pl)

**Internacia Klubo „ESPERANTOTUR”  
Międzynarodowy Klub „ESPERANTOTUR”**

str. M. Skłodowskiej–Curie 10, PL85–094 Bydgoszcz, Pollando  
tel/fakso +48 52 346 11 51,

retpaĝoj: [www.esperanto.bydgoszcz.eu](http://www.esperanto.bydgoszcz.eu); [www.esperanto-turismo.za.pl](http://www.esperanto-turismo.za.pl)  
retadreso: [stud@esperanto.bydgoszcz.eu](mailto:stud@esperanto.bydgoszcz.eu); [andreo@rubikon.net.pl](mailto:andreo@rubikon.net.pl)



**Pola Esperanto-Asocio – Filio en Bydgoszcz  
Polski Związek Esperantystów Oddział w Bydgoszczy**

str. Chłodna 23A, PL85-345 Bydgoszcz, Pollando,  
tel. +48 52 323 70 99

retadreso: [skonpres.poczta.onet.pl](mailto:skonpres.poczta.onet.pl);



**Klubo „ESPERANTA AMIKO” ĉe Pola Asocio de Nevidantaj  
Klub „ESPERANTA AMIKO” przy Polskim Związku Niewidomych**  
str. Powstańców Wielkopolskich 33, PL85-090 Bydgoszcz, Pollando  
tel. +48 52 323 70 99, retadreso: [lennaa@go2.pl](mailto:lennaa@go2.pl);



## Enhavtabelo

<b>Antaŭparolo de la eldonisto</b> .....	3
<b>Enkonduko de la aŭtoro</b> .....	6

### UNUA PARTO

<b>1. Nocioj</b> .....	8
1.1. Kultura diverseco .....	20
1.1.1. Multkultureco .....	25
1.1.2. Interkultureco .....	31
1.1.3. Limoj kaj apudlimoj .....	39
1.2. Edukado en kondiĉoj de kultura diverseco .....	48
1.2.1. Multkultura edukado .....	51
1.2.2. Interkultura edukado .....	59
1.2.3. Regiona edukado .....	72
1.2.4. Civita edukado .....	78
<b>2. Interkultura pedagogio - de eduka praktiko al pedagogia subdisciplino</b> .....	83
Al sinsekvaj ideologioj de multkulturismo respondas politikaj praktikoj kun diversaj gradoj de radikaleco kaj populismo. Ili estas diversmaniere akceptataj de socioj. La bazo de ili ĉiuj estas tamen plifortigo de etnaj limoj. Multe pli klare kaj draste ili tuŝadas Fremdulojn (ekz. migrantojn), ol „proprajn“

---

<sup>1</sup> W.Burszta: *Wielokulturowość...*, *op.cit.*, pp.151– 152.

Diferenculojn (ekz. handikapulojn, minoritatojn seksajn, religiajn ktp.).

Peter McLaren rilate al usonaj kondiĉoj, indikas jenajn tipojn de ideologioj de multkulturismo, kiuj bildiĝas en socia praktiko:

- konservema ideologio – la dominanta, blankhaŭta majoritato permesas multkulturecon kaj traktas etnajn minoritatojn kiel „aldonaĵon” al eŭroamerika kulturo; multkultureco estas kontrolata kaj ĝi komenciĝas de restriktita politiko de enmigro;
- libereca ideologio – kvankam ekzistas natura egaleco inter blankhaŭtuloj kaj aliaj rasaj populacioj, tamen reale ĝi ne aperas, ĉar ne estas egalaj eblecoj de socia kaj eduka memrealigo de opresataj grupoj (de „kolorhaŭtuloj”); pro tio, oni bezonas fundan renovigon de ŝtato, kies celo estus praktika realigo de ideo de egaleco;
- maldekstrule-libereca ideologio – universaleca humanismo, kiu estas bazo de ideologio de egaleco, verdire ombrigas esencajn kulturajn diferencojn inter rasoj; nur agnosko de ili vere helpas kompreni esencon de diferencaj agadoj, valoroj, aliroj, stiloj de kono kaj sociaj praktikoj; ŝatantoj de tiu ĉi formo de ideologio koncentriĝas sur elmontrado de diferencoj ligitaj kun raso, klaso, sekso, seksaj preferoj kaj religio; pro tio, kun tiu ĉi speco de ideoj simpatias ekz. diversaj movadoj de seksaj minoritatoj (feministinoj, samseksemuloj ktp.);
- kritika ideologio – rifuzo de konservema kaj libereca premo sur „samecon” kaj de maldekstrule-libereca serĉado de „diferenco”; diferenceco bazita sur etno-rasaj diferencoj ne estas celo, sed pozitiva argumento por subtenado de diverseco kadre de kultura kriticismo realigata en sociala politiko;

ŝtatapolitiko devas esti plurcentra kaj ĝi devas celi konstruadon de demokratia kulturo malfermita je diferenceco.<sup>1</sup>

En la 80-aj jaroj de la XX-a jarcento, koncepton de multkultureco oni utiligis en esploroj pri socioj de Okcidenta Eŭropo. Tiel okazis, ĉar oni rimarkis etnan diversecon de la socioj kaj du diversajn fontojn de tiu ĉi fakto. Unue, ĉar en esplorataj landoj ekzistas eŭropaj nacioj kaj subigitaj al ili etnaj grupoj (ekz. Eŭskoj, Bretonoj, Kimroj). Due, ĉar pro migradoj de iamaj kolonioj al metropoloj, naskiĝis enmigrolaj socioj. Fenomeno de multkultureco estis tiam taksita kiel natura efiko de ekonomiaj ŝanĝoj kaj de politika libereco en tiuj ĉi landoj.<sup>2</sup> Al eŭropaj landoj, en kiuj oni renkontas la plej radikalan ideologion de multkulturismo, apartenas Belgio, Nederlando, Britio kaj skandinaviaj landoj. Tio ĉi dependas de ilia kolonia pasinto, diversaj gradoj de malfermo de landlimoj, diferencaj politikoj rilate al minoritatoj, ekonomia situacio ktp.<sup>3</sup>

---

<sup>1</sup> *Ibid.*, pp.152–153. – Pli vaste: P.McLaren: *Critical Pedagogy, Multiculturalism and the Politics of Risk and Resistance. A Reponse to Kelly and Portelli*, “Journal of Education”, No 3/1991.

<sup>2</sup> D.Wojakowski: *Wielokulturowość pogranicza...*, *op.cit.*, p.118.

<sup>3</sup> Pli vaste: G.Hermet: *Multiculturalisme et démocratie en Europe* [en:] R.Kastoryano (org.): *Quelle identité pour l'Europe?*, Paris 1998, pp.261–267; V.Guirardon: *Multiculturalisme et droit étrangers dans l'Union européenne* [en:] *Ibid.*, p.143–166.

### 1.1.2. Interkultureco

Nocio „interkultura” aperis en la 70-aj jaroj de la XX-a jarcento en Usono, kaj poste en Kebekio por priskribi daŭrajn, dinamikajn interagadojn (rilatojn) inter membroj de apartaj kulturoj. Komence oni substrekadis, ke unu el flankoj de la rilatoj havas originon de migranto.<sup>1</sup> En Eŭropo la nocio por la unua fojo aperis en 1975 en Francio kiel „*interculturel*” kaj rilatis al lernejoj aferoj. Baldaŭ oni uzadis ĝin ofte, priskribante malfunkciaĵojn kaj krizojn en sfero de migradoj kaj socia agado. En la 80-aj jaroj aperis la unuaj sciencaj esploroj kaj publikaĵoj tiurilate.<sup>2</sup>

En internacia forumo, pri interkulturaj rilatoj oni menciis por la unua fojo en 1976 dum Ĝenerala Konferenco de UNESCO en Nairobio (Kenio), en kunteksto de neceso de malfermiĝo de ĉiu nuntempa kulturo je ĉiuj aliaj kulturoj.<sup>3</sup> Pri interkulturaj rilatoj oni okupiĝis por la unua fojo dum okazanta paralele konferenco de Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj: „*En kazo de regulo de kultura aŭtentikeco, decas starigi problemon de dialogoj inter kulturoj. Fronte al danĝero de favorigado de naciaj dividoj kaj ĉiuspekaj segregacioj estas grave, en larĝa internacia perspektivo malfermi ĉiun kulturon je ĉiuj aliaj kulturoj. Unuaflanke do esenco de reciprokaj rilatoj kaj duaflanke ilia interkultureco, ŝajnas - kiel ĉi ambaŭ kategorioj - kompletigaj kaj permesas ekvilibrigi entreprenitajn agadojn.*”<sup>4</sup>

Komence, la interkultura temaro estis identigata ĉefe kun aferoj rilataj al enmigrintoj (precipe al iliaj infanoj en lerneja aĝo), kio malfavore misfamigis ĝin kiel asociatan kun alarmismaj, eĉ katastrofismaj sintenoj ligitaj kun diskuto pri migradoj.<sup>5</sup>

Kvankam komence la nocio de interkultureco funkciis ĉefe en sistemo de klerigado, nuntempe oni utiligas ĝin interalie ankaŭ en didaktiko de fremdaj lingvoj, komerco kaj juro, pro kio iel ŝanĝigas ĝia valoro kaj signifa firmeco. En eŭropaj internaciaj organizoj interkultureco estas pritraktata kiel maniero de organizado de vivo de individuoj kaj grupoj apartenantaj al diferencaj kulturaj homamasoj. Tiuj ĉi personoj kontaktiĝas kaj kunorganizas siajn vivajn situaciojn, en kiuj kelkaj elementoj estas komunaj, aliaj tamen diferencaj. Unuaflanke do ilia kunagado okazas en konsento - sed duaflanke tuŝas konflikton. Al tiuj ĉi personoj oni almenaŭ ebligas elekti ĉu specon de aktivado kadre de aŭtonomio, ĉu solidarecon kun statuso de civitano aŭ membro de aparta grupo - al ĉiuj laŭ sama leĝo. Tiel komprenata interkultureco iĝas la fundamento de sociala laboro en kulture diversigitaj medioj.<sup>1</sup>

La aksjologia akso de interkultureco estas filozofia koncepto de homo rigardata kiel individuo libera kaj respondenca, enskribita en komunumon de similuloj. La homo ne estas produktaĵo de sia kulturo, sed estas ĝia kreanto kaj partoprenanto. Estas kreaĵo de ensociigo en kulture diversigita grupo, al kiu apartenas personoj, kies valoraĵojn, agadojn kaj individuajn trajtojn oni ne rajtas neglekti.<sup>2</sup> Dominique Bouchet pli detale priskribante situacion de homo en interkultureco asertas, ke:

- neniu kulturo ekzistas en fermita kaj homogena formo;
- ĉiu kulturo estas formo de transmetado de propraj valoraĵoj kaj modeloj, kiuj povas esti objekto de profundaj ŝanĝoj; pro tio, kulturo havas karakteron de procezo en diversaj statoj;
- neniu estas tipa membro de grupo;
- neniu estas membro de nur unu izolita grupo, kaj sian identon konstruas kompare al membroj de diversaj grupoj;

<sup>1</sup> M.Cohen-Emerique: *L'approche interculturelle auprès des migrants* [en:] G.Légault (org.): *L'intervention interculturelle*, Montréal-Paris 2000, p.171.

<sup>2</sup> M.Abdallah-Pretceille: *L'éducation...*, op.cit., p.44.

<sup>3</sup> Pli vaste: C.Clanet: *L'interculturel. Introduction aux approches interculturelles en Éducation et en Sciences Humaines*, Toulouse 1993, p.24.

<sup>4</sup> *Ibid.*, p.24. Substreko mia – P.G.

<sup>5</sup> M.Abdallah-Pretceille: *L'éducation...*, op.cit., p.46.

<sup>1</sup> O.Filtzinger: *Interculturalité européenne dans le travail social* [en:] J.Demorgon, E.M.Lipiansky (org.): *Guide de l'interculturel en formation*, Paris 1999, p.43.

<sup>2</sup> M.Abdallah-Pretceille: *L'éducation...*, op.cit., p.45 kaj sekvaj.



- neni ricevas sian identon en preta kaj neŝanĝebla formo.<sup>1</sup>

Laŭ Martine Abdallah-Pretceille, enkonduko de la nocio „interkultureco“ permesis rigardi kulturon el kelkaj novaj perspektivoj.

En subjektivisma perspektivo oni supozas rilatojn inter du individuoj (individuigitaj subjektoj), kiujn karakterizas difinitaj kulturaj trajtoj. Ĉiu el la individuoj en sia propra opinio akiris la trajtojn en unika kaj ekskluziva maniero ligita kun aĝo, sekso, pozicio en medio kaj kun aliaj personaj ecoj. En tiu ĉi perspektivo oni do parolas pri renkontiĝo ne de tutaj kulturoj (kiel en multkultureco), sed pri renkontiĝo de apartenantaj al ili individuoj. La individuoj enportas proprajn, originalajn sistemojn de valoraĵoj kaj normojn, kiujn ili uzadas dum interagado. Danke al tio, en interkulturaj rilatoj ĉiufoje oni malkovras unuopan, unikan dimension de kulturo de ĉiu Diferenculo/Fremdulo aparte. De tiu ĉi malkovro dependas malfemiĝo je Diferenculo/Fremdulo kaj dialogo kun li. Tio permesas ankaŭ konstati, ke propra kulturo iĝas obstakla en tia situacio.

En interaga perspektivo, interkultura situacio supozas ekziston de almenaŭ du partoprenantoj de interago. Pro tio, iu ajn rilatigo al Diferenculo/Fremdulo ne povas okazi sen konsidero de Mi. Krome, la situacio de Mi estas multe pli problema kaj deviganta entrepreni iujn paŝojn, ol situacio de partoprenanta en la interago Diferenculo/Fremdulo, kies bildo enhavas specifajn antaŭkonjektojn kaj atendojn. Tie ĉi temas pri ekkonscio pri propra bildo perceptata de la Diferenculo/Fremdulo. Pro tio, pozicio de Mi estas ĉiam relativa.

Situacia perspektivo permesas rimarki, ke interkultureco ne koncernas nur aferojn de normoj kaj valoraĵoj perceptataj dum interago de kulture diferencaj partneroj. En ĝi oni krome parolas pri diferenco de iliaj pozicioj (statusoj), ĉar kulturoj ĉiam estas enradikigitaj per historiaj, ekonomiaj kaj politikaj faktoroj, kiuj influadas karakteron de interagoj de personoj je specifa kultura

idento. Ĉiam do unu el la kulturoj (do ankaŭ ĝia membro) estas perceptata kaj valorigata supere kiel dominanta, kaj la alia malsupere - kio provokas sekvojn en interpersona medio.<sup>1</sup>

En socjodinamika perspektivo, interkulturecon kunkreas do „(...) *ensemblo de procezoj generataj en interkulturaj interagadoj - psikaj, rilataj, grupaj, instituciaj - kiuj estas ligitaj kun reciproka interŝanĝo, en perspektivo de konservo de relativaj kulturaj identoj de rilatantaj partneroj kaj de ŝanĝoj kaj transformoj aperintaj pro tiuj ĉi interagadoj.*“<sup>2</sup>

En psikosocia perspektivo interkultureco estas interagado de du identoj, kiuj reciproke donas unu al la alia sencojn en ĉiukaze difinitaj kunteksto. La interagado okazas en jenaj planoj: sensa (rimarkado kaj konado per sensoj), kona (komprenado, eksplikado, valorigado) kaj orientiga (komenco de ago kaj ligitaj kun ĝi adekvataj decidoj). Ĝi estas ontologia procezo de atribuo de signifoj kaj dinamika procezo de identa konfrontado, kio foje povas gvidi al negativaj sekvoj de konflikto de identoj.<sup>3</sup> Tiuspeca situacio povas okazi facile, ĉar apogante sin sur teorio de atribuo oni povas diri, ke:

- personoj apartenantaj al diferencaj kulturoj alimaniere interpretados samajn agojn, gestojn ktp.;
- en diferencaj kulturoj aliaj aferoj estas traktataj kiel gravaj;
- atribuo en interkultura situacio povas apogi sin sur miskompreno kaj erara interpreto.<sup>4</sup>

En kazo de interkultura aliro al problemo de diverseco de individuoj kaj grupoj, tute nova estas la maniero percepti ilin, analizi kaj konstati okazantajn faktojn, sen ligi ilin kun politiko kaj/aŭ ideologio - kiel tio okazas en la kazo de multkultureco.<sup>5</sup> La interkultura aliro permesas elmontri, ke ĉiun socion eblas

<sup>1</sup> M.Cohen-Emerique: *L'approche...*, op.cit., pp.171–172.

<sup>2</sup> C.Clanet: *L'interculturel...*, op.cit., p.21.

<sup>3</sup> M.Cohen-Emerique: *L'approche...*, op.cit., p.172.

<sup>4</sup> M.Cohen-Emerique: *Connaissance d'autrui et processus d'attribution en situations interculturelles* [en:] J.Retschitzky kaj al. (org.): *La recherche...*, op.cit, vol.1, p.26 kaj sekvaj.

<sup>5</sup> Pli vaste: C.Clanet: *L'interculturel...*, op.cit., p.18 kaj sekvaj.

<sup>1</sup> L.Korporowicz: *Wielokulturowość a międzykulturowość. Od reakcji do interakcji* [en:] M.Kempny kaj al. (org.): *U progno...*, op.cit., pp.70–71.

priskribi laŭ kategorioj de ĝiaj karakterizaj trajtoj kaj konfliktoj; ke idento de la socio aperis en maniero unika kaj specifa, ĉar ankaŭ unikaj kaj specifaj estas la individuoj, kiuj kunkreas ĝin. Tiel eblas percepti kulturojn de Diferenculoj/Fremduloj ne kiel ion ekzotan kaj folkloran, sed kiel estaĵojn posedantajn propran unikan logikecon.<sup>1</sup>

Laŭ Claude Clanet, danke al la nocio „interkultureco” eblas pli riĉe priskribi kulture diferencigitan realon, en kiu inter kulturoj okazas reciprokaj rilatoj. Tiukaze, en sino de unu lando aŭ nacio oni parolas ne nur pri ekzisto de diversaj kulturaj subjektoj (individuoj, grupoj kies kulturo estas diferenca de la kulturo de dominanta kaj reganta grupo). Krome, oni donas rajton ekzisti al kulture diferencaj personoj, akceptante malfacilaĵojn ligitajn kun tiu ĉi fakto. La antaŭvidataj malfacilaĵoj koncernas ne nur la majoritaton, sed ankaŭ membrojn de minoritatoj. La Diferenculoj/Fremduloj ricevas rajton evolui danke al rilatoj, kiuj - paradokse - plilarĝigas komunecon de kulturaj rilatoj kaj permesas konservi propran identon al ĉiu el flankoj partoprenantaj en ili.<sup>2</sup>

Parolante pri sociaj rilatoj en interkultura perspektivo, oni perceptas individuon kiel aktivan partoprenanton de socia vivo. Interkulturecon eblas do priskribi kiel dinamikan staton de socio, en kiu aperas kaj daŭras regulaj rilatoj inter personoj, kiujn karakterizas diferencaj kulturaj identoj. Tiuj ĉi rilatoj permesas krei harmonian formaĵon, en kiu oni superas diferencojn ne forigante ilin.<sup>3</sup> Tiuspeca stato malgraŭ ĉio postulas pravigon kaj legaligon fare de la medio, kio ne ĉiam okazas per si mem kaj sen kontraŭstaroj.

Interkulturajn rilatojn eblas serĉi kaj en socioj, en iliaj sektoroj (ekz. familioj, lernejoj, entreprenoj, lokaj grupoj ktp.), kaj ankaŭ en sociaj agadoj - de etaj iniciatoj ĝis internacia

kunlaboro.<sup>1</sup> Iliaj partoprenantoj akiras konscion, ke ilia kulturo havas plenan rajton ekzisti (kiel ĉiu alia kulturo), kaj sekve de tio ĉiu rajtas esti diferenca. En interkultureco sur la sama teritorio loĝadas personoj apartenantaj al diversaj kulturoj, kontaktas unuj kun la aliaj, interŝanĝas komunikaĵojn, valoraĵojn, vivmodelojn ktp. Danke al tio, ĉiu individuo havas okazon por cerbumi pri propra kulturo; akiri distancon al aliaj kulturoj kaj disvolvi diversajn sintenojn je kultura diferenco. Eblas do paroli pri stato (kulturo) de dialogo de kulturoj, en kiu oni estas preta je ŝanĝoj.<sup>2</sup>

En interkultureco aperas nova speco de socia interkonsento, en kiu temas ne pri unuecigo de ideoj kaj reguloj de agado, sed pri akirado de valora diverseco kaj kiel eble plej granda libereco de agado.<sup>3</sup> Ĉiu interkultura aktivado dependas do de personaj sintenoj de individuoj kaj medioj.<sup>4</sup> Jen bazaj kondiĉoj de ekzisto de interkultureco:

- adekvata, daŭra komunikado inter kulture diferencaj partneroj, kiuj permesas malkovri diferencojn en Diferenculoj/Fremduloj kaj en si mem, kaj instruas kiel vivi kun la diferencoj;
- kreado kaj subtenado de sistemo de sintenoj en situacio de diverseco;
- enkuraĝigado de internaj disponoj je kreado kaj subtenado de dialogo;
- ekkonado de efikoj de influo de kulturo kaj kultura diferenco sur partneron en dialogo;
- kolektado de ĉiuj eblaj informoj pri specifaĵoj de kulturaj sistemoj, por esti preta partopreni en ili;
- integrado de diferencoj de Diferenculoj/Fremduloj kun similaĵoj - laŭ ideo, ke similaĵoj ofte estas kialoj por percepti diferencojn;

<sup>1</sup> *Ibid.*, p.363.

<sup>2</sup> M.Taylor uzas nocion “interkulturo”. – Pli vaste: M.Taylor: *Concepts-clés...*, *op.cit.*, p.25.

<sup>3</sup> C.Camilleri: *Les conditions de base de l'interculturel*, “Quaderni – Pour une société interculturelle”, No 6/1992, pp.44–45.

<sup>4</sup> Pli vaste: M.Abdallah-Pretceille, L.Porcher: *Éducation et communication interculturelle*, Paris 1996, p.57 kaj sekvaj.

<sup>1</sup> L.Porcher, M.Abdallah-Pretceille: *Éthique de la diversité et éducation*, Paris 1998, p.28.

<sup>2</sup> C.Clanet: *L'interculturel...*, *op.cit.*, pp.20–22.

<sup>3</sup> C.Camilleri: *La communication...*, *op.cit.*, p.389.

- estado preta je ŝanĝoj de situacioj kaj je perceptado de problemoj ne kiel baroj;
- permesado al Diferenculoj/Fremduloj „sin gvidi”, por akiri scion pri grado de ebla proksimiĝo.<sup>1</sup>

La procezon de interkultureco favorigas jenaj trajtoj de ĝiaj partoprenantoj:

- traktado de diferenco kiel pozitivan trajton;
- natura garantiado al individuo ĝian liberecon kaj kulturecan moveblecon;
- konscio pri ekzisto de:
  - diferencaj sintenoj kaj aliaj elementoj de personeco, danke al kiuj oni perceptas en la mondo ne nur sin mem;
  - niveloj de interkultura situacio (je diversaj niveloj rivebligas diversaj sintenoj kaj ligitaj kun ili reagoj);
  - komplikeco de interkultura situacio (en ĝi temas ne nur pri bona edukado kaj deca konduto, sed pri agoj kun pli profunda senco);
  - kultura relativismo (ĉiu kulturo havas rajton ekzisti; oni ne rajtas hierarkie valorigi kulturojn);
  - kulturaj diferencoj, kiuj malfaciligas kaj foje eĉ malebligas senkonfliktajn kontaktojn;
- en problemiga situacio, la kompetenteco:
  - dinamikiĝi propran kulturon, por solvi aperantajn problemojn kaj konfliktojn - kaj se la solvo ne eblas, serĉi transcendantajn valorojn de la situacio, kiujn eblas pritrakti aparte;
  - rimarki en homo la finan celon kaj ne rimedon por solvo de problemoj (kompetenteco elekti inter valoraĵoj de propra kulturo kaj bono de homaro);
  - transiri la sferon de Mi kaj Ni.<sup>2</sup>

La ĉi supraj elementoj kunkreas interkulturecan kompetentecan. Oni akiradas ĝin dum interkultura lernado, kiu estas procezo de individua disvolvado, kies sekvoj estas gravaj por medio de individuo. En tiu ĉi lernado oni pli kaj pli bone

komprenas sin mem kaj aliajn personojn; pli kaj pli konstatas kulturecan relativismon. Ĝi helpas kompreni komplikecon de la mondo, konscie koncentriĝi sur konstruado kaj evoluigado de propra idento, rimarkadi ŝanĝojn, tensiojn kaj konfliktojn en ĉirkaŭanta realo.

Dum interkultura lernado homo pli bone konatiĝas kun si mem, iom post iom akiras pli grandajn eblecojn agadi kaj kompetentecan superi diversajn malfacilaĵojn. Konfrontiĝante kun aliaj ol propraj normoj, skalo de valoraĵoj, stiloj de agado ktp., homo komencas percepti realon el diversaj vidpunktoj, ekkonas novajn modelojn de agado por adaptiĝi al la modeloj devigaj en aliaj kulturoj. Por ke interkultura lernado sukcesu, homo bezonas posedi kompetentecan enprofundiĝi en interna sistemo de sencoj de informoj ricevataj de Diferenculo/Fremdulo. Oni devas antaŭsenti kaj malkovradi kaŝitajn signifojn (ekz. ekster literatura lingvaĵo), kaj danke al tio agadi konvene al stilo de pensado de Diferenculo/Fremdulo.

Interkulturecan lernadon kaj akiradon de interkultureca kompetenteco favoras disvolvado de sinteno de malfermo je aliaj kulturoj, scio ekkonadi novajn mediojn kaj kapablo adaptiĝi dum kontaktoj kun Diferenculoj/Fremduloj, danke al superado de propraj stereotipoj.<sup>1</sup> Jen la kondiĉoj de interkultura lernado kaj akirado de interkultureca kompetenteco:

- decentriĝo - traktado de si mem kun distanco, ligita kun konscio de propra aparteco kaj unikeco kiel individuo posedanta trajtojn naciajn, etnajn, religiajn, profesiajn, instituciajn ktp.; ĉio ĉi permesas relativigi proprajn observojn de Diferenculoj/Fremduloj;
- malkovrado de distanco en rilatoj kun Diferenculo/Fremdulo - enprofundiĝo en kultura sistemo de Diferenculo/Fremdulo kaj ĝia ekkonado de interne; tiu ĉi procezo tute ne devas esti senpripensa kaj ligita kun senkritika akcepto de ĉio diferenca;

<sup>1</sup> M.Golka: *Oblicza...*, op.cit., pp.61–63.

<sup>2</sup> C.Camilleri: *La communication...*, op.cit., pp.392–397.

<sup>1</sup> A.Grima Camilleri: *Comme...*, op.cit., p.55 kaj sekvaj; S.Martinelli, M.Taylor (org.): *Uczenie...*, op.cit., pp.14–30.

- kultura mediaciado/negociado - supozante, ke kulturaj kodoj de partoprenantoj de interagado enhavas elementojn kontraŭajn aŭ konfliktigajn, oni penas akiri kompromison ligitan kun estimo al kultura idento de la partoprenantoj.<sup>1</sup>

Sendube en kazo de nocio „interkultureco“, grava estas la prefikso „inter-“, kiu koncernas neeviteblajn, reciprokajn rilatojn de individuoj, grupoj kaj identoj. Evidente kun tiuspeca traktado de realo estas ligita danĝero de falo en ideologion kaj utopion, kies bazo estus ideala socio konstruita en rilatoj fonditaj sur dialogo kaj kompreniĝo. C.Clanet rimarkas, ke ideo de interkultura socio ne estas (aŭ estas ne nur) utopia kaj humanisma projekto de vivo, perceptata kiel respondo je maldaŭraj malfacilaĵoj. Ĝi estas reala respondo de defioj, kiuj koncernas nuntempajn socikulturajn sistemojn.<sup>2</sup>

### 1.1.3. Limoj kaj apudlimoj

Danke al unika absorbkapableco de homa racio kaj de ĝia senĉesa strebado kreadi kaj rekreadi (eĉ senkonscie) propran personecon, homo iom post iom ĉerpas novajn kulturajn modelojn. En tiu ĉi procezo diferencaj estas: nombro de ĉerpataj elementoj, rapideco de la procezo kaj daŭro de ĝiaj rezultoj en homaj sintenoj kaj agado. Ĉiam tamen, la procezo okazas surbaze de transirado aŭ/kaj forigado de limoj. „Okazas tiam malapero de fremdaĵoj, kiuj iĝas propraj kaj kiel tiaj estas akceptataj.“<sup>3</sup>

Laŭ Piotr Kowalski limo estas:

- tereno inter apudaj teritorioj, kiu apartenas al neniuj el ili, samtempe ilin ligas kaj disigas;
- loko la plej fora de centro (en nokia, emocia senco);
- unika kritika punkto, ekster kiu komenciĝas alia mondo (malkomprenebla, danĝera, senorda);

<sup>1</sup> M.Cohen-Emerique: *L'approche...*, op.cit., pp.175–183.

<sup>2</sup> C.Clanet: *L'interculturel...*, op.cit., p.34.

<sup>3</sup> B.Bartz: *Idea wielokulturowego wychowania w nowoczesnych społeczeństwach*, Duisburg–Radom 1997, p.111.

- samtempe protektaĵo kontraŭ ĥaoso kaj pordo gvidata al ĝi.<sup>1</sup>

Kvankam el etimologia vidpunkto, en multaj lingvoj la nocio „limo“ ligiĝas kun la nocio „apudlimo“, tio tute ne signifas, ke ili estas sinonimoj. Limo signifas iun linion de divido, kaj apudlimo estas areo apud la limo.<sup>2</sup>

Hodiaŭ, sen grandaj problemoj oni povas transiri fizikajn limojn (precipe landlimojn). Multe pli malfacilaj por transiri kaj forigi estas tamen limoj kreitaj de homoj en propraj rilatoj. Ili ne estas limoj de teritorioj, sed tiuj de normoj kaj kulturaj modeloj. Ankoraŭ antaŭ mallonga tempo, transirado de naciaj limoj (kaj konsekvence ankaŭ de aliaj limoj), estis ligitaj kun milita aŭ psikologia agreso. Tiam, apudlimojn karakterizis etoso de defendo aŭ venko - depende de pozicioj de kontaktiĝantaj personoj. Tiu ĉi situacio influadis sur konscion de vivo en la apudlimo kaj provokis specifajn aktivaĵojn de personoj partoprenantaj en neeviteblaj kontaktoj.<sup>3</sup> Nuntempe, danke al globaligo de plimulto de sferoj de vivo kaj de deklarata en internaciaj kontaktoj demokratiigo de kunvivado de grupoj kaj individuoj, la nocioj „limoj“ kaj „apudlimoj“ akiris tute novajn dimensiojn. Janusz Kuczyński trafe rimarkas, ke: *“Limo estas ĉie, do la nuntempa ideo kaj spirito de apudlimo estas ĉiutage necesa, eĉ kiel kondiĉo de ekzisto. (...) Hodiaŭ, kiam renkontiĝas pli kaj pli multaj elementoj, karaktero de limoj kaj apudlimoj devas funde ŝanĝiĝi. Tio ĉi koncernas precipe spiritajn kaj kulturajn limojn, kiuj troviĝas absolute ĉie. La iamaj spiritoj de milita apudlimo devas ŝanĝiĝi je spiriton de sinergio, ĉiuspeca kaj reciproka kunagado.”*<sup>4</sup>

En la ĉi supra kunteksto, nuntempe „apudlimo“ estas do areo troviĝanta ekster centro de diferencoj kaj fremdecoj. Sur tiu ĉi areo eblas komparadi, malkovradi, elmontradi surpriziĝon,

<sup>1</sup> P.Kowalski: *Granica.Próba uporządkowania kategorii antropologicznych* [en:] T.Smolińska (org.): *Pogranicze jako problem kultury*, Opole 1994, pp.143–151.

<sup>2</sup> T.Smolińska (org.): *Pogranicze...*, op.cit., p.5.

<sup>3</sup> Pli vaste: J.Kuczyński: *Młodość...*, op.cit., pp.106–107.

<sup>4</sup> J.Kuczyński: *Młodość...*, op.cit., pp.100–101.



scivolemon, negociadi ktp. Sur la apudlimo ekzistas specifa tipo de interhomaj rilatoj. Ĝi estas la natura medio de homoj de erao de globaligo.

Apudlimo kiel kultura fenomeno estas rezulto de ekzisto de limo, kiun iam en foraj tempoj, oni prizorgadis, estimadis kaj kiu iĝis *sacrum* (sanktaĵo). Nature, apudlimo malofte estas areo de nur unu kulturo. Plej ofte sur ĝi interplektiĝas valoraĵoj de diversaj kulturoj, kiuj reciproke kunkreas unikan universon de signifoj.<sup>1</sup> Pro tio, konsiderante lokon de apudlimo en socia konscio, ĝi povas esti perceptata kiel:

- ekstera apudlimo (ekstersocia, eksterkultura) - pri ekzisto de ĝi decidas faktoroj eksteraj, teritoriaj, eksterkonsciaj. Formoj de kunvivado dependas sur ĝi de proksimeco kaj de reciprokaj kontaktoj inter personoj, kiuj foje estas kulture tute apartaj kaj posedas apartajn sociajn konsciojn. La kontaktojn ebligis historiaj dividoj (politikaj, teritoriaj, juraj), geografiaj kaj klimataj trajtoj de la teritorio kaj socikultura specifeco de ĝia loĝantaro.
- interna apudlimo (intrasocia, intrakultura) - ĝi ekzistas ne nur ekster de iu socio (aŭ inter kelkaj socioj), sed en la socio mem, interne de okupata de ĝi teritorio perceptata kiel homogena. Rimarkebla en aspektoj sociekonomia, religia, estetika, simbola kaj aliaj. Elementojn de tiuspeca apudlimo oni malkovras ĉie kie ekzistas malgrandaj kulturaj, etnaj, religiaj ktp. enklavoj (ekz. lokaj socioj de vilaĝo, kvartalo, urbo), kaj en intrasociaj rilatoj inter generacioj, sociaj tavoloj kaj medioj. Ĝi ekaperas dum renkontiĝo de diferencaj valoraj (raciaj kaj malraciaj, tradiciaj kaj nove enkondukataj), kiuj se akceptitaj de socio, povas iĝi nova, daŭra tradicio.<sup>2</sup>

Oni povas karakterizi apudlimon en dimensioj: teritoria, kultureca, interaga kaj persona.<sup>1</sup> La dimensiojn eblas percepti en reciprokaj interdependoj kaj danke al tio, oni povas distingi pliajn, pli komplikajn modelojn de la fenomeno. Tamen ĉiu firma kategoriigo de la modeloj estus artefarita kaj tro malvasta.

Analizante limojn kaj apudlimojn en perspektivo de la ĉi supraj dimensioj, eblas detale priskribi situacion de individuoj kaj grupoj en kulture diversigitaj medioj - kio helpas al disvolvado de metodologio de sciencaj esploroj kaj de scienco mem.

En teritoria dimensio, apudlimo estas:

- areo (teritorio), sur kiu okazas specifa speco de kunvivado de du aŭ pli multaj kulturaj grupoj, plej ofte naciaj, entaj, lingvaj, religiaj kaj aliaj<sup>2</sup>;
- periferioj lokitaj apud limoj kaj forigitaj de centroj de kulturoj situataj apude (kulturoj de landoj, regionoj kaj aliaj), en kiuj oni decidas pri aferoj politikaj, ekonomiaj, kulturaj ktp.<sup>3</sup>

Sur apudlimoj ofte okazas fenomenoj aŭtonomiaj rilate al centro de kulturo. Pro tio, ilia loĝantaro foje postulas specifan liberecon - precipe, se iu areo estas klare diversigita el civiliza kaj nacieca vidpunktoj.<sup>4</sup> Aliflanke, ankaŭ loĝantaro de centro povas atendi ion de le loĝantaro de apudlimoj kaj prezenti siajn postulojn. Józef Chałasiński, kiu antaŭ la dua mondmilito

---

<sup>1</sup> J.Nikitorowicz: *Pogranicze, tożsamość...*, op.cit., pp.12–15; idem: *Młodzież pogranicza kulturowego Białorusi, Polski, Ukrainy wobec integracji europejskiej. Tożsamość, plany życiowe, wartości*, Białystok 2000, pp.11–12. – Cf.: I.Machaj: *Pogranicze* [en:] Z.Bokszański (org.): *Encyklopedia socjologii*, Warszawa 1998, vol.3, pp.125–128.

<sup>2</sup> J.Nikitorowicz: *Pogranicze, tożsamość...*, op.cit., p.11. – Cf.: A.Sadowski: *Wschodnie pogranicze w perspektywie socjologicznej*, Białystok 1995, p.9.

<sup>3</sup> J.Kurzępa: *Eksplanacyjna użyteczność teorii zróżnicowanych powiązań w odniesieniu do zachowań patologicznych na pograniczu* [en:] T.Lewowicki, E.Ogrodzka-Mazur (org.): *W poszukiwaniu teorii przydatnych w badaniach międzykulturowych*, Cieszyn 2001, pp.148–149.

<sup>4</sup> W.Pawluczuk: *Pogranicze narodowe czy pogranicze cywilizacyjne?* [en:] A.Sadowski (org.): *Pogranicze...*, op.cit., vol.8, p.23 kaj sekvaj. – Cf.: I.Machaj: *Pogranicze...*, op.cit., pp.125–126.

---

<sup>1</sup> D.Simonides: *Archaizmy kulturowe na śląskim pograniczu* [en:] T.Smolińska (org.): *Pogranicze...*, op.cit., pp.19–20.

<sup>2</sup> E.Nowicka: *Badanie...*, op.cit., p.13.

esploradis antagonismojn inter poloj kaj germanoj, skribis pri teritoria apudlimo kiel pri areo, sur kiu „(...) koncentriĝas ekspansiaj streboj de naciecoj kaj ŝtatoj, kaj de loka loĝantaro oni postulas pli grandan senton de aparteno al nacio, ol de loĝantaro en centro de lando.”<sup>1</sup> Andrzej Sadowski, kiu nuntempe analizas apudlimojn de junaj, demokratiaj eŭropaj landoj rimarkis, ke tie rompiĝas kaj modifiĝas stereotipaj difinoj de aparteno al iu nacio. Al tiu ĉi fenomeno helpadas ŝanĝoj de politika sistemo, malfermo je kontaktoj kun aliaj landoj, reciprokaj rilatoj de kulturoj kaj ŝanĝo en nacia idento.<sup>2</sup> Tio signifas, ke sur teritoriaj apudlimoj sociaj fenomenoj estas fluecaj kaj dependas de situacio en centro, kaj de politiko de loĝantaro de la centro.

Spaca proksimeco sur klare difinita teritoria apudlimo, favoras intencajn kaj hazardajn kontaktojn inter loĝantaro de loka medio, kaj ankaŭ kontaktojn kun Fremduloj, kiuj ofte aperadas tie pro proksimeco de landlimo. Grado de malfermo de la landlimo je interŝanĝo de varoj kaj je migrado de homoj, decidigas pri karaktero de la apudlimo kaj pri ĝia vasteco. Pro tio sur la apudlimo ekzistas diversaj modeloj de sociaj kaj kulturaj rilatoj. Oni povas priskribi ilin en diversaj perspektivo de vasteco de la apudlimo. En mallarĝa perspektivo, la apudlimo troviĝas sur malgranda areo. Inter la kunloĝantaj tie grupoj ekzistas baroj kaj diferencoj de vivkvalito, kiuj limigas, aŭ tute malebligas okazojn je socikultura interŝanĝo. La grupoj okupas apartajn teritoriojn, sed samtempe influadas unu sur aliajn dum hazardaj (foje eĉ devigaj) kontaktoj. En larĝa perspektivo, la apudlimo troviĝas sur granda areo kaj enhavas tutan historie kreitan teritorion, sur kiu eblas kontaktoj de kulturoj. Karaktero de la apudlimo dependas ĝuste de la kontaktoj, dum kiuj la najbaraj kulturoj interplektiĝas. Do, la teritorio servadas kvazaŭ ponto

<sup>1</sup> J.Chalaŝiński: *Antagonizm polsko-niemiecki w osadzie fabrycznej "Kopalnia" na Górnym Śląsku*, Warszawa 1935, p.78.

<sup>2</sup> A.Sadowski: *Wprowadzenie* [en:] *idem* (org.): *Pogranicze...*, *op.cit.*, p.8.

inter reciprokaj valoroj de kulturoj, kiuj dum la kontaktoj renkontiĝas, konfliktas kaj finfine kunekzistas.<sup>1</sup>

Kultureca apudlimo estas ensemblo de kutimoj kaj tradiciaj reguloj, kiuj helpas kunvivi sur teritoria apudlimo. Ili decidigas pri kultura specifeco de loka socio, en kiu individuo ne estas devigita vivi en unu kulturo, sed rajtas elekti kaj kunkrei valorojn de diversaj kulturoj. Sistemoj de valorajoj, kiuj naskiĝas en tiaj kondiĉoj, estas kunmetaĵo de valorajoj ĉerpitaj el diversaj kulturoj. Tio ĉi grave influas sur kreigon de idento. Danke al komunaj materiaj kaj spiritaĵaj valorajoj, inter loĝantaro de la apudlimo aperas ligoj kun komuna kultura heredaĵo. La samaj valorajoj decidas pri daŭro de kultura idento, stabilizante lokan socion. Se membroj de iu kulturo ne akceptas la valorajojn kaj ne utiligas ilin en vivo, ilia kulturo povas malaperi.

Sur tiuspecaj apudlimoj ne ekzistas do kulture homonega socio, kvankam kompare kun socio de centro de kulturo, la loĝantaron sur apudlimo karakterizas teritoria proksimeco, komuna lingvaĵo, komuna folkloro, historio, foje ekologia sinteno kaj aliaj elementoj.<sup>2</sup>

Interaga apudlimo estas samtempe socia procezo kaj ĝia efiko en interhoma komunikado. Ĝi estas rimarkebla dum negociado kaj flegado de kultura heredaĵo sur teritoria apudlimo. La negociado okazas dum transiro de monologo al dialogo de kulturoj, de superado de stereotipoj kaj antaŭjuĝoj al reciproka interkompreniĝo. Efiko de tiuspecaj ĉiutagaj kontaktoj estas akiro de scio pri kunvivado malgraŭ kulturaj diferencoj de la loĝantaro. Ĝuste tiam aperas kaj plifirmiĝas dividoj je homoj apartenantaj al Ni, kaj je Fremduloj. J.Nikitorowicz karakterizante interagan apudlimon, skribas: „*Surbaze de komuna sistemo de valorajoj kaj agnoskita socia hierarkio, aperas similaj strebaĵoj, agadoj,*

<sup>1</sup> J.Kurzepa: *Eksplanacyjna...*, *op.cit.*, pp.148–149; J.Nikitorowicz: *Młodzież...*, *op.cit.*, p.12; *idem*: *Pogranicze, tożsamość...*, *op.cit.*, pp.11–12. – Cf.: A.Kłóskowska: *Otwarte i zamknięte postawy narodowe w sytuacji pogranicza*, “Kultura i Społeczeństwo”, No 3/1995, p.19; I.Machaj: *Pogranicze...*, *op.cit.*, p.126.

<sup>2</sup> J.Nikitorowicz: *Pogranicze, tożsamość...*, *op.cit.*, p.12.

aktivecoj. Aliflanke, en ĉiu socio ekzistas diferencoj inter homoj, kiuj videblas en individuaj trajtoj, deveno, plenumataj funkcioj ktp. Sociaj ligoj aperas kaj daŭras danke al tio, kio kunigas aŭ dividas homojn en socia kunvivado. Reciprokaj influoj, kunagadoj kaj dependeco aperas en difinita areo, kie pro iuj aferoj homoj sentas sin ligitaj kun la aliaj, bezonas unuj la aliajn, plenigas unuj la aliajn, samtempe sentas diferencojn kaj komunecon.”<sup>1</sup>

Oni eniras en interagojn sur apudlimo plejofte ne pro devigo, sed pro preferoj kaj elekto. Apudlimo aperigas okazojn kaj permesas elekti. Kulturo, kiu ekzistas sur apudlimo preparas homon al elektado kaj kunkreado de realaĵo, en kiu oni estimas diferencojn kaj estimas homojn partoprenantajn en tiu ĉi procezo. Vivo sur apudlimo permesas al individuo liberiĝi de kulturo kaj idento dominantaj (kaj foje perforte devigaj) en centro. Apudlimo favoras memevoluo kaj kreivemon. Danke al ĉio ĉi, homo akiras (aŭ reakiras) rajton je persona, unika evoluo, libereco kaj respondeco, kiujn oni povas realigi en daŭra negociado kaj kunlaboro kun Diferenculoj/Fremduloj. Tiel aperas daŭraj interhomaj (individuaj kaj grupaj) sistemoj de rilatoj.<sup>2</sup>

Antonina Kłoskowska rimarkas, ke apudlimo estas historie ŝanĝebla socia situacio, sur kiun influadas multaj faktoroj - precipe aktuala stato kaj internacia karaktero de rilatoj inter la socioj vivantaj ĉe ambaŭ flankoj de limo. Tiu ĉi situacio influas sur rolojn en kiuj funkcias reciproke sinsekvaj kategorioj de loĝantaro de la apudlimo. Ĝi povas aktivigi antagonismajn stereotipojn kaj aliajn bazojn de interpersonaj rilatoj. Apudlimon do povas karakterizi najbareco de kulturoj, kiu integrigas (kunigas) homojn en difinita medio, aŭ malintegrigas (forigas, kontraŭstarigas, apartigas) ilin.<sup>3</sup>

En ĉiu medio la procezoj havas diferencajn formojn, rapidecon kaj forton, ĉar kulturo de ĉiu apudlimo estas diferenca.

<sup>1</sup> *Ibid.*, p.13.

<sup>2</sup> J.Nikitorowicz: *Młodzież...*, *op.cit.*, p.11–12.

<sup>3</sup> A.Kłoskowska: *Kultury...*, *op.cit.*, p.278.

Interaga apudlimo estas perceptata kiel neevitebla medio de vivo de plimulto de loĝantaro de la nuna mondo. Pro progreso de diversaj formoj de komunikado kaj globaligo, iom post iom kulture diversiĝas familioj, medioj de laboristoj, komunumoj de loĝantoj ktp. Ensociigo okazas en pluraj lingvoj. Ĝiaj patroprenantoj serĉadas novajn formojn de idento kaj posedas plurajn punktojn de apogo de ĝi - kio foje kaŭzas kulturalan malekvilibron.<sup>1</sup> En tia situacio la postulataj trajtoj de interaga apudlimo estas dialogo kaj toleremo, necesaj por eviti konfliktojn de valoroj, statoj kaj sintentoj - same en individua kaj grupa sfero.<sup>2</sup> Por toleri kaj dialogi ne sufiĉas tamen nur vivi sur teritoria apudlimo. Por ke ili aperu estas necesa konscia utiligado de alispecaj apudlimoj kaj agnosko de diferenco danke al spertado de ĝi. Foje, tio ĉi povas esti malagrabra kaj lasas daŭrajn (sed kreivajn) spurojn en psika sfero de partoprenantoj de tiu ĉi procezo.

Persona apudlimo (apudlimo de statoj de konscio) dependas de ekzistado de homo en difinitaj loko kaj tempo, en kiuj la homo evoluas kaj kunkreas sian unikan propran etan patrujon (patrujon privatan, lokan), patroprenas en lokaj grupoj (lingvaj, religiaj, etnaj ktp.). La vivo sur kruciĝo de kulturoj permesas al individuo plilarĝigi siajn horizontojn de perceptado de realo. Permesas komparadi sian situacion kun aliaj, danke al kio aperas ambiguaj sentoj rilate al personoj el la medio de Ni, kaj al Fremduloj.<sup>3</sup> La procezo estas komplika, ĉar „(...) kulturaj limoj inter «Ni - Ili» situas ekster ni kaj estas plilongigo de limoj

<sup>1</sup> L.Korporowicz: *Wielokulturowość...*, *op.cit.*, p.67.

<sup>2</sup> Pli vaste: J.-F.Bourquin: *Violence, conflit et dialogue interculturel*, Strasbourg 2003; A.Sadowski: *Harmonia i konflikty na pograniczach* [en:] K.Krzysztofek, A.Sadowski (org.): *Pogranicza etniczne w Europie. Harmonia i konflikty*, Białystok 2001, pp.13–16.

<sup>3</sup> J.Nikitorowicz: *Pogranicze, tożsamość...*, *op.cit.*, pp.14–15. – Cf.: A.Szczurek-Boruta: *W poszukiwaniu perspektywy teoretycznej – zmiany społeczne na pograniczach* [en:] T.Lewowicki, E.Ogrodzka-Mazur (org.): *W poszukiwaniu...*, *op.cit.*, p.69.

*troviĝantaj en ni mem. Ili estas parto de kaŝita dimensio de nia idento.”<sup>1</sup>*

Laŭ Ewa Nowicka, pro tio eblas konsideri apudlimon kiel psikan kontakton de kulturoj (aŭ etnaj grupoj) kaj konsekvencojn de tiu ĉi procezo al individuoj. Ŝi proponas distingi internan apudlimon analizante situacion de homoj, kiuj persone ne partoprenas en kontaktoj de diversigitaj subjektoj. Ekstera apudlimo aperas do en situacio de personoj, kiuj spertadas kaj travivadas en ĉiutaga vivo ĉeeston de Diferenculoj kaj Fremduloj. Homoj vivantaj kvazaŭ en du mondoj, foje devas draste elekti iun tradicion kaj pro tio rompi daŭrajn ligojn kun familia kulturo (ekz. kun tiu ĉi de unu el la gepatroj). Se etna, aŭ kultura diverseco ekzistas en familio mem, tiam por iuj el familianoj tio povas signifi vivon plenan de psika disŝiro. Tiajn personojn foje ne akceptas iu el flankoj de la kultura konflikto - eĉ ambaŭ samtempe. Pro tio la personoj suferadas kiel Fremduloj en propra hejmo, kiel Fremduloj inter propraj proksimuloj.<sup>2</sup> Tiam restas nur liberiĝi de la kompligegega situacio per drasta rompo de vivmodelo, aŭ per utiligo de interkultura kompetenteco kaj provo transdoni ĝin (klarigi) al diskriminaciantaj personoj. En situacio de apudlimo la ĉiutaga problemo estas difini kriteriojn de aparteno al ekzistantaj tie kulturoj. La kriteriojn difinas kulturoj mem, aŭ unuopaj personoj disŝiritaj inter du (aŭ pli) kulturoj. Evidente tio influas al sortoj de la personoj.<sup>3</sup> A.Kłoskowska prezentas ekzemplojn de tiaj faktoj kaj parolas pri apudlimo kiel pri situacio, kiu aktivigas senton de nacia aparteno kaj de kultura idento.

Nacie kaj etne miksa genealogio kaj geedziĝo; membreco en nacia aŭ etna minoritato sur teritorio dominata de alia nacia kulturo; elmigriĝo aŭ unuopa nacia konvertiĝo, ne signifas definitivan rompon de antaŭaj (ĝisnunaj) kulturaj ligoj.<sup>4</sup> Por individuo, tiu procezo estas ligita kun funkciado en apudlima

situacio, kiun karakterizas dinamiko de idento. - Pro tio E.Nowicka rimarkas, ke: „*En realaj sociaj rilatoj ekzistas kaj dikotomaj dividoj je Niaj kaj Fremdaj, kaj - pli ofte - plurŝtupaj dividoj de fremdeco perceptata rilate al diversaj grupoj. Rilate al iu afero oni povas senti sin proksima - kaj rilate al alia afero kontraŭe. Tio ĉi ofte okazas en situacio de apudlimo. Plej ofte ekzistas gradoj de fremdeco perceptata rilate al grupoj: rilate al kelkaj ĝi estas pli forta - kaj rilate al aliaj malpli. (...) Sentojn de familiareco kaj fremdeco karakterizas historia dinamiko: grupoj, kiujn hodiaŭ oni opinias fremdaj, morgaŭ povas iĝi propraj, aŭ almenaŭ malpli fremdaj - kaj kontraŭe: grupoj ĝis nun familiaraj iĝas fremdaj.”<sup>1</sup>*

## 1.2. Edukado en kondiĉoj de kultura diverseco

Laŭ Zbigniew Kwieciński edukado estas: „*(...) ĉiuj influoj je individuoj kaj grupoj - influoj, kiuj helpas al ili disvolviĝi kaj utiligi posedatajn eblecojn tiel, por ke la personoj iĝu kiel eble plej konsciaj kaj kreivaj membroj de komunumoj de socio, nacio, kulturo kaj la mondo; por ke la personoj iĝu kapablaj aktive memrealiĝi kaj posedu unikan kaj daŭran identon kaj aparton; por ke ili estu kapablaj disvolvadi propran Mi per realigado de «taskoj kun proksimuloj», samtempe subtenante daŭron de Mi en realigado de «taskoj kun perspektivoj». Edukado estas ĝenerala agado, en kiu oni gvidas homon kaj liajn aktivaĵojn, por ke la homo akiru kiel eble plej plenajn kaj proprecajn al li eblojn. Ĝi estas ankaŭ ensemblo de influoj kaj funkcioj, kiuj reguligas homajn personecon kaj agadon, rilate al aliaj personoj kaj al la mondo.”<sup>2</sup>*

La nocio „edukado” en pli larĝa senco povas esti komprenata kiel: „*(...) ĉiu organizita akado de instruado, lernado kaj klerigado je ĉiuj niveloj: de ŝtata nivelo ĝis la nivelo de malpli*

<sup>1</sup> K.Krzysztofek: *Wielokulturowość...*, op.cit., p.35.

<sup>2</sup> E.Nowicka: *Badanie...*, op.cit., p.14.

<sup>3</sup> *Ibid.*, p.20.

<sup>4</sup> A.Kłoskowska: *Kultury...*, op.cit, p.125.

<sup>1</sup> E.Nowicka: *Badanie...*, op.cit., p.19.

<sup>2</sup> Z.Kwieciński: *Socjopatologia edukacji*, Olecko 1995, p.14. – Cf.: *idem: Edukacja do globalnego przetrwania* [en:] K.Przeclawska (org.): *Tradycja i wyzwania*, Kraków 1996, p.89.



grandaj institucioj, kiuj agadas tiel senpere (ekz. familio; najbaroj; samaĝuloj; infanĝardeno; lernejo; universitato; kuracejo; loka socio; asocioj; kluboj kaj fakaj organizoj; parohoj), kaj pere (ekz. registaro; parlamento; ministerio; institucioj de administrado, pritakso kaj kontrolo; amaskomunikiloj kiel televido, radio, Interreto, gazetoj, libroj; amasaj distraj aranĝoj, modo ktp.).”<sup>1</sup>

Problemojn de edukado en kulture diversigitaj socioj oni povas konsideri en sferoj grupa kaj/aŭ intergrupa (perspektivo multkultura), kaj persona kaj/aŭ interpersona (perspektivo interkultura). Eduka agado koncernas ja ne tiom unuopajn individuojn elprenitajn el ilia medio, sed personojn, kiuj estas membroj de diversgrandecaj grupoj kun ĉiuj konsekvencoj de tiu ĉi fakto.

En apudlimoj edukado okazas en kondiĉoj, kiujn karakterizas granda socia aktiveco kaj kunekzistado de diversaj tradicioj. Partoprenantoj de tiu ĉi procezo penadas do forte por eskapi de individuaj, enradikitaj en propra kulturo modeloj de socia funkciado. Se iu medio ne estas preta, aŭ al kutimita akcepti diferencojn, la eduka procezo estas plena je konfliktoj, kiujn kaŭzas akcepto/malakcepto de Diferenculoj/Fremduloj. Tiu ĉi situacio estas la plej malfacila en medioj, kiuj pro historiaj, politikaj kaj ideologiaj kialoj ne estas al kutimitaj malfermiĝi je diverseco kaj akcepti novajn, fremdajn vivstilojn. Ideo de apudlimo permesas tiam vekti en loĝantaro toleremon, liberecon kaj respondecon; helpas komenci dialogon de homoj el diferencaj kulturoj. Rimarkado de tiu ĉi fakto estas defio kaj por edukistoj, kaj por personoj, kiuj zorgas pri kleriga politiko de ŝtatoj kaj internaciaj organizaĵoj.<sup>2</sup> Ju pli granda estos kultura diverseco kaj partopreno en publika vivo de diferencaj kulturoj (etnaj, lokaj, regionaj, naciaj ktp.) - des pli necesa estos analizado de kulturaj fenomenoj rimarkeblaj dum reciprokaj kontaktoj, kaj ligita kun

<sup>1</sup> Z.Kwieciński: *Przedmowa* [en:] *idem*, B.Śliwerski (org.): *Pedagogika – podręcznik akademicki*, Warszawa 2003, vol.1, p.12.

<sup>2</sup> J.Nikitorowicz: *Pogranicze, tożsamość...*, *op.cit.*, pp.11 et 41–42.

ili koscia sociala politiko. Laŭ J.Nikitorowicz: „*Pro plurigo de valorsistemoj, sintenoj kaj kulturaj agadoj, oni pli facile akceptas diversecon, sed samtempe eksentas ekzistencialisman premon, kiu aperas pro devigo elektadi. (...) Plureco de konvencioj kaj de kodoj de komunikado, kiuj postulas senĉesan negociadon de propraj signifoj, provokas bezonon akiri/transdoni novan specon de komunikaj kompetentecoj - kio estas defio por kreantoj de sistemoj de edukado, klerigado kaj konsilado.*”<sup>1</sup>

Laŭ Lech Witkowski, edukado malfermita je efiko de apudlimo komenciĝas tie, „(...) kie almenaŭ portempe, laboratorie kaj kiel provo estas funkciigataj pensaj operacioj sur versio de mondo de alia persono tiel, ke aperu okazo rigardi sin mem de alia flanko de spegulo.”<sup>2</sup> Utiligado de efiko de apudlimo en edukado iĝas eĉ nepra, ĉar nur tio permesas konsciigi homon pri ĉeesto de Diferenculoj/Fremduloj en lia medio. Tio permesas konsciigi fakton, ke ĉiu homo povas esti perceptata kiel unu el ili. Tiel socia mondo iĝas pli dinamika - aŭ almenaŭ ekzistas ŝanco je dinamikigo de ĝi.

Praktikon de edukado oni priskribas ĉefe en kunteksto de lernejo kaj oficiala eduksistemo. Simile, oni rare konsideras medion de plenkreskuloj kiel celo de agado inspirata de lernejo (krom programoj de permanenta klerigado). Ĉiun kulturon karakterizas propraj didaktikaj tradicioj kaj enradikigo de lernejo en specifaj vivmodeloj de la kulturo. Pro tio estas malfacile sistemigi edukajn praktikojn tiurilate.<sup>3</sup> Tamen, elementoj de ili iĝas partoj de vastaj, interne diversigitaj modeloj de eduka influado kaj kleriga politiko, kiujn oni nomas „multkultura edukado” kaj „interkultura edukado”. Ĉar tiuj ĉi nocioj foje estas uzataj samtempe kaj eĉ alterne, necesas ilin disigi kaj priskribi.

<sup>1</sup> *Idem: Wartości...*, *op.cit.*, p.16.

<sup>2</sup> L.Witkowski: *Uniwersalizm pogranicza*, Toruń 2000, p.192.

<sup>3</sup> Patrz np.: T.Szkudlarek: *Pedagogika międzykulturowa* [en:] Z.Kwieciński, B.Śliwerski (org.): *Pedagogika...*, *op.cit.*, vol.1, pp.415–424.

### 1.2.1. Multkultura edukado

Multkultura edukado estas modelo de agado bazita sur strebo de ŝtato kontroli kulturen dinamikon de socio kaj adaptigi edukistemon al bezonoj de diversaj kulturaj grupoj. Radikoj de tiu ĉi modelo troviĝas en industria epoko de kapitalismo kaj en ideologio de modernismo, kiu pravigas politikon de diversigo kaj asimiligo kiel modelon de ekskludo de minoritataj grupoj fare de dominantaj grupoj. La ĉefa celo de edukado estas pravigo de kultura pluralismo de socio, en kiu ekzistas klare difinita dominantaj grupoj.

La bazo de kleriga politiko kaj praktiko de edukado estas konvinko pri netuŝebleco de reguloj de ekzistanta socia ordo kaj utopia bildo de tiu ĉi ordo sen konfliktoj inter diferencaj kulturaj grupoj.<sup>1</sup> En pluraj kazoj, konceptoj de multkultura edukado estas ligitaj kun ideologio de nacia edukado (nacia, aŭ ŝtata pedagogio), en kiu la ĉefa regulo estas bono de nacio, kiu servas kiel supera leĝo.

Pro tiuspeca bazo, en kleriga politiko povas okazi eĉ agresa agado kontraŭ personoj apartenantaj al minoritatoj, ĉar oni povas konsideri ilin kiel malamikojn de nacio (ŝtato). Tiam, alvokante nacian ideologion, oni pravigas diskriminadon kaj limigadon de rajtoj de minoritatoj, kiujn eblas oferi pro bono de la nacio. Tiu ĉi modelo de pensado estas karakteriza precipe en nacioj, kiuj batalas por akiri sendependecon kaj liberecon - aŭ en tiuj, kiuj jam akiris ilin, eventuale sentas, ke ilia idento estas minacata.

Ofte do, en kleriga politiko aperas ideologio de integrismo, naciismo kaj ksenofobio.<sup>1</sup>

En multkultura edukado oni penas protekti interesojn de dominantaj grupoj (aŭ dominantaj medioj), do fakte ĝi estas ligita kun alproprigo kaj koloniigo de minoritatoj.<sup>2</sup> Oni provas ĉirkaŭi per la agado ensemblon de kulturoj perceptataj kiel paralelaj. Simile funkcias politiko de multkulturismo, kiu estas realigata pere de unuformaj strategioj de agado adresata al ĉiu grupo aparte.<sup>3</sup> Nuntempe, post periodo de eksperimentado en pluraj landoj, la ideo, formoj kaj efikoj de multkultura edukado estas objektoj de racia kritiko. Kutime, oni perceptas tiun ĉi modelon de edukado kiel pasintan - kvankam ĝiajn regulojn oni ankoraŭ utiligas en multaj medioj (ekz. en limigitaj strukturoj de edukistemo) - eĉ senkonscie.<sup>4</sup>

En 1976 grupo de usonaj fakuloj direktata de James Banks preparis kompletan oficialan programon de multkultura edukado. Ĝi estis rezulto de komencita en 70-aj jaro de XX-a jarcento didaktika tendenco. En 1991, la programo estis aktualigita kaj akceptita de Nacia Konsilantaro de Sociaj Studoj. Jen bazaj reguloj de la programo:

- 1) Kultura kaj etna diverseco devas esti rimarkebla en lerneja medio, sur ĉiuj niveloj kaj en ĉiuspecaj aspektoj.
- 2) Politiko kaj metodoj de lerneja sistemo devas favori pozitivajn multkulturajn interagojn kaj helpi al interkompreniĝo de gelernantoj kaj geinstruistoj, edukistoj kaj helpantaj laboristoj.
- 3) Laboristaro de lernejo devas respeguli etnan kaj kulturen diversecon de la lando.
- 4) Lernejoj devas disponi pri metodikaj, kompletaj kaj devigaj programoj de permanenta klerigado de la laboristaro.

---

<sup>1</sup> W.Frankiewicz, K.Kossak-Głowczewski: *Edukacja regionalna i alternatywna. Założenia i program pierwszego Podyplomowego Studium Edukacji Regionalnej i Alternatywnej w Uniwersytecie Gdańskim* [en:] T.Lewowicki, B.Grabowska (org.): *Spoleczności pogranicza, wielokulturowość, edukacja*, Cieszyn 1996, p.195; K.Kossak-Głowczewski: *Edukacja regionalna, wielokulturowa i międzykulturowa a pytanie o "prywatne ojczyzny" – zarys problemu* [en:] J.Nikitorowicz (org.): *Rodzina wobec wyzwań edukacji międzykulturowej*, Białystok 1997, p.56.

---

<sup>1</sup> S.Wołoszyn: *Nauki o wychowaniu w Polsce w XX wieku. Próba syntetycznego zarysu na tle powszechnym*, Kielce 1998, pp.154–155.

<sup>2</sup> K.Kossak-Głowczewski: *Edukacja regionalna, wielokulturowa...*, op.cit., pp.59–60.

<sup>3</sup> M.Abdallah-Preteille: *Vers une...*, op.cit., p.168.

<sup>4</sup> B.Bartz: *Idea...*, op.cit., p.16–24.

- 5) Programoj de klerigado devas taŭgi al spirito kaj stilo de lernado, kiuj estos kulture ĝustaj por la gelernantoj kunkreantaj lernejan komunumon.
- 6) Programo de multkultura instruado ĉiam devas prezenti al gelernantoj okazojn por senĉesa disvolvado de kiel eble plej bona memkonscio.
- 7) Programo de instruado devas helpi al gelernantoj kompreni ensemblon de spertoj ligitaj kun ekzisto de etnaj kaj kulturaj grupoj en la lando - tio estas de problemoj, kiujn renkontas la grupoj kaj kiujn la grupoj provokas en la socio; ankaŭ pozitivajn spertojn.
- 8) Programo de instruado devas helpi al gelernantoj kompreni, ke konflikto ekzistanta inter idealoj kaj realo estas nepre ligita kun ekzisto de homaj socioj.
- 9) La programo devas pritrakti kaj klarigi eblajn en la lando kulturajn kaj etnajn alternativojn kaj elekteblecojn.
- 10) La programo devas reklami valoraĵojn, sintenojn kaj modelojn de agado, kiuj subtenas etnan pluralismon kaj multkulturecon - kaj ankaŭ tiujn el ili, kiuj subtenas kaj kreas ŝtaton-nacion kaj komunan nacian kulturon. Ideo *E pluribus unum* (El multaj unueco) devas esti la celo de lernejoj kaj nacio.
- 11) Realigado de la programo devas helpi al gelernantoj disvolvi kompetentecon decidi, inklinojn partopreni en socia vivo kaj ilian senton de politika efikeco - kiuj estas necesaj bazoj de fruktodona civitaneco en demokratia kaj pluralisma nacio.
- 12) La programo devas helpi al gelernantoj disvolvi kompetentecojn necesajn en intragrupaj agadoj inter individuoj, etnaj grupoj kaj kulturoj.
- 13) La programo devas esti konsiderata kaj realigata rilate al kulturaj kaj etnaj grupoj rigardataj kiel unu ensemblo, kaj esti neforigebla parto de ĝenerala programo de lernejo.
- 14) En la programo devas esti realigataj studoj de kulturoj, historiaj spertoj, socia realo kaj vivkondiĉoj de etnaj kaj kulturaj grupoj, kaj ankaŭ difinitaj temoj pri rasoj.
- 15) En konceptado kaj realigado de la programo devas superi aliroj interdisciplinaj kaj plurdisciplinaj.

- 16) Dum pristudado de etnaj grupoj kadre de realigado de la programo, oni devas utiligi komparajn alirojn.
- 17) La programo devas helpi al gelernantoj percepti kaj interpreti fenomenojn, situaciojn kaj konfliktojn el perspektivoj kaj vidpunktoj de diversaj etnaj medioj.
- 18) La programo devas konceptigi kaj priskribi evoluon de la lando perceptata kiel plurdimensia socio.
- 19) La programo devas riveli al gelernantoj eblon partopreni en estetikaj spertoj de pluraj etnaj kaj kulturaj grupoj.
- 20) Lernejoj devas riveli al gelernantoj kondiĉojn al lernado de lingvoj de etnaj grupoj kaj de leĝaj komunikistemoj, kaj ankaŭ helpi al ili ekregi almenaŭ du lingvojn.
- 21) La programo devas en maksimuma nivelo utiligi eksperimentajn instrumentojn, precipe rilate al lokaj komunumoj.
- 22) Metodoj de pritakso de gelernantoj devas respeguli iliajn etnaj kaj kulturajn spertojn.
- 23) Lernejoj devas senhalte kaj sistemece evaluadi celojn, metodojn kaj didaktikajn helpilojn utiligatajn en instruado pri etna kaj kultura diverseco.

Rolo de lernejo en la ĉi supra programo de multkulturaj instruado kaj edukado, estas ligita kun agnosko kaj respekto de etna kaj kultura diverseco, kun popularigado de sociaj ligoj bazantaj sur reguloj de partopreno de etnaj kaj kulturaj grupoj en socia vivo, favorante egalajn ŝancojn de ĉiuj individuoj kaj grupoj. Ĝi estas ligita kun ideo de kreado kaj disvolvado de socio bazanta sur demokratia idealo kaj estimo je ĉiuj individuoj.<sup>1</sup>

---

<sup>1</sup> La prezentata modelo de programo estas destinata al Usono. - M.Abdallah-Preteceille: *L'éducation...*, op.cit., pp.30-33. - Pli vaste: J.A.Banks (org.): *Handbook of Research on Multicultural Education*, New York 1995; J.A.Banks, A.McGee Banks (org.): *Multicultural education: issues and perspectives*, Boston 1993; J.A.Banks: *Teaching Strategies for Ethnic Studies*, Boston 1997; C.Sleeter, C.A.Grant: *Making Choices for Multicultural Education: Five Approaches to Race, Class, and Gender*, New York 1988; C.Sleeter, P.McLaren: *Multicultural Education, Critical Pedagogy and the Politics of Difference*, Albany 1995. - Cf. similan modelon de edukado, kiu rilatas al Australio: J.Knight, R.Smith, J.Sachs: *Dekonstrukcja*

Indas rimarki, ke la nocio „etna grupo” estas komprenata de aŭtoroj de la modelo kiel specifa formo de kultura grupo, kiun karakterizas jenaj trajtoj:

- ĝia origino antaŭas kreon de la lando, aŭ almenaŭ la kreo okazis aliloke;
- ĝi estas deviga (supozante, ke individuo povas identiĝi kun grupo memvole);
- ĝi posedas hereditan de prauloj tradicion, kaj ĝiajn membrojn karakterizas komuneco de konvinko pri aparteno al la sama socio (sama popolo), kaj pro tio dividado de la sama sorto;
- ĝi estas karakteriza pro propra sistemo de valoroj, modeloj de agado kaj fokuso de interesoj;
- ekzisto de ĝi influas sur vivojn de ĝiaj membroj;
- pri aparteno al ĝi signifas samtempe maniero laŭ kiuj ĝiaj membroj tion perceptas kaj ankaŭ manieroj de percepto de tiu ĉi fakto flanke de aliaj personoj.

Kulturaj grupoj - kontraŭe, estas difinitaj en ĉiu kazo, per operaciaj nocioj, rilate al modeloj de agado, simboloj kaj valoraĵoj. La difinado okazas do surbaze de nerimarkeblaj unuavide aspektoj de ĉiutaga vivo, pro kiuj eblas diferencigi kaj interpreti unuj grupojn fone de aliaj. Prezenta en la programo koncepto de lernejo kaj edukado estas rezulto de influoj de historia, politika kaj kleriga tradicio de Usono. Ĝi diferencas de kondiĉoj ekzistantaj en aliaj landoj, do se oni dezirus transpreni ĝin rekte el usonaj realaĵoj kaj realigi aliloke, tio eble kaŭzus aperon de riskaj patologioj.

Laŭ la ĉi supra programo eblas konkludi taskojn de multkultura edukado:

- asimiligo de minoritatoj kun socio kaj konatigo kun dominantanta kulturo, danke al kio okazas egaligo de ŝancoj kompare kun ceteraj civitanoj;
- transdonado de lingvo, historio kaj kulturo de dominantanta socio al minoritatoj, laŭ reguloj de politika korekteco;

- edukado je tolero kaj reciproka estimo, protektado kontraŭ rasismo por prezervi socian trankvilon;
- rimarkado de problemoj de diskriminado de etnaj grupoj (precipe de novalvenintaj enmigrintoj) - eĉ kaŝe, se situacio tion postulas;
- rimarkado de struktura damaĝado de etnaj minoritatoj kaj provokado ĉe ili pretecon strebi je plibonigo de propraj socialaj, politikaj kaj kulturaj rajtoj;
- preparado de homoj je laboro kaj konsenta kunvivado en multkultura socio.<sup>1</sup>

Laŭ Tadeusz Lewowicki, unu el karakterizaj trajtoj de multkultura edukado (eble la plej grava), kaŭzata de sociaj bazoj, estas „(...) «vivado apude» de grupoj kaj iliaj kulturoj. La «vivado apude» okazadis iam kaj okazas nuntempe en kondiĉoj de asimetrio, malegaleco de ŝancoj je evoluo, malegaleco de eblecoj je reciproka interagado. Grupoj dominantaj (kaj en ilia nomo - elitoj de registaro), indikadis limojn de libereco al minoritataj grupoj. Agadon ligatan kun multkultura edukado ofte karakterizis kaj nuntempe karakterizas signoj de hegemonia kaj instrumenta aliro. Pli aŭ malpli kaŝita celo de tiu ĉi agado estis asimiligo kaj subteno de socia ordo. Eduka ideologio de «vivado apude» estis akceptata (kaj daŭre estas) de pluraj minoritataj grupoj. La grupoj - koncentriĝante sur konservado de propra kulturo kaj subtenado de sia grupa idento - perceptis multkulturan edukadon kiel ŝancon transvivi. Ofte vere ĝi estis la unika ŝanco. Natura efiko de tiel komprenata kaj realigata edukado estis kaj estas konservo de diversaj elementoj de idento (lingvo, kulturo, «eta sistemo» de propra edukado), sed samtempe ankaŭ izoliĝo, distanco inter minoritata grupo kaj la grupo dominantanta. Tiu ĉi situacio naskis sociajn problemojn,

<sup>1</sup> B.Bartz: *Idea...*, op.cit., p.13; D.Wojakowski: *Wielokulturowość pogranicza...*, op.cit., p.123.

*hegemonii.Polityka wielokulturowości i populistyczna reakcja* [en:] S.J.Ball: *Foucault i edukacja.Dyscypliny i wiedza*, Kraków 1994, pp.163–186.



*diversigis sociajn statusojn kaj ŝancojn vivi. Tiuj ĉi fenomenoj aperas ankaŭ nuntempe.*”<sup>1</sup>

Bazoj de popularigata modelo de multkultura edukado situiĝis en ideo de asimiligo de diversaj medioj laŭ samaj rajtoj kaj reguloj de organizo, danke al samaj programoj de instruado kaj edukado. Montriĝis tamen, ke pro tiu ĉi procezo okazas disiĝo aŭ diseriĝo de idento de la medioj, kaj siaspeca disfandiĝo de minoritataj grupoj en larĝaj sociaj organismoj, ligita kun limigo de ŝancoj je vivo. La dominanta plimulto tute ne devas esti klare difinita grupo nacieca, kultura aŭ etna. Multkultura edukado povas ja favori grupojn privilegiatajn kaj elitojn, kiuj posedas proprajn programojn de instruado (bazitajn sur ideo de forigado de mankoj en socikultura progreso) ofte estantaj nur ŝajnaj agadoj, kiujn oni povas konsideri kiel „edukaj stratoj sen eliro”.<sup>2</sup> Bazanta sur tiuj ĉi ideoj kleriga politiko tute ne devas koncerni tutan landon, sed ankaŭ regionon, difinitan lokon, aŭ insitucion.

„Batalo” por universala libereco kaj egaleco, kiu origine estis bazo de la modelo de multkultura edukado, finfine turnis sin kontraŭ la personoj, al kiuj ĝi devis garanti pli bonan estonton. La multkultura edukado reale iĝis unukultura edukado, kaj ĝiaj bazoj firmiĝis en kleriga kaj socia politikoj adresataj precipe al devenantaj de minoritataj medioj civitanoj-laboristoj - do, al malmultekosta laborforto tiom necesa en industrio. La ĉefa efiko de multkultura edukado devis esti plibonigo de eduka situacio de minoritataj etnaj kaj kulturaj grupoj, pro tio oni propagandis pri ĝi kiel pri edukado kontraŭrasisma, kies rezulto estus socia justico.<sup>3</sup>

Teorie, batalante kontraŭ unukulturismo, tiu ĉi edukado provis enkonduki en lernejojn kulturen pluralismon, kio devus rekompenci edukajn mankojn al infanoj el minoritataj grupoj.

<sup>1</sup> T.Lewowicki: *W poszukiwaniu modelu edukacji międzykulturowej*. [en:] T.Lewowicki (org.): *Edukacja międzykulturowa w Polsce i na świecie*. Katowice 2000, p.25.

<sup>2</sup> *Ibid.*, p.33.

<sup>3</sup> J.Nikitorowicz: *Wartości...*, *op.cit.*, p.13.

Atingo de tiu ĉi celo - precipe grandskale - montriĝis tro malfacila, foje eĉ nebla. Ekzistantan en komenco entuziasmon kaj konvinkon pri eblo de renovigo de lernejsistemo, anstataŭis do kritiko. Montriĝis, ke tute ne eblas regi komplikajn dinamikajn problemojn de kultura diverseco - des pli, ke pro diversaj kialoj ne eblis forigi strukturajn malegalaĵojn, kiuj limigadis ŝancojn je vivo de gelearnantoj apartenantaj al minoritataj grupoj. Troige koncentriĝante sur aferoj de protekto de kultura idento, oni neglektis problemojn venantajn de reciprokaj rilatoj de minoritataj grupoj kaj dominanta medio. Do malgraŭ, ke en lerneajn programojn oni enkondukis pluralismon, ili ne sukcesis ŝanĝi unukulturen modelon de instruado dominantan en lerneja sistemo.<sup>1</sup>

T.Lewowicki rimarkas, ke en multkultura edukado: „*Regantaj elitoj, majoritataj grupoj kaj ŝtataj institucioj decidis pri limoj de libereco. Ili faris tion influataj de diversaj internaj kaj eksteraj okazaĵoj, kun pli malpli granda malfido. Foje, la agado havis paternalisman karakteron: «bona» registaro (tiel ĝi devis esti perceptata de minoritataj grupoj kaj internaciaj medioj) permesas agadi en difinitaj manieroj, kio servus al apogo de idento de minoritataj grupoj. Tamen pli supera celo estis asimiligi ilin, aŭ almenaŭ subteni socian trankvilon. Estas malfacile indiki regantajn elitojn kaj majoritatajn grupojn, kiuj kun plena konvinko kaj sen limigoj realigus socialan politikon de samniveligo de ŝancoj je vivo de minoritataj grupoj; kaj la celo de tiu politiko estus plenrajta kaj egalrajta multkultura edukado. Leĝo kutime protektis ĉefe interesojn de majoritataj grupoj kaj - diversmaniere kaj kun diversaj pravigoj - limigadis ageblecojn de minoritataj grupoj. La minoritataj grupoj siaflanke provadis akiri pli larĝajn liberecojn, penis akiri proprajn grupajn celojn kaj kontentigi bezonojn de difinita grupo.*”<sup>2</sup>

Avantaĝo de multkultura edukado (pri kiu atestas nuntempe utiligado de ĝi, malgraŭ agnosko de fiasko de ĝiaj reguloj)

<sup>1</sup> *Ibid.*, pp.13–14 – Cf.: *idem: Pogranicze, tożsamość...*, *op.cit.*, p.117.

<sup>2</sup> T.Lewowicki: *W poszukiwaniu modelu...*, *op.cit.*, pp.25–26.

bildiĝas hodiaŭ en ĝia efikeco subteni statikan staton de multkulturaj medioj. Tiel okazas malgraŭ deklaroj pri protekto de kulturaj minoritatoj. Krom tio, politiko de asimiligo de minoritatoj permesas malpligrandigi (almenaŭ por iu tempo) konfliktojn kaj bari alvenon de Diferenculoj/Fremduloj en iun lokon. Tiuj el ili, kiuj timas pri sia idento, preferas eviti lokojn, en kiuj senkondiĉe ili devus subiĝi al dominacio kaj iom post iom asimiliĝi. Malgraŭ ke pri avantaĝoj de tiuspeca politiko oni ne parolas klare en pluraj sferoj (pro politika korekteco), tamen ĝi estas agnoskata kaj rimarkebla ankaŭ en politiko de edukado.

### 1.2.2. Interkultura edukado

En lastaj jardekoj de la XX-a jarcento kaj komence de la XXI-a jarcento, aperis nova rigardo al aferoj de edukado en kulture diversigitaj socioj. Ĝi estas ligita kun evoluo de la modelo de multkultura edukado kaj kun provoj anstataŭi ĝin per nova modelo, kies bazojn kunkreas aliaj aksiologio kaj socia politiko, respektantaj atendojn kaj bezonojn de individuoj kaj grupoj. Negativaj spertoj ligitaj kun multkultura edukado kaj ĝiaj efikoj en sociala praktiko iĝis bazo de interkultura edukado.

Edukado bazita sur ideologio de interkultureco, estas specifa modelo de sociala, kultura kaj kleriga agadoj. Ĝi celas reciprokan konatiĝon, kompreniĝon kaj enriĉigon de kulturoj kaj de unuopaj personoj, kiuj kunkreas tiujn ĉi kulturojn. La ĉefa trajto de tiu ĉi edukado estas malfermo je Diferenculoj/Fremduloj kaj je iliaj problemoj. Kiel en multkultura edukado, la preferata efiko estas asimiligo de minoritatoj pere de ĝia subigo al dominanta grupo kaj subtenado de *status quo* - tiel en interkultura edukado la ĉefa punkto estas integriĝo kaj socikultura dinamikigo de diferencaj kulturaj sferoj, pere de reciproka alproksimiĝo de iliaj partoprenantoj.

Necesas rimarki, ke en koncepto de integriĝo ne ekzistas fundamento de ideo de kaŝa aŭ malkaŝa subigo/superregado de iu ajn grupo. En tiaj kondiĉoj, danke al dialogo, reciproka konatiĝo kaj alproksimiĝo, povas aperi kondiĉoj por transmetado kaj

transprenado de la plej valoraj elementoj de kulturoj de kontaktiĝantaj individuoj kaj grupoj. Tio ĉi helpas dum kunlaboro en diversaj sektoroj de vivo kaj samtempe permesas konservi apartecon.<sup>1</sup>

En interkultura edukado oni perceptas kaj estimas internajn diferencojn de socio (etnajn, rasajn, kulturajn ktp.), kun kiuj estas ja ligitaj diferencaj bildoj kaj aliroj al la mondo. Interkultura edukado estas unu el eblaj aliroj al kultura diverseco. Ĝia ĉefa operacia nocio estas karakteriza en postmodernismo malreduktebla diferenco, kiu koncernas grupojn kaj individuojn de diversaj rasoj, naciecoj, kulturoj, kredoj, ideoj, preferoj, personaj ecoj ktp. La diferenco estas traktata ne kiel valoro en si mem, sed kiel specifa eco de homo kaj kiel faktoro, kies ekziston postsekvas komplikaj konsekvencoj.

En interkultura edukado ne temas, kiel en multkultura edukado, pri forigado de diferencoj post ilia elmonro (ofte negativa), sed pri komprenigado al si mem kaj al aliaj personoj de ekzisto de la diferencoj, de ilia senco kaj reala valoro. Danke al tio, individuo estas preparata vivi en postmoderna mondo, kies ĉefa stato estas ja diferencigo. Kun tiu ĉi aliro al realo estas ligita rezigno pri favorigado de iu ajn kulturo kaj pri koloniigo de idento de aliaj personoj. Oni do rimarkas tie ĉi tendencon trakti ĉiujn kulturojn kaj etnojn laŭ egalaj reguloj, kaj sendependiĝi de politiko.<sup>2</sup>

C.Clanet karakterizas interkulturan edukadon kiel rimedon helpantan en interagado de minoritataj kulturoj kun reganta kulturo, danke al kio povas aperi kunekzistado en interne diferencigita unuo. Ĉiu el la kulturoj konservas propran sistemon de signifoj, valoraĵoj ktp., sed paralele partoprenas en relative malfermita, facila por akcepti sistemo de komunaj valoraĵoj kaj signifoj. Inter ili aperas pera (apudlima) nivelo de komunikado, kiu ne difektas identojn de la kulturoj kaj samtempe favoras ekzistadon de universalaj valoraĵoj kiel toleremo, komprenemo

---

<sup>1</sup> *Ibid.*, p.26.

<sup>2</sup> *Ibid.*, p.31.

kaj estimo. La valoraĵoj estas senĉese kreaĵaj, interŝanĝataj kaj negocataj. Sistemo de interkultura edukado estas do sistemo malfermita, dinamika, kunkreita de reciproka interagado de subsistemoj biopsikologia kaj socikultura. Tiuj ĉi subsistemoj dependas kaj de pasinto, kiu kreis kelkajn el iliaj strukturoj - kaj de nuntempo, ĉar ili reagis je nunaj okazaĵoj, al kiuj oni adaptiĝas aŭ ne. La edukado povas okazi en jenaj spacoj:

- rilata spaco (en rilatoj inter du personoj - ankaŭ dum iliaj konfliktoj);<sup>1</sup>
- grupa spaco (personaj elementoj iĝas elementoj de eksteraj rilatoj de grupoj);
- institucia spaco (kadre de funkciado de institucio lokita en specifa medio).<sup>2</sup>

J.Nikitorowicz difinas interkulturan edukado kiel „(...) *ensemblon de reciprokaj influoj kaj interagadoj de individuoj kaj grupoj, institucioj, organizaĵoj, asocioj ktp., kiuj helpas al homo evolui tiel, ke li iĝu konscia kaj kreiva membro de komunumoj: familia, loka, regiona, religia, nacia, kontinenta, kultura kaj globala (planeda), kaj ke la homo estu kapabla aktive memrealiĝi en siaj propraj, unikaj kaj daŭraj idento kaj aparto.*”<sup>3</sup>

En tiu ĉi procezo patroprenadas en difinita medio infanoj, adoleskoj kaj plenkreskuloj, perceptataj kiel individuoj, partoprenantaj en edukado formala (lerneja) kaj neformala.<sup>4</sup> Kvankam interkultura edukado koncernas ĉiujn tavolojn de socio, ĝi estas direktata ĉefe al infanoj kaj adoleskoj, ĉar ĝuste ja ili estos membroj de plimulto de estontaj interkulturaj socioj. Krom tio, precipe la gejunuloj kunkreadas grandan reton de komunikaĵoj direktataj al plenkreskuloj, do ili povas helpi en ilia edukado - ekz. per komprenigado de neceso de ŝanĝoj.<sup>5</sup> Do, almenaŭ teorie, interkultura edukado gvidas tiel ankaŭ al

<sup>1</sup> La aŭtoro uzas plursignifan nocion *relation duelle* – rilato duobla, inter du agantoj, kiun eblas kompreni ankaŭ kiel konfrontadon (fr. *duel* – duelo).

<sup>2</sup> C.Clanet: *L'interculturel...*, op.cit., pp.123–141.

<sup>3</sup> J.Nikitorowicz: *Wartości...*, op.cit., p.9.

<sup>4</sup> idem: *Pogranicze, tożsamość...*, op.cit., pp.116–117.

<sup>5</sup> M.Taylor: *Concepts-clés...*, op.cit., p.46.

integriĝo de generacioj, kaj helpas al ili utiligi universalan kulturan heredaĵon, subtenante identojn de individuoj kaj homamasoj.<sup>1</sup>

Celoj de interkultura edukado koncernas ĉiujn individuojn kaj grupojn troviĝantajn en situacio de apudlimo, diversigitajn laŭ ĉiuj eblaj kriterioj. La celoj estas ligitaj kun sinteno de la individuoj kaj grupoj rilate al Diferenculoj/Fremduloj apartenantaj al subkulturoj en propraj homamasoj, kaj al socioj foraj laŭ lokoj kaj tempoj. Tiu ĉi celoj estas ligitaj kun ĝenerala tasko de interkultura edukado, tio estas konstruado de interkultura socio kaj de interkultura kulturo<sup>2</sup> pere de rivelado de scio kaj instruado de konoj necesaj por solvi problemojn aperantajn pro kultura diverseco.

En la procezo de interkultura edukado gravaj estas sentemeco je diferencoj, instigado konatiĝi kun ili, instruado kaj kreigado de pozitivaj tiurilate inklinoj, sintenoj, scioj, bezonoj kaj konsciaĵoj. Por ke iu socio iĝu vere interkultura, ĉiu socia grupo kaj kadre de ĝi ĉiu individuo, devus havi eblecon vivi en kondiĉoj de egaleco, sendepende de propra kulturo, vivstilo kaj origino. Estus do bone ŝanĝi (revizii) manieron percepti kulturojn, kiuj ŝajnas fremdaj kompare kun propra kulturo. Nepre necesas ŝanĝi manieron konduki kun minoritataj grupoj kaj individuoj, kiuj kutime suferas pro diversaj formoj de maltolero kaj diskriminacio (ekz. handikapuloj kaj samseksemuloj). Por ke tia socio aperu, necesas mobilizi plurajn fortojn: sociajn, ekonomiajn, politikajn, religiajn

<sup>1</sup> T.Lewowicki: *Wprowadzenie* [en:] idem (org.): *Edukacja międzykulturowa w Polsce...*, op.cit., p.17.

<sup>2</sup> Laŭ P.Sztompka kulturo estas “*tuteca vivmaniero karakteriza en iu homamaso, kiu enhavas ĉion, kion la homoj «faras, pensas kaj i posedas»*, kiel membroj de socio” (idem: *Socjologia – analiza społeczeństwa*, Kraków 2003, p.255). Supozante, ke sociajn rilatojn en iu medio karakterizas interkultureco, oni povas paroli pri interkultura kulturo. Karakterizas ĝin rilatoj bazitaj sur ideologio de interkulturismo. Laŭ analogio, eblas imagi multkulturan kulturon, kies bazo estus la ideologio de multkulturismo. Tiuj ĉi nocioj bezonas tamen detalan konsideron.

ktp.,<sup>1</sup> sed precipe favori ŝanĝojn de mentaleco de personoj partoprenantaj en kontaktoj de diferencigitaj medioj.

Detalaj celoj de interkultura edukado, koncernas jenajn aferojn:

- en sfero de sintenoj:
  - perceptado de socio kiel tutaĵon de kunekzistantaj kaj kruciĝantaj grupoj kaj personoj, kiuj transpaŝas limojn de propraj apartoj kaj diferencoj;
  - vekado de toleremo kaj raciemo en reagoj je diferencoj, kaj estimado de la diferencoj malgraŭ ĉio; vekado de sentemeco je aliaj kulturoj, kiuj kun siaj valoroj kaj vivmodeloj pliriĉigas universalan kulturon;
  - forigado de sento de kultura supereco, naciismoj kaj etnismoj, antaŭjuĝoj kaj stereotipoj, tendencoj al ekzotismo<sup>2</sup> kaj ksenofilio;<sup>3</sup>
  - kontraŭstarado je ĉiuj formoj de ksenofobio, diskriminacio, rasismo, malamo ktp. kontraŭ Diferenculoj/Fremduloj;
  - elvokado de empatio, malfermeco je la mondo, laboro por paco, egaleco, frateco, solidareco en ĉiu medio; propagandado de ideoj de justa mondo sen subigo, diskriminacio kaj malsato ktp.;
- en sfero de kompetentecoj:
  - perceptado, distingado kaj komprenado de kulturaj diferencoj, propraj dignaĵoj kaj valoroj en kontaktoj kun Diferenculoj/Fremduloj; memakceptado malgraŭ rimarkitaj diferencoj kaj eĉ spite al ili; perceptado de diferenceco kiel elemento danĝera kaj malamika, sed kiu enriĉigas, inspiras kaj vekas intereson; rimarkado, ekkonado kaj komprenado de Diferenculoj/Fremduloj traktataj kiel neeviteblaj najbaroj;
  - forlasado de centroj de propra kulturo; interna enriĉiĝo pro forigado de limoj kaj baroj; konscia funkciado sur apudlimoj de kulturoj; interkultura komunikado;

<sup>1</sup> M.Taylor: *Concepts-clés...*, op.cit., p.41.

<sup>2</sup> Blinda, senkritika prefero de ĉio fremda al propra kulturo.

<sup>3</sup> Blinda, senkritika amo kaj favorigado de eksterlandanoj kaj iliaj vivmanieroj.

- rekonado de malegalaĵoj, maljustaĵoj, diskriminaciaĵoj, marĝenigo, rasismo, stereotipoj kaj antaŭjuĝoj kontraŭ Diferenculoj/Fremduloj;
  - serĉado de interkonsento en diversaj vivsferoj, pere de interagado, dialogoj, negocado kaj interŝanĝo de valoroj kun Diferenculoj/Fremduloj;
  - favorigado kaj enkuraĝigado de reciprokaj rilatoj inter diversaj homamasoj - precipe inter grupoj de kulturaj kaj etnaj minoritatoj; funkciigado de sociaj meĥanismoj, kiuj helpas solvi problemojn ligitajn kun diferencigo, antaŭjuĝoj, negativaj sintenoj kaj stereotipoj; paca kunvivado malgraŭ diferencoj, kontraŭaj interesoj kaj ligitaj kun ili tensioj kaj konfliktoj;
- en sfero de konscio:
    - senpartieca egaleco kaj egalrajteco de ĉiuj kulturoj;
    - propraj idento, valoraĵoj, aparteco, sendependeco, kulturaj radikoj, tradicioj, kutimoj, moroj;
    - ligoj grupaj, familiaj, etnaj, lokaj, kulturaj, regionaj, naciaj, supernaciaj, globalaj;
    - ekologiismo en kunteksto de natura medio kaj socio.

Oni indikas tiom multajn celojn de interkultura edukado, ĉar sociaj bezonoj tiurilate estas tre grandaj kaj multaj institucioj partoprenas tiun ĉi procezon siaflanke - aŭ almenaŭ tion deklaras. Ĝenerale eblas konkludi, ke la celoj enskribiĝas en teleologion kaj aksiologion de demokratiaj socioj. Oni rimarkas en ili idealojn de la mondo de bono, beleco kaj socia justeco, en kiu oni respektas interesojn de ĉiuj sociaj grupoj. Kvankam tiu ĉi vizio estas sendube utopia, naiva kaj kaj sentimentala, tamen videble ĝi plaĉas en epoko de dehumanecigo de vivo, perforto kaj diskriminacio perceptataj ĉefe en medioj de minoritatoj.

T.Lewowicki rimarkas, ke interkultura edukado estas la ŝanco por demokratia klerigado, kiu garantius al ĉiuj grupoj sukcesan evoluon, malgraŭ ke en realigado de tiaj celoj ne helpas socia ordo kaj konfliktoj de intereso. Interkulturan edukadon oni povas percepti kiel socian praktikon en renkontiĝo (dialogo) de kulturoj, kaj ankaŭ kiel socian praktikon en konflikto de



kulturoj.<sup>1</sup> Paradokse do, interkultura edukado povas esti komprenata kiel procezo, kiu helpas alfronti konfliktojn kaj diskriminaciojn, kiuj mobilizas al agado kaj provokas kreadon de novaj valoroj. Ĉar komprenema alfrontado de konflikto kaj diskriminacio, povas komenci dialogon, kiu estas ja bazo de interkompreniĝo kaj kompromiso.

Gravan rolon en kreado de vizio kaj socia praktiko de interkultura edukado, ludas ŝtato kaj ĝiaj stukturoj de povo. T.Lewowicki skribas: „*Regantaj elitoj en la nomo de dominanta grupo, indikas areoj de edukado al grupoj minoritataj kaj malpli fortaj (politike, ekonomie, kulture ktp.). En politiko de plimulto de ŝtatoj - sendepende de oficialaj deklaroj - oni preferas procesojn de asimiligo. Asimiligo do estas la plej grava obstaklo en realigado de interkultura edukado.*”<sup>2</sup>

Krom favora politiko de registaro, alia kondiĉo de sukcesa realigado de programoj de interkultura edukado estas socia permeso. Perforta realigado de la programoj estus fakte agado ankoraŭ pli utopia, hazarda kaj malklara, ĉar - kiel rimarkas J.Nikitorowicz - sociaj rilatoj kaj reciproka komunikado de kulturoj gvidas ĉu al evoluo, ĉu al konflikto.<sup>3</sup> En kazo de evoluo temas pri malfermiĝo je Diferenceco/Fremdeco kaj progreso danke al reciproka prunteprenoj de valoraj. Interkultura edukado permesas transpaŝi limojn, normojn kaj kulturajn modelojn. Sukceso ĝia dependas tamen de estimo al la medio, en kiu okazas la procezo.<sup>4</sup> La saman ideon daŭrigas T.Lewowicki: „*En interkultura edukado oni penadas, ke membroj de sinsekvaj kulturoj ne iĝu malliberuloj de propraj kulturaj konvenaĵoj nur pro la fakto elkreski en iu socio. Kultura homogeneco povas ja*

<sup>1</sup> T.Lewowicki: *W poszukiwaniu modelu...*, op.cit., pp.27–33.

<sup>2</sup> *Ibid.*, p.33.

<sup>3</sup> M.Golka: *Problemy i dylematy edukacji dla wielokulturowości* [en:] J.Nikitorowicz kaj al. (org.): *Kultury tradycyjne a kultura globalna. Konteksty edukacji międzykulturowej*, Białystok 2001, vol.1, p.140. – Ekzemploj de tia situacio - J.Demorgan: *L’histoire interculturelle des sociétés*, Paris 1998, p.45 kaj sekvaj.

<sup>4</sup> J.Nikitorowicz: *Wartości...*, op.cit., p.8.

*malliberigi kaj malpermesi senti malcerton, kontraŭdiraĵojn kaj evoluon.*”<sup>1</sup>

Pro la ĉi supraj faktoj, interkultura edukado ne estas ideala modelo, facile akceptebla al ĉiuj kaj realigebla ie ajn. Kun ĝi estas ligita senĉesa pripenso pri cirkonstancoj, eblecoj, obstakloj, perspektivoj kaj eventualaj danĝeroj ligitaj kun tiuspeca eduka praktiko. Personoj, kiuj projektas ĝin, realigas kaj konscie partoprenas, alfrontas amason da dilemoj kaj devon senĉese elektadi. J.Nikitorowicz indikas jenajn regulojn de eduka agado en situacio de interkulturaj rilatoj:

- konstruado de interagado laŭ regulo de egaleco de ĉiuj partoprenantoj;
- konsciigo, ke ne eblas akiri sian identon en teknologia maniero, sed nur en komplika procezo de interhoma komunikado, en kiu la subjekto estas situacio, kaj la objekto homoj, kiujn karakterizas diversaj vivstiloj, bezonoj kaj kulturaj heredaĵoj;
- kono de bezonoj de individuo, de individuaj parametroj de ĝiaj evoluo, intereso, ŝatokupoj, intelektaj kondiĉoj, fizikaj kaj emociaj kondiĉoj - sed precipe de ĝia situo en familia kaj loka kulturo;
- praktika utiligado de scio pri aktivaĵoj de individuo; pri manieroj de memrealigado de la individuo en kondiĉoj de diversaj interagadoj;
- ebligado de spontanea kreado, aktiva reago je ĝi per koncentriĝo, sentado kaj pensado;
- garantio de rajto libere elekti taskojn el multaj proponitaj, kaj serĉado de diversaj eblaj manieroj realigadi la taskojn; garantio de rajto libere decidi kaj propramaniere, subjektive pritaksi faritan laboron kaj rezultojn de la laboro;

<sup>1</sup> *Idem: Socjotechnika w edukacji regionalnej i międzykulturowej wobec celów i wartości młodzieży oraz idei zjednoczenia Europy* [en:] T.Lewowicki (org.): *Edukacja...*, op.cit., p.51.

- garantio de etoso de senpera ligo kaj psika kontakto, danke al kiuj aperas eblecoj de kiel eble plej efika helpo kaj subteno en edukado;
- apogo de reciproka agado sur kreivaj ideoj kaj toleremo;
- kreado de etoso de seninteresa bonvolemo, pozitivaj emocioj kaj helpemo, danke al kiuj aperas pli granda kredo je propraj fortoj kaj ebloj, kaj malaperas formalaj, malfido kaj timo.<sup>1</sup>

Lernante kiel funkcii en interkulturaj rilatoj, oni povas apogi sin sur jenaj reguloj:

- sentiveco kaj emocieco - scii kiel partopreni en interkulturaj luktoj, kiel suferi iliajn sekvojn kaj provokatajn de ili ŝokojn, kaj trakti ilin kiel naturajn signojn de dinamiko de kulture diversigita socio;
- komunaj trajtoj - rimarkado en si mem kaj en Diferenculoj/Fremduloj de samaj aŭ similaj agoj, simboloj, signoj (ofte prunteprenitaj de aliaj kulturoj);
- imagoj, kreativeco kaj ludo - fundamento de agado estas ritualigita rivalumado (precipe simila al tiu ĉi en sportejoj)<sup>2</sup>

Teorie, interkultura edukado koncernas ĉiujn tavolojn de socio. Ne eblas nomi „interkultura” socion, kiu funkcius nur en difinitaj, apartaj tavoloj, ĉiu fermita en propraj aferoj, streboj, interesoj kaj problemoj (ekz. nur en medioj de minoritataj grupoj). La procezo okazas do en du paralelaj, reciproke kompletigantaj sferoj - formala kaj malformala.

Bazo de formala interkultura edukado estas ĉefe programoj realigataj en institucioj de klerigado kaj edukado, aŭ aliaj institucioj, kiuj oficiale estas ligitaj kun edukado en iu ajn senco. Precipe lernejoj devas esti malfermitaj je realaĵoj de kulture diversigitaj socioj. Programoj realigataj en tiuj ĉi institucioj baziĝas sur ideoj de egaleco kaj estimo de diferencoj

ekzistantaj inter individuoj kaj grupoj, kio devigas respekti karakteron de medio de ĉiu lernejo aparte. En tiu senco, lernejo ne rajtas transmeti kaj subteni stereotipojn ligitajn kun Diferenculoj/Fremduloj, sed ĝi devas inspiri kaj realigi kreivan, plurnivelan komunikadon inter ĉiuj partoprenantoj de edukado: geinstruistoj, gelernantoj, gepatroj, administraj gelaboristoj, regantaj elitoj, aliaj institucioj, ĉiuj personoj kaj faktoroj funkciantaj en medio de la lernejo ktp. Por ke la procezo ne estu malkontrolata (do foje spontanea kaj senpripensa), interkultura edukado devas esti elemento de programo de klerigado de ĉiuj geinstruistoj. Lernolibroj kaj aliaj instruhelpiloj devas esti bazitaj sur diversaj fontoj, venantaj el pluraj medioj tiel, ke gelernantoj (gestudentoj) povu konatiĝi kun prezentataj aferoj el diversaj vidpunktoj, en diversaj perspektivoj - kaj tiu ĉi maniero estu traktata kiel tute natura kaj normala.

Celoj de malformala interkultura edukado estas similaj, tamen en realigado de ili aperas diferencaj personoj kaj metodoj. Procezoj de malformala interkultura edukado ofte estas realigataj en kulturaj centroj (ekz. komunumoj de artistoj), junularaj movadoj kaj organizaĵoj, fakaj asocioj ktp. La agado okazas dum publikaj festenoj kaj amasaj aranĝoj (ekz. movadaj renkontiĝoj), surstrate, dum internaciaj interŝanĝoj de gejunuloj, en ĉiuspecaj eblaj lokoj kaj niveloj de sociaj renkontiĝoj. Ofte partoprenas ilin diversspecaj volontuloj. La agado ne estas deviga, do kutime ne estas malaprobata de gelernantoj, kiuj ofte malŝatas oficialan lernejan programon kaj reĵetas ĝin pro kaprico. Danke al tio, tiuspecaj aktivaĵoj alproksimigas iliajn partoperantojn, faciligas reciproke komunikadon - des pli, ke temojn de la aktivaĵoj oni povas pli frue interkonsenti kun ili, laŭ (mal)ŝatoj kaj bezonoj de ilia medio.

Danke al libereco elekti temojn kaj formojn, en malformala interkultura edukado estas pli granda ebleco de eduka sukceso.<sup>1</sup> Ofte estas malfacile detale observi kaj pritaksi malformalajn praktikojn de interkultura edukado, ĉar en pluraj medioj oni ne

<sup>1</sup> J.Nikitorowicz: *Edukacja międzykulturowa na pograniczach kultur (propozycje realizacyjne)* [en:] T.Lewowicki, B.Grabowska (org.): *Spoleczności...*, op.cit., pp.182–183; A.Klimowicz (org.): *Edukacja międzykulturowa.Poradnik dla nauczyciela*, Warszawa 2004.

<sup>2</sup> J.Demorgan: *L'exploration interculturelle.Pour une pédagogie internationale*, Paris 1989, pp.87–90.

<sup>1</sup> M.Taylor: *Concepts-clés...*, op.cit., pp.43–46.

planas kaj ne realigas ilin laŭ oficialaj kaj „palpeblaj” reguloj (ekz. ne preparas iujn ajn dokumentojn, raportaĵojn ktp.). Tio tamen ne signifas, ke ili estas malefikaj.

En interkultura edukado oni ne instruas pri aliaj kulturoj, sed kulturigas ĉiujn etapojn kaj elementojn de klerigado.<sup>1</sup> Xavier Cuillard karakterizante optimuman modelon de praktiko de interkultura edukado rimarkas, ke:

- en lerneja kaj eksterlerneja medio necesas rimarki ne nur diferencecon de personoj, kiujn koncernas la edukado, sed ankaŭ trakti ilin kiel riĉan fonton de lingvaj kaj kulturaj valorajoj, kiujn eblas ĉerpi;
- partoprenantoj de la eduka situacio devus havi eblecon klare situi sin en la procezo de edukado kaj inter aliaj personoj, kiuj patroprenas ĝin, por povi reciproke dividi informojn kaj aliajn valorajojn en ĝustaj kuntekstoj;
- edukaj institucioj devus esti malfermitaj je la medioj, en kiuj ili situas, por utiligi ĉiujn eblajn rilatojn kun individuaj personoj, formalaj organizaĵoj kaj institucioj, malformalaj grupoj kaj komunumoj ktp.<sup>2</sup>

Evidente ekzistas pluraj modeloj de interkultura edukado kaj pluraj specoj de programoj. Ili dependas de tradicioj kaj de specifaj, apartaj kondiĉoj de ĉiu medio, en kiu la edukado okazas. Similaj temoj, celoj kaj metodoj ekzistas en konceptoj de aliaj modeloj de edukado - ekzemple en edukado por homaj rajtoj, edukado kontraŭrasisma, edukado por evoluo, edukado globala ktp. Estus tamen sensece kaj neeble firme apartigi tiujn ĉi modelojn.

Laŭ Wiktor Rabczuk, nuna graveco de interkultura edukado estas rezulto de malvenko de ideologioj de universalismo kaj

kompansemo. Ŝatantoj de la ideologioj opiniis, ke kulturaj minoritatoj devas trakti la dominantan kulturon kiel fonton de universalaj valoroj, kaj alta nivelo de civilizacio permesas asimiligi homamasojn, regionajn kulturojn, komunumojn de migrantoj ktp. Danke al disvolviĝo de kultura antropologio, de ideologio de postmodernismo kaj pro krizo de okcidenta civilizacio, realitiviĝis valorajoj kaj idealoj de Okcidento. Danke al tio malfermiĝis vojo por kultura pluralismo kaj interkultura komunikado.<sup>1</sup>

Necesas substreki, ke la modelo de interkultura edukado, malgraŭ ke ĝi daŭre evoluas kaj aktualiĝas, estas objekto de kritikoj. En epoko de globaligo, koncentriĝado sur bezonoj de (nur) individuoj povas gvidi al patologioj ligitaj kun egoismo kaj postulado de estimo malgraŭ ĉio kaj je ĉiu prezo.

Samtempe danĝere estus forgesi pri tradiciaj valorajoj de kulturaj komunumoj rigardataj kiel tutaĵo, do necesas protekti ili kiel fonton de ensociigo. Laŭ J.Nikitorowicz, interkultura edukado defendante individuojn kontraŭ perdiĝo en mondo de amasa kulturo, samtempe devus respekti iliajn mikromondojn. La mikromondoj estas superaj kaj primaraj rilate al globala idento, ĉar ili estas la unuaj etapoj en ĝia konstruado. En la mikromondoj, individuoj trovas la plej gravajn por ili universalajn kaj supertempajn valorajojn. La aŭtoro proponas do koncentriĝi en interkultura edukado sur valorajoj kiel: gepatraj lingvo kaj religio; ligoj kun primara teritorio; historia genealogio; tradicioj, moroj, kutimoj, normoj kaj vivreguloj funkciantaj en eta patrujo ktp. Ĝi estus do edukado en mikrostrukturoj. Surbaze de tiu ĉi fundamento eblas enkonduki edukadon en mezostrukturoj (nacia, ŝtata). Edukado en makrostrukturo

---

<sup>1</sup> M.Abdallah-Pretceille: *Vers une..., op.cit.*, p.159; H.Hannoun: *Les ghettos de l'école. Pour une éducation interculturelle*, Paris 1987, p.103; G.Mialaret: *La multiculturalité et l'éducation au XXI siècle* [en:] L.Marmoz, M.Derrij (org.): *L'interculturel en questions.L'autre, la culture et l'éducation*, Paris 2001, pp.271–272.

<sup>2</sup> X.Couillard: *De la "culture d'origine" et de la "pédagogie interculturelle"*, Paris 1981, p.29.

---

<sup>1</sup> W.Rabczuk: *Uwarunkowania i przykłady edukacji interkulturowej imigrantów w krajach Unii Europejskiej*, [en:] T.Lewowicki, J.Suchodolska (org.): *Rodzina, wychowanie, wielokulturowość*, Cieszyn 2000, p.12. – Pli vaste: *idem: Procesy migracyjne w Europie Zachodniej*, "Nowa Szkoła", No 7/1992, pp.434–435.

(kontinenta, monda),<sup>1</sup> povas aperi kiel natura sekvo de malfermo de mikrostrukturaj kaj mezstrukturaj subjektoj. Paradokse, la edukado en tria strukturo povus esti des pli vasta kaj ampleksa, ju pli forta estus identiĝo de individuoj kun propraj mikrovaloraĵoj. La individuoj forte identiĝantaj kun la valoraĵoj uzus ĉiujn okazojn por prezenti ilin kaj dividi kun aliaj personoj en interkulturaj kontaktoj.<sup>2</sup>

Interkultura edukado ne estas rimedo, kiu garantius sukcesan solvon de problemoj de difinitaj klerigsistemoj kaj socioj. Tamen utiligante ideon de kultura apudlimo, ĝi faciligas ligojn inter klerigado kaj edukado. Ĝi rivelas al infanoj kaj plenkreskuloj sciojn pri tio, kiel konscii pri si mem en kulture diversigita medio, kaj kiel agadi en kontaktoj kun aliaj personoj por reciproke ludi en siaj vivoj gravajn rolojn.<sup>3</sup> Interkultura edukado ne estas iu specifa praktiko destinata nur al Diferenculoj/Fremduloj - ekz. enmigrintoj, aŭ handikapuloj. Ĝi koncernas solidare ĉiujn partoprenantojn de socia vivo, kiuj pli malpli konscie partoprenadas en situacioj de interagado kiu postulas respekton de diferenco. Ĝi devus helpi al individuoj konstruadi propran identon pere de utiligado de eblecoj, kiujn oni trovas en kulture diversigita medio, kaj per kiel eble plej plena utiligado de la eblecoj en ĉiutaga vivo.<sup>4</sup>

Nuntempaj aŭtoroj de konceptoj de interkultura edukado penadas trovi respondojn je jenaj demandoj:

- Kiel eduki homojn por ke ili transvivu en la nuna mondo kiel nacio, sed samtempe kiel eble plej plene partoprenu en tutmonda integriĝo kaj globaligo, sen perdi propran identon?<sup>5</sup>

<sup>1</sup> Pli vaste: E.Gelpi: *Świadomość ziemska. Badania i kształcenie*, Kraków 1996, pp.93–100; E.Morin, A.B.Kern: *Ziemia – ojczyzna*, Warszawa 1998, pp.182–246.

<sup>2</sup> J.Nikitorowicz: *Wartości...*, op.cit., p.11.

<sup>3</sup> M.Abdallah-Pretceille: *Vers une...*, op.cit., pp.160–161.

<sup>4</sup> L.Bekemans, Y.Ortiz de Urbina: *Étude sur l'éducation: l'enseignement des immigrés dans l'Union européenne*, Luxembourg 1997, p.33–34. – Cf.: M.Abdallah-Pretceille: *L'école face au défi pluraliste. Choc des Cultures*, Paris 1989, p.229 kaj sekvaj.

<sup>5</sup> J.Nikitorowicz: *Wartości...*, op.cit., p.45.

- Kiel inviti al edukado de infanoj kaj gejunuloj plenkreskulojn, kiuj ne kapablas rezigni pri ofte negativaj sintenoj kaj stereotipoj rilate al Diferenculoj/Fremduloj?
- Kion fari, por ke interkultura edukado estu ne nur objekto de pripensado de elitoj, sed populariĝu en pli vastaj medioj?

Interkulturan edukadon kompletigas (aŭ laŭ kelkaj aŭtoroj estas partoj de ĝi)<sup>1</sup>, regiona edukado kaj civita edukado, kiuj en ĉiu lando (ŝtato, departamento ktp.) dependas de eduka politiko de administro.

### 1.2.3. Regiona edukado

Regionon oni povas percepti ne nur kiel kiel vastan socian spacon, en kiu okazas aktiva vivo en multaj sferoj de realo.<sup>2</sup> Oni povas difini ĝin kiel specifan mondon, kiu estas parto de nacio kaj ŝtato, materia fundamento de socia aktivado, kaj medio surbaze de kiu oni povas kreadi propran identon (kondiĉe, ke oni akceptas ĝin kiel propran lokon).<sup>3</sup> Elementoj, kiuj kunkreas regionon estas: teritorio, sociaj ligoj de loĝantoj de ĝi kaj modeloj de interagado ekzistantaj en spaco, kiun indikas:

- strukturo de loĝsistemo - ekzisto de administraj, ekonomiaj kaj kulturaj centroj, ilia hierarkio kaj internaj ligoj;
- alta nivelo de ekonomia kaj socia integriĝo - inter alie: konscio pri komuna kultura heredaĵo, identiĝo kun difinita teritorio kaj ĝia loĝantaro;

<sup>1</sup> F.Ouellet: *L'éducation interculturelle et l'éducation à la citoyenneté. Quelques pistes pour s'orienter dans la diversité des conceptions*, "VEI Enjeux", No 129/2002, pp.146–167.

<sup>2</sup> W.Świątkiewicz: *Region i regionalizm w perspektywie antropocentrycznego paradygmatu kultury* [en:] S.Bednarek kaj al. (org.): *Regionalizm polski u progu XXI wieku*, Wrocław 1994, p.25.

<sup>3</sup> K.Kossak-Główniczewska: *Edukacja regionalna, wielokulturowa...*, op.cit., p.61.



- alta nivelo de socia organizo - ĝi estas rimarkebla ekz. en disvolviĝo de aŭtonomiaj strukturoj de loka registaro, en lokaj iniciatoj ktp.;
- karaktero de limoj - ili povas esti pli aŭ malpli malfermitaj, kio permesas klare difini regionon kiel socikulturajn tutajn.<sup>1</sup>

Regiono povas funkcii en racioj de ĝiaj loĝantoj kiel eta patrujo, kondiĉe ke ili konscie perceptas lokajn valoraĵojn kiel unikajn kaj apartajn, kaj akceptadas ilin kiel komunan proprajn kaj heredaĵojn. La eta patrujo ekzistas nur en subjekta realaĵo de la loĝantaro kaj estas ligita kun emocioj. Ĝi iĝas la unua medio de kreado de idento kaj personeco, la primara medio de ensociigo. Pro tio, malgraŭ globaligo, ĉiu homo estas nature ligita kun sia eta patrujo - do ankaŭ kun sia regiono.<sup>2</sup>

Eĉ se loĝantoj de regiono sentas iujn eksterajn danĝerajn influojn, kiuj povus damaĝi iliajn identojn, tiu ĉi situacio paradokse plifirmigas iliajn ligojn kaj helpas disvolvi regionan lokan konscion de aparteco. Tiel estas facile krei regionan ideologion kaj igi ĝin bazo de regiona edukado.

Unu el la plej gravaj faktoroj, kiuj helpas disvolvi regionan identon estas regiona kulturo. Foje (sed ne devige) ĝi estas ligita kun kulturo de nacio aŭ kun pli vasta civiliza sfero. Regiona kulturo estas des pli grava por loĝantoj de la regiono, ke ĝi estas implikita en vivojn de lokaj familioj, grupoj kaj komunumoj de najbaroj, samaĝuloj ktp. Ĝi do estas fundamento de la plej fruaj homaj spertoj ligitaj kun socia vivo. Konstruante sian identon, homo apogas sin sur regiona kulturo, ĉerpante el ĝi ne nur vivmodelojn, sed ankaŭ regulojn de perceptado de mondo. Regiona kulturo estas influata de historiaj faktoroj de pasinteco kaj de nuntempaj civilizaj ŝanĝoj. Tiel ankaŭ regiono mem iĝas kultura valoraĵo de ĝia loĝantaro.<sup>3</sup>

<sup>1</sup> W.Świątkiewicz: *Region...*, *op.cit.*, p.25.

<sup>2</sup> J.Nikitorowicz: *Wartości...*, *op.cit.*, p.10.

<sup>3</sup> W.Świątkiewicz: *Region...*, *op.cit.*, pp.25–26.

En edukado, oni povas trakti regionon kiel komunan celon, kiu estas sumo de celoj de vivoj de unuopaj loĝantoj de la regiono, kiujn ligas komunaj vivkondiĉoj kaj (ankaŭ pro tio) komuna sorto.<sup>1</sup> Danke al ekzisto de komunaĵoj en vivoj de la loĝantaro, aperas unika konscio bazita sur regiona kulturo, kiu donas sencon al pluraj aspektoj de vivo en sferoj privata kaj publika, komunika kaj etika. El ideologia vidpunkto oni povas do paroli pri unika regionalismo, kiu iĝas unu el temoj de edukado.<sup>2</sup>

„Regionalismo” estas nocio plursignifa, kies senco evoluadis. Ĝian esencon kunkreas nocioj de teritorio, lingvo, konscio pri aparteco kaj diferencoj konsistigantaj regionon, sento de komuneco ktp.<sup>3</sup> Fine de XIX-a jarcento, en Francio oni parolis pri regionalismo kiel pri socikultura aktivado de loĝantoj de provincoj, kiu estas ligita kun streboj al parta aŭtonomio, eskapo de politikaj, ekonomiaj kaj administraj influoj de registaro.<sup>4</sup>

Laŭ Aleksander Patkowski, edukado saturita de regionalismo, helpas instigi popolon al kuna laboro por komuna bono; organizi kaj kunordigadi la laboron. Ĝi vekas intereson pri aferoj okazantaj en la plej proksima medio, danke al kio homoj sentas sin ligitaj kun ĝi kaj deziras peni por daŭrigi regionan historion.<sup>5</sup> En aliaj kazoj - kontraŭe: loĝantoj de regionoj unuiĝas kaj realigas specifan modelon de edukado, por batali kontraŭ najbaraj grupoj, aŭ liberiĝi de influoj de centro de dominanta kulturo. Tiam la edukado estas saturita de negativaj stereotipoj, ideoj de malŝato kaj malamo, planoj de agreso ktp. Ĝian realigadon akompanas intergrupaj tensioj kaj konfliktoj, kiuj povas gvidi eĉ al regionaj militoj.

<sup>1</sup> *Ibid.*, p.24.

<sup>2</sup> K.Kossak-Głowczewski: *Edukacja regionalna – pytania o realizację* [en:] J.Brzeziński, L.Witkowski (org.): *Edukacja wobec zmiany społecznej*, Poznań–Toruń 1994, pp.244–264.

<sup>3</sup> J.Kowalikowa: *Regionalizm w wymiarze społecznym, kulturowym i edukacyjnym* [en:] M.T.Michalewska (org.): *Edukacja regionalna.Z historii, teorii i praktyki*, Kraków 1999, pp.73–77.

<sup>4</sup> A.Łobos: *Z dziejów śląskiego regionalizmu – Paweł Musioł* [en:] M.T.Michalewska (org.): *Edukacja...*, *op.cit.*, p.65.

<sup>5</sup> Laŭ: A.Łobos: *Z dziejów...*, *op.cit.*, p.66.

Nuntempe regionalismo estas ligita kun protektado de kultura heredaĵo; konservado de valoraĵoj de kulturo kaj lokaj komunumoj; protektado de ili kontraŭ influoj de Fremduloj. Ofte oni penas konservi regionajn valoraĵojn ĉu pro danĝero perdi liberecon aŭ/kaj ŝtaton, ĉu pro ĵus reakiritaj libereco aŭ/kaj ŝtato (ekz. post milito, aŭ natura katastrofo). Tiam konscio de nacia kaj regiona idento iĝas pli forta ol kutime.<sup>1</sup> Oni do parolas hodiaŭ pri regionalismo en kunteksto de socia aktivado, ligita kun historio, kulturo, problemoj kaj perspektivoj de regiono perceptata kiel parto de tutaĵo nacia kaj universala.<sup>2</sup>

Nuntempajn regionalismojn oni ofte priskribas paralele kun fenomeno de nova etnismo, kiu estas konscia agado de regionaj kaj etnaj grupoj, bazita sur kultura heredaĵo kaj esencaj radikoj de propra kulturo. Movadoj de nova etnismo komenciĝis en Norda Ameriko kaj nun estas popularaj ankaŭ aliloke (en Eŭropo ekzemple en Bretonio kaj Katalunio).<sup>3</sup>

Foje regionalismo koncernas ne nur unu regionon, sed pli. Loĝantoj de kelkaj regionoj unuiĝas, aŭ agadas en interkonsento, por kunigi fortojn kaj realigi iujn planojn por komuna bono kaj profito. Tiel funkcias ekzemple interregionaj interkonsentoj, kiuj koncernas ekologiajn laborojn, protekton de geografia medio, realigadon de ekonomiaj planoj ktp. Foje la agadon partoprenas ne nur unuopaj regionaj grupoj de loĝantoj, sed ŝtataj administracioj, kiuj por realigi komunajn interesojn atingas diversajn kompromisojn. Tiam regionalismo kaj bazita sur ĝi

---

<sup>1</sup> Pli vaste: H.Skorowski: *Antropologiczno-etyczne aspekty regionalizmu*, Warszawa 1990, pp.11–13.

<sup>2</sup> J.Borzyszkowski: *Istota ruchu kaszubskiego i jej przemiany od połowy XIX wieku po współczesność*, Gdańsk 1982, pp.3–4; E.Ogrodzka-Mazur: *Regionalizm w procesie edukacji szkolnej (studium z pogranicza polsko-czeskiego)* [en:] T.Lewowicki (org.): *Szkoła na pograniczach*, Katowice 2000, p.97.

<sup>3</sup> K.Kossak-Głównzewski: *Niektóre aspekty niezależnej edukacji regionalnej* [en:] E.Rodziewicz, M.Szczepanska-Pustkowska (org.): *Od pedagogiki ku pedagogii*, Toruń 1993, p.73. – Cf. fenomeno de nova lokaleco: W.Burszta: *Antropologia...*, op.cit., pp.157–172.

ideo de edukado iĝas ilo de eksterlanda politiko kaj globala kunlaboro (ekz. Eŭropa Unio).<sup>1</sup>

Oni povas percepti jenajn variaĵojn de regionaj politikoj de klerigado kaj edukado:

- multkultura variaĵo - regionaj grupoj kaj komunumoj estas koloniigataj per dominanta kulturo, kiu ofte estas lokita en strukturo de nacia ŝtato. En edukado oni do penas asimiligi regionajn homamasojn kaj ŝanĝi iliajn identojn (similigi ilin al ĝenerala ŝtata idento, kaj forigi el ili kiel eble plej multajn regionalaĵojn). En programoj de klerigado oni substrekas ĝeneralajn, centrecajn ideojn, favoras oficialan ŝtatan lingvon kaj religion. Regionalismo estas traktata kiel eta, ne tre grava (foje eĉ negativa, danĝera, ĉar ligita kun malmoderneco) parto de ĝenerala kulturo;
- interkultura variaĵo - lokaj, regionaj, etnaj grupoj estas traktataj en nacia, ŝtata sistemo de klerigado kiel gravaj elementoj, kiuj rajtas ricevi edukadon bazitan sur iliaj specifaj kulturo kaj idento. Ili estas perceptataj kiel esencaj elementoj de regiona kulturo, kiu siaflanke plifortigas kaj enriĉigas nacian kulturon. Tiuspeca edukado ebligas realigadon de regionalismoj, revenon al fontoj de regiona kulturo, kultivadon de lokaj lingvoj, religioj kaj tradicioj, por protekti regionan heredaĵon. La variaĵo estas pli populara en demokratiaj landoj.<sup>2</sup>

Laŭ J.Nikitorowicz, en edukado grava do estas ebleco elekti sian identon. Al gelemantoj oni devas prezenti kaj plifirmigi sciojn pri diferencoj, kiuj dependas de regiono kaj medio, el kiuj ili venas kaj en kiu ili vivadas. Oni devas klare elmontri rolon de familio kiel faktoro, danke al kiu estas transmetataj tradicio, moralaj valoraĵoj, religiaj kredoj ktp. Danke al tiuspeca edukado,

---

<sup>1</sup> T.Łoś-Nowak: *Euroregion jako czynnik kreujący tożsamość europejską.Przestanki, możliwości zagrożenia* [en:] W.Malendowski, M.Szczepaniak (org.): *Euroregiony – mosty do Europy bez granic*, Warszawa 2000, p.42.

<sup>2</sup> K.Kossak-Głównzewski: *Edukacja regionalna, wielokulturowa...*, op.cit., p.61–62.

gelnantoj devus rimarki, priskribi problemojn de sia regiono kaj provi solvi ilin kun respekto al diferencoj de ĝiaj loĝantoj kaj de personoj, kiuj venas ekster la regiono.<sup>1</sup> Tiel aperas emo transdoni kulturen heredaĵon al posteuloj, firmiĝas ligoj inter generacioj kaj ĝermas loka patriotismo.<sup>2</sup> Evidente tiu ĉi sinteno tute ne malhelpas kaj ne malebligas intereson pri aliaj kulturoj kaj partoprenadon en ili (ĉefe en nacia kulturo). Ĝi nur malfermas pliajn eblecojn percepti la mondon kaj sin mem.<sup>3</sup>

En regiona edukado tre gravan rolon ludas familio kaj loka socio. Ili estas la fontoj de kulturaj procesoj kaj valoraĵoj, kiujn transprenas kaj transdonas lernejoj kaj aliaj institucioj de klerigado kaj edukado. Al temoj de regiona edukado apartenas interalie: pejzaĝo, arkitekturo, lingvoj kaj dialektoj, folkloro, lokaj moroj kaj kutimoj, legendoj, popola arto, historio de regiono, sorto de lokaj herooj, lokaj okazaĵoj, interhomaj rilatoj, intergeneraciaj kontaktoj, kunvivado kun loka naturo kaj protektado de ĝi ktp. Ili do estas temoj de ĉiutaga loka vivo, kiuj ĉefe en publika edukado realigata en oficiala eduksistemo iĝas pli valoraj kaj gravaj el vidpunkto de estimo al ili. La temoj de regiona edukado ofte estas elektataj mem de loĝantoj de loka medio. Danke al tio, edukado servas kiel ilo de eterna eduka dialogo, kiu plifirmigas identon de individuoj kaj helpas al ili en kontaktoj kun propra kulturo.

Personoj, kiuj partoprenadas en tiuspeca edukado, iom post iom rimarkas diferencojn inter propra kulturo kaj kulturoj de Diferenculoj/Fremduloj. Ili ekkonas diferencajn vidpunktojn kaj lernas metodojn de reciproka konatiĝo, kompreniĝo kaj kunlaboro. Regiona edukado komencas do interkulturen edukadon, estas ĝia unua etapo. Danke al gepatraj lingvo, religio, artaĵoj, amasaj festoj kaj aranĝoj okazantaj en regiona eta patrujo, homoj ricevas ilojn de aŭtonomia vivo laŭ propraj elektoj.<sup>4</sup>

<sup>1</sup> J.Nikitorowicz: *Edukacja międzykulturowa na pograniczach...*, op.cit., p.177.

<sup>2</sup> E.Ogrodzka-Mazur: *Regionalizm...*, op.cit., p.97.

<sup>3</sup> J.Nikitorowicz: *Koncepcja...*, op.cit., p.5.

<sup>4</sup> J.Nikitorowicz: *Wartości...*, op.cit., p.11–12.

#### 1.2.4. Civita edukado

Sencon de la nocio „civitano” priskribas loko, tempo, kondiĉoj historiaj, kulturaj kaj politikaj. Pro tio en diversaj cirkonstancoj ĝi havas diferencajn signifojn.<sup>1</sup> La bazo de koncepto de civitaneco estas ideoj de Jean Jacques Rousseau, laŭ kiu civitanoj deziras kune vivi laŭ klare difinitaj reguloj, kiuj en diversa grado respondas al interesoj de ĉiu persono kaj pro tio estas aprobatataj. En Lumepoko pri senco de civitaneco decidis devoj de homo rilate al tempo (protektado de tradicio kaj kulturo de pasinto, kaj transdonado de ili al posteuloj) kaj spaco (defendo de komuna teritorio).<sup>2</sup>

Zbyszko Melosik opinias, ke „(...) rezigno pri lumepoka koncepto de tempo kaj spaco estas ligita kun forigo de tradicia koncepto de civitaneco. La nocio „civitaneco” fragmentiĝis kaj interne konfliktiĝis. Homo ja vivas samtempe en diferencaj kaj kuntekste diversaj tempoj kaj spacoj, kiuj posedas diferencajn trajtojn (mapo kaj horloĝo perdis do sian absolutan signifon). Homo estas samtempe civitano de socioj loka, nacia, etna, ŝtata, kontinenta kaj globala. Fragmentigo de idento de nuntempa individuo, sendube gvidas al malplifortigo de idento ŝtata-nacia (ligita kun lumepoka interpreto de tempo kaj spaco). Tiu ĉi fakto tute certe grave influas sur konceptojn de civita edukado.”<sup>3</sup>

La nocio „civitano” dum longa tempo estis ligita kun ŝtata aŭ nacieca aparteno. Estante civitano oni devas adaptiĝi al strukturoj de ŝtato. Apartenante al nacio oni estas ligita kun sendependaj de ŝtato naskiĝo, kulturo kaj tradicioj.<sup>4</sup> Nuntempe kun civitaneco

<sup>1</sup> Z.Melosik: *Wychowanie obywatelskie, nowoczesność, ponowoczesność (próba konfrontacji)* [en:] idem, K.Przyszczykowski (org.): *Wychowanie obywatelskie. Studium teoretyczne, porównawcze i empiryczne*, Toruń–Poznań 1998, p.35.

<sup>2</sup> Z.Melosik: *Obywatelstwo, czas (historia) i przestrzeń (geografia)* [en:] idem, K.Przyszczykowski (org.): *Wychowanie...*, op.cit., p.60.

<sup>3</sup> Z.Melosik: *Obywatelstwo...*, op.cit., p.60.

<sup>4</sup> M.J.Adameczyk, A.Ładyżyński: *Edukacja w krajach rozwiniętych*, Stalowa Wola 1999, p.156.

estas ligitaj difinitaj civitaj rajtoj (ekz. rajto elmigri kaj rezigni pri ŝtata aparteno) kaj devoj.<sup>1</sup> Statuso de civitano, en plimulto de ŝtatoj estas nun limigita de demokratiaj leĝoj, kiujn individuo povas utiligi por ŝanĝi sian materian leĝan pozicion. Demokratia civitaneco ne plu devas esti ligita kun nacieca idento, tamen necesas sociigi ĝin laŭ komuna politika kulturo.<sup>2</sup>

Civitaneco estas aktiva kaj memvola „(...) sinteno ligita kun partprenado de individuo (individuoj) en komuna idento de socio (civita socio).”<sup>3</sup> Karakterizas ĝin konscia permeso partopreni en komuna personeco de socio kaj deklaro agadi por komuna bono de la socio. En civitaneco ekzistas interna konflikto inter influo de interesoj de primaraj grupoj (familiaj, etnaj ktp.) kaj devo respekti aliajn personojn, sendepende de ilia origino. Kun ĝi estas ligita konscia aparteno al diversaj organizaĵoj kaj asocioj (ekz. kulturaj, ekonomiaj kaj aliaj), religiaj komunumoj kaj politikaj partioj, kiuj estas instituciaj signoj de etna kaj socia aktivado<sup>4</sup> Kazimierz Przyszczykowski rimarkas, ke „Nuntempe individuo ne nur povas «elekti» sian civitanekon, sed eĉ devas tion fari. (...) Necesas posedi sciojn (aŭ povojn) ligitajn kun «esti» civitano, en perspektivo de larĝa socia funkciado de la individuo.”<sup>5</sup>

En nuntempa mondo, laŭ Z.Melosik oni povas percepti civitanekon en du perspektivoj - modernisma kaj postmodernisma.

En modernisma perspektivo civitanekon eblas priskribi rilate al stabilaj elementoj, kiel naskiĝloko, aŭ loĝloko (civitaneco pro elekto, kiun eblas ŝanĝi plurfoje). Oni povas paroli pri ĝi en kunteksto de historio kaj socia pasinto de ĉiu individuo, aŭ nur rilate al nuntempaj vivkondiĉoj. Tiel, depende de vidpunkto, civitaneco povas esti io, kio limigas kaj fermigas

homon en difinitaj limoj - aŭ kontraŭe: liberigas kaj malfermigas identon de homo al universalaj valoraĵoj.

En postmodernisma perspektivo aperas novaj kunteksto de civitaneco. Homo ne plu estas perceptata kiel stabila kaj ferma tutaĵo. Oni perceptas individuon kiel estaĵon troviĝantan en senĉesa konstruado, malkonstruado kaj rekonstruado. Pro tio, la nocioj „nacio” kaj „ŝtato” ne plu havas iaman sencon, kaj civita idento estas ligita kun globala idento. En tiuspeca civitaneco, la preferataj trajtoj estas: pragmatismo, optimismo, komunikemo kaj eblo funkcii en ĉiuj kulturaj kondiĉoj. Nuntempe do, ĉiu individuo iĝas civitano de pluraj dinamike interagantaj socioj.<sup>1</sup>

En civita edukado oni penas disvolvi civitanajn virtojn, kiel sento kaj sinteno de reciproka respondeco pri kreado de kondiĉoj, kiuj helpas al evoluo, progreso kaj amikeco. Danke al civitanaj virtoj, en socio aperas scio de socia kunvivado, porsociaj inklinoj kaj kapablo pozitive interpretadi interhomajn situaciojn. Danke al ili eblas ankaŭ kreadi civitanajn komunumojn, en kiuj gravaj estas aŭtonomio kaj sento de komuneco. En tiaj kondiĉoj, bono ne plu estas privata afero, sed objekto de publika diskuto.<sup>2</sup>

Genezo de civita edukado venas de klasika epoko. En greka modelo de edukado oni penis prepari civitanojn al saĝa kaj aktiva partopreno en socia vivo, en kiu unu el la plej gravaj aferoj estis serĉado de propra libereco. En Lumepoko civitan edukadon influis ideo de ŝtato. Ekde tiu ĉi tempo civita edukado estas ligita kun nacia aŭ ŝtata edukado, kvankam ofte ne eblas ligi apartenon de iu persono al nacio kaj ĝia ŝtato, ĉar ne ĉiuj nacioj posedas proprajn ŝtatojn. En Eŭropo, civita edukado iĝis pli grava en dua duono de la XVIII-a jarcento, kiam aperis laikaj, oficialaj

<sup>1</sup> K.Przyszczykowski: *Edukacja dla demokracji*, Toruń–Poznań 1999, p.123.

<sup>2</sup> J.Habermas: *Obywatelstwo a tożsamość narodowa. Rozważania nad przeszłością Europy*, Warszawa 1993, pp.10–17.

<sup>3</sup> K.Przyszczykowski: *Postawy obywatelskie Polaków. Studium empiryczne* [en:] Z.Melosik, K.Przyszczykowski (org.): *Wychowanie...*, op.cit., p.125.

<sup>4</sup> K.Przyszczykowski: *Postawy...*, op.cit., p.125.

<sup>5</sup> *Idem: Edukacja...*, op.cit., p.125.

<sup>1</sup> Z.Melosik: *Wychowanie...*, op.cit., pp.40–44.

<sup>2</sup> E.Potulicka: *Ramy teoretyczne liberalno-demokratycznej koncepcji edukacji obywatelskiej* [en:] E.Malewska, B.Śliwerski (org.): *Pedagogika i edukacja wobec nowych wspólnot i różnic w jednoczącej się Europie*, Kraków 2002, pp.315–316.



klerigsistemoj organizataj de ŝtatoj.<sup>1</sup> En la XX-a jarcento, civita edukado iĝis ankoraŭ multe pli populara, ĉar kreskis graveco de demokratia ideologio; danke al popularigo de amasa balotado civitanoj akiris eblecon partopreni en publika vivo; en multaj landoj plifirmiĝis sento de nacia aŭ ŝtata aparteno.<sup>2</sup>

Nuntempajn ideojn, idealojn kaj celojn de civita edukado, eblas listigi en jenaj areoj de problemoj:

- kono de cirkonstancoj kaj reguloj agadi por komuna celo kaj bono;
- idealoj kaj kutimoj de morala agado ligita kun intereso de individuoj kaj grupoj;
- scio agadi por bono de sociaj institucioj (ekz. lernejo) kaj ekster ili;
- konscio pri kunrespondeco pri si mem kaj pri grupo al kiu oni apartenas;
- konscio kaj kompreno, ke grandaj grupoj (ekz. popolo, nacio) postulas lojalecon, sciojn kaj pretecon publike servi al ili;
- konscio pri avantaĝoj de aparteno al socio;
- preteco multobligi bonon de popolo pere de forigado de malbono kaj eraroj;
- aktivado por komuna progreso.<sup>3</sup>

Ĝenerala celo de tradicie komprenata civita edukado estas do preparo de civitanoj (ĉefe junaj) al ligita kun ŝtataj intereso partopreno en vivoj de socioj loka, nacia kaj supernacia. Pro tio, agado de oficialaj institucioj de edukado estas ligitaj kun intereso kaj prioritatoj de registaro. Lernejoj programoj enhavas temojn ligitajn kun civitaj aferoj en perspektivo de regiono, lando kaj mondo, kaj montras reciproke interdependadon de homoj en

diversaj kondiĉoj. Danke al tio, partoprenantoj de procezo de edukado iom post iom akiras konscion esti civitano de mikroregiono (eta patrujo), makroregiono (lando kun ĝiaj eksterkaj interŝtataj ligoj), kontinento kaj mondo.

Kiam la perspektivoj loka kaj nacie-ŝtata perdas sian gravecon kaj pli grava iĝas universala homara perspektivo, tiam en edukado oni kreas identon de homo kiel konscia partoprenanto de globala sistemo, kiu ne plu estas pasiva observanto, sed aktiva civitano de la mondo, respondeca utiliganto de natura medio, kiu identiĝas kun la homaro. Tiel eblas transpaŝi limojn de loka kaj nacia socioj, samtempe respektante aŭtonomion de individuoj, grupoj kaj kulturoj, kio estas ligita kun akirado de scio kaj respekto al la kulturoj. Danke al tiu ĉi edukado aperas individua civita kulturo, kiu implikas individuojn kaj grupojn en civitajn sociojn.<sup>1</sup>

\* \* \*

Laŭ Zygmunt Komorowski: „*Same kiel plenkreskuloj kreantaj novajn familiojn ne ĉesas esti membroj de «familioj de origino», kaj iliaj novaj roloj ne ekskludas la antaŭajn - tiel apartenon kaj partoprenon en vivo de iu pli granda socikultura tutaĵo eblas ligi kun vivo en aliaj socioj kaj kulturoj.*”<sup>2</sup> En tiu ĉi procezo riĉiĝas homa idento, kiu danke al transpaŝado de limoj inter kulturaj kaj etnaj medioj, dinamike akiradas novajn trajtojn. Pro tio oni povas nomi ĝin interkultura idento.

Interkultura idento estas komplika, ŝanĝema kaj pluraspekta konstruaĵo, en kiu renkontiĝas elementoj de persona, individua sistemo de valoraĵoj kun centraj valorajoj de grupo, al

<sup>1</sup> M.J.Adameczyk, A.Ładyżyński: *Edukacja...*, op.cit., p.154–156; H.A.Giroux: *Teoria krytyczna i racjonalność w edukacji obywatelskiej* [en:] Z.Kwieciński, L.Witkowski (org.): *Spory o edukację. Dylematy i kontrowersje we współczesnych pedagogiach*, Warszawa 1993, pp.103–139.

<sup>2</sup> M.Cylkowska-Nowak: *Edukacja obywatelska w szkołach Wielkiej Brytanii, Francji i Polski* [en:] Z.Melosik, K.Przyszczykowski (org.): *Wychowanie...*, op.cit., p.161.

<sup>3</sup> K.Przyszczykowski: *Edukacja...*, op.cit., p.123.

<sup>1</sup> D.Kubiak-Pokrzywniak: *Model obywatela w wybranych koncepcjach zachodniej myśli pedagogicznej* [en:] Z.Melosik, K.Przyszczykowski (org.): *Wychowanie...*, op.cit., pp.242–243; S.J.Rittel: *Strategie edukacji obywatelskiej.Założenia projektowania* [en:] E.Malewska, B.Śliwerski (org.): *Pedagogika...*, op.cit., pp.329–330.

<sup>2</sup> Z.Komorowski: *Rozważania o wielokulturowości*, “Kultura i Społeczeństwo”, No 2/1974, p.98.

kiu la individuo apartenas. Ĉar fontoj de idento estas ĉiuj gravaj socikulturaj kunteksto, tial interkultura idento estas fenomeno dinamika, senĉese disvolviĝanta en tempo kaj medioj, malfermita je senfinaj kreaĵoj.<sup>1</sup> La sola senŝanĝa elemento de interkultura idento estas aparta homo mem - la esenca valorado de vivo.

Kompreneble en nuntempa edukado tute ne temas pri kreado de „nova homo” (kiel en modernismaj ideologioj), ĉar ĉiu vizio de homo pli bona ol siaj antaŭuloj, pli saĝa kaj pli klera, pli konscia kaj pli bone preparita al vivo en socio ktp., estas pli malpli utopia. Ĉiun epokon karakterizas ja specifaj ecoj kaj idealoj, do projektado de edukado ĉiam estas nepre ligita kun tempo kaj loko, kun variaj cirkonstancoj de ili. Pro tio, la priskribitaj ĉi supre procezoj kaj fenomenoj estas objekto de interesiĝo de pedagogoj-humanistoj, kiuj perceptas edukadon ne kiel devon, aŭ taskon por realigi, sed kiel fakton, kiu objektive okazas kaj en kiu la plej gravaj estas realaj bezonoj kaj ebloj de homo. En humanisma eduka agado estas spaco por agnosko de homa libereco kaj indivueco en iuj ajn sociaj cirkonstancoj. - La sola problemo estas, ĉu tiu ĉi ideo estas reala kaj kion fari, por ke ĝi ne iĝu nur plia utopia idealo. Pro tio multaj sciencistoj, esplorante kaj analizante realon de edukado, penas trovi kiel eble plej taŭgajn solvojn de problemoj kaj tiel respondi je sociaj atendoj.

## 2. Interkultura pedagogio – de eduka praktiko ĝis scienca subdisciplino

En faka, scienca literaturo, didaktikaj materialoj kaj en oficiala, formala eduka agado oni perceptas interkulturan pedagogion kiel:

- praktikon – reale realigatan agadon kun ĝia kunteksto de loko kaj tempo;

- sciencan subdisciplinon – dinamike disvolviĝantan, detalan pedagogion, kiu posedas propran objekton de intereso, sistemon de nocioj kaj metodologion.

Etapoj de disvolviĝo de interkultura pedagogio kiel subdisciplino estas litigitaj kun ŝanĝoj en eduka praktiko kaj kun evoluo de interdisciplina kunlaboro en sociaj sciencoj. Karakteriza en tiu ĉi procezo estas ŝanĝo de aliro al objekto de esploroj, de makrokultura perspektivo al mikrokultura perspektivo - kaj en metodologio: de modelo unudisciplina al modelo plurdisciplina.

Ne enkalkulante unuopajn publikaĵojn pri lokaj problemoj de klerigado de eksterlandanoj, oni povas diri, ke komenco de scienca pripensado pri edukado kaj klerigado en perspektivo de kultura diverseco estas ligita kun laboroj de usona *Bureau for Intercultural Education* (Buroo por Interkultura Edukado). Ĝi estis kreita en 1939 post kunigo de du institucioj funkciaj de kvin jaroj en Universitato Columbia: *Service Bureau for Education in Human Relations* (Serva Buroo por Edukado je Interhomaj Rilatoj) kaj *Service Bureau for Intercultural Education* (Serva Buroo por Interkultura Edukado). La iniciato aperis danke al membroj de *Progressive Education Association* (Asocio de Progresiga Edukado) - interalie danke al Rachel Davis DuBois (ĉefa iniciatintino kaj pionirino de interkultura edukado en Usono) kaj al medio de juda minoritato, kiu finance subtenis la institucion kaj realigadon de ĝiaj projektoj.

Celo de agado de la institucio estis helpi al geinstruistoj kaj gelaboristoj de administrejoj de 50 lernejoj en Novjorko, kreadi kaj realigadi programojn de interkultura edukado, klerigadi instruistojn kaj science esploradi interhomajn rilatojn en urbocentroj - precipe rilate al tensioj kaj konfliktoj pro kultura diverseco. En 1943 William E. Vickery kaj Stewart G. Cole publikigis libron *“Intercultural Education in American Schools”* (Interkultura edukado en usonaj lernejoj) - la unuan volumon en

<sup>1</sup> J. Nikitorowicz: *Wartości...*, op.cit., p.9.

serio de publikaĵoj de la Buroo pri interkultura edukado.<sup>1</sup> Oni opinias, ke ĝuste tiu ĉi verko komencigis usonan kaj anglalingvan debaton pri problemoj de kultura diverseco en klerigado. Pro diversaj kialoj, la Buroo iom post iom limigadis sian aktivadon kaj fermiĝis en 1954.

Post fino de la dua mondmilito, tiu ĉi temo foje aperadis dum studoj pri personeco (ofte kiel nur flanka temo) en Universitato Columbia. Poste ĝi reaperis danke al George P. Murdock kaj John Whiting, kiuj en Universitato Yale direktis antropologiajn hologeismajn esplorojn (ang. *hologeistic studies*) pri renkontoj kaj kontaktoj inter kulturoj (civilizoj).<sup>2</sup> Ili estis ekstensaj, etnologiaj komparaj studoj je grandega skalo, dum kiuj oni esploradis dekojn kaj centojn da homamasoj (socioj). Sekvis ilin intensaj, enprofundigitaj studoj de unu aŭ kelkaj kulturoj, kiujn oni analizadis en perspektivo de iu specifa trajto. Simila aliro aperis tiam ankaŭ en laboroj de transkulturaj psikiatroj kaj psikanalizistoj.<sup>3</sup>

Esploroj de kultura diverseco en edukado aperis en usonaj sociaj sciencoj meze de 60-aj jaroj de XX-a jarcento, kiam iĝis pli firma kunlaboro de pedagogoj kaj antropologoj. En 1975 en San Francisco estis organizita simpozio pri rilatoj inter multkultureco kaj edukado, danke al kio aperis la menciitaj supre programoj de multkultura edukado.<sup>4</sup>

En Eŭropo, laŭ M. Abdallah-Pretceille la unuaj signoj de interkultura aliro al problemoj de kultura diverseco, aperis meze de 60-aj jaroj de XX-a jarcento en Svislando, en medio de

---

<sup>1</sup> W.E. Vickery, S.G. Cole: *Intercultural Education in American Schools; Proposed Objectives and Methods*, New York 1943. – Ĝi estis la unua numero en la serio “Bureau for Intercultural Education Publications. Problems of Race and Culture in American Education”.

<sup>2</sup> Projektoj de esploroj “Human Relations Area Files” (HRAF) kaj “Yale's Cross-Cultural Studies” (YCCS).

<sup>3</sup> M. Mauviel: *Qu'appelle-t-on études interculturelles en sciences humaines et en sciences de l'éducation? Esquisse d'un état de la question* [en:] C. Clanet (org.): *L'interculturel en éducation et en sciences humaines*, Toulouse 1985, vol.1, p.5.

<sup>4</sup> M. Mauviel: *Qu'appelle-t-on..., op.cit.*, p.3.

psikologoj. Tiam Jean Piaget publikigis artikolon pri bezono kaj graveco de komparaj esploroj en genetika psikologio.<sup>1</sup> Oni opinias, ke tiu ĉi teksto signas naskiĝon de interkultura psikologio. Radikoj de interkultura pedagogio en eŭropa medio kuŝas do en aperantaj meze de 60-aj kaj 70-aj jaroj verkaĵoj el psikiatrio kaj interkultura psikologio, en studoj de antropologio (eduka, hologeisma, kognitiva, psikologia, simbolisma), etnometodologio, teorio de komunikado (ĉefe interkultura komunikado) kaj lingvistiko (interferaĵoj kaj lingvaj kontaktoj).

Ankaŭ tiam aperis rompoj inter medio de anglalingvaj fakuloj ĉerpantaj el usonaj spertoj, kaj inter sciencistoj el medio de franclingvanoj. La disigo de vojoj de esplorado okazis ne nur pro terminologiaj kialoj, sed ankaŭ pro diferenca aliro al problemoj de interdependoj inter lernejo kun ĝia medio kaj kleriga politiko de ŝtato. En Usono oni opiniis, ke lernejo danke al specifaj programoj kaj politiko de registaro, povas memstare solvi problemojn de gelernantoj venantaj el kulturaj minoritatoj. En eŭropa aliro (en kiu pli kaj pli forte gravis opinioj de franclingvaj sciencistoj), oni klare substrekadis interdependojn inter kulturo, socia situacio, loko de familioj en lerneja medio kaj inter lerneja sukceso de gelernantoj (ĉefe venantaj de grupoj soci-ekonomie malfavorataj kaj subigitaj de dominanta kulturo).<sup>2</sup>

En la 70-aj kaj 80-aj jaroj de XX-a jarcento, sciencaj esploroj en firmiĝanta modelo de nova pedagogia subdisciplino, estis ligitaj kun jenaj temoj:

- kultura diverseco kaj rilatoj inter kulturoj;<sup>3</sup>

---

<sup>1</sup> J. Piaget: *Nécessité et signification des recherches comparatives en psychologie génétique*, “International Journal of Psychology”, No 1/1966, pp.3–13.

<sup>2</sup> Detale pri historio de interdisciplina scienca diskurso, kiu kreis bazojn de la nuntempa interkultura pedagogio - M. Mauviel: *Qu'appelle-t-on..., op.cit.*, pp.4–20.

<sup>3</sup> Pli vaste: F.X. Cuche: *La revendication interculturelle. Colloque CLAP: Vers une société interculturelle*, Paris 1983; J.R. Ladmiral, E.M. Lipiansky: *La communication interculturelle*, Paris 1989; M. Mauviel: *La communication interculturelle – constitution d'une nouvelle discipline. Colloque UNESCO*, “Phénomènes d'acculturation et de déculturation dans le monde

- idento, lingvo, tensioj kaj konfliktoj pro diferencoj - rigardataj ĉefe en dukultura perspektivo;<sup>1</sup>
- socia laboro en kulture diversigitaj medioj (cirkonstancoj, metodiko, klerigado de laboristoj ktp.);<sup>2</sup>
- enmigrintoj, infanoj kaj gejunuloj venantaj el familioj de enmigrintoj;<sup>3</sup>
- klerigado de eksterlandaj laboristoj kaj de iliaj infanoj;<sup>4</sup>
- klerigado de geinstruistoj kaj geedukistoj por edukado en kondiĉoj de kultura diverseco;<sup>1</sup>

---

contemporain”, No 2/1980; *idem*: *Vers une solution éducative à l’ethnocentrisme, la communication interculturelle*, “Recherche, Pédagogie, Culture”, No 1/1980; R.Preiswerk: *Le savoir et le faire. Relations interculturelles et développement*, Paris 1975; V.Segalen: *Essai sur l’exotisme. Une esthétique du divers*, Paris 1978; M.Sherif: *Des tensions intergroupes aux conflits internationaux*, Paris 1971.

<sup>1</sup> Pli vaste: S.Abou: *L’identité culturelle. Relations interethniques et problèmes d’acculturation*, Paris 1981; G.Michaud (org.): *Identités collectives et relations interculturelles*, Bruxelles 1978.

<sup>2</sup> Pli vaste: M.Cohen-Emerique: *Choc culturel et relations interculturelles dans la pratique des travailleurs sociaux. Formation par la méthode des incidents critiques*, “Cahiers de sociologie économique et culturelle”, No 2/1984, pp.183–211; H.Malewska, C.Cachon: *Le travail social et les enfants de migrants. Racisme et identité, recherche-action*, Paris 1988; E.Regnauld: *Projet de formation interculturelle des travailleurs sociaux*, “Cahiers du CERESI”, No 2–3/1989, pp.99–109.

<sup>3</sup> Pli vaste: R.Benattig: *Insertion des immigrés et cohabitation interculturelle. Recueil et évaluation d’expériences*, Paris 1986; M.Llaumett: *Les Jeunes d’origine étrangère. De la marginalisation à la participation*, Paris 1984; H.Malewska (org.): *Crise d’identité et déviance chez les jeunes immigrés*, Paris 1982; M.Oriol: *Les cultures en mouvement. Dialectiques interculturelles et dialectiques intraculturelles. Propos épistémologiques à l’écoute des immigrés*, Nice 1978; A.Sayad: *Les Usages sociaux de la culture des immigrés*, Paris 1978.

<sup>4</sup> Pli vaste: M.Abdallah-Pretceille: *Des enfants non-francophones à l’école: quel apprentissage? Quel français?*, Paris 1982; H.Bastide: *Les Enfants d’immigrés et l’enseignement français*, Paris 1982; H.Malewska-Peyre: *Les enfants de migrants et l’école*, Grenoble 1984; A.de Peretti: *Pour une école plurielle*, Lausanne–Paris 1987; L.Porcher: *Éducation des enfants de migrants: une pédagogie interculturelle sur le terrain*, Strasbourg 1979.

- sinteno de sociaj sciencoj (ĉefe de sciencoj pri edukado) al kultura diverseco en klerigsitemo.<sup>2</sup>

Dum en kleriga politiko regadis multkultura kaj interkultura modeloj (depende de medio), en pedagogio komence oni parolis ĉefe pri enkonduko de infanoj de enmigrintoj en edukistemojn kaj pri garantio de ilia lerneja sukceso (ekz. ĝi estis unu el diskuttemoj de laborgrupoj en Konsilantaro de Eŭropo). De pedagogoj oni atendis priskribon de kondiĉoj kaj cirkonstancoj de eduka agado adresata al infanoj de enmigrintoj, substrekante ke ili havas rajton kaj devas havi eblecon konservi propran identon kaj valoraĵojn de propraj kulturoj. Post mallonga tempo oni riĉigis la esplorojn per temoj ligitaj kun tensio inter postuloj de lernejoj (aŭ pli larĝe: de institucioj de kleriga sistemo), kaj postuloj de familioj kaj bezonoj de gelernantoj mem.<sup>3</sup>

Nuntempe interkultura pedagogio estas scienca subdisciplino, kiu okupiĝas pri problemoj de edukado de individuoj kaj grupoj kulture diversigitaj. Ĝi analizas strukturojn de procezoj de edukado en perspektivo de socia sistemo. Bazoj de interkultura pedagogio havas interdisciplinan karakteron kaj estas ligitaj nature ne nur kun specifaj sciencoj pri edukado, sed ankaŭ kun antropologio, sociologio, psikologio, lingvistiko, historio kaj aliaj sciencaj disciplinoj. Karakterizas ilin konscio pri pluraj

---

<sup>1</sup> Pli vaste: J.-C.Durand, B.Tunidis-Durand: *Quelle formation pour les enseignants?*, “Cahiers de CERESI”, No 2–3/1989, pp.133–142; L.Porcher: *Éducation des travailleurs migrants en Europe. L’interculturalisme et la formation des enseignants*, Strasbourg 1981; M.Rey: *Former les enseignants à l’éducation interculturelle?*, Strasbourg 1983.

<sup>2</sup> Pli vaste: M.Abdallah-Pretceille: *La pédagogie interculturelle*, Paris 1986; C.Clanet (org.): *L’interculturel en éducation et sciences humaines*, Toulouse 1985, vol.1–2; X.Couillaud: *De la “culture...”, op.cit.*; J.Demorgon: *L’exploration...”, op.cit.*; R.Dinello, A.-N.Perret-Clermont: *Psycho-pédagogie interculturelle*, Fribourg 1987; Ch.Fitouri: *Biculturalisme, bilinguisme et éducation*, Neufchâtel 1983; H.Hannoun: *Les ghettos...”, op.cit.*; M.Rey (org.): *Une pédagogie interculturelle*, Berne 1984; *idem*: *D’une logique mono à une logique de l’inter. Pistes pour une éducation interculturelle et solidaire*, Genève 1996; *idem*: *Recueils d’informations sur les opérations d’éducation interculturelle en Europe*, Strasbourg 1983.

<sup>3</sup> Pli vaste: L.Porcher: *Éducation des enfants...”, op.cit.*



perspektivoj de analizo kaj pri pluraj kontekstoj de analizataj objektoj.<sup>1</sup>

En metodologio de interkultura pedagogio ekzistas aliroj multkultura, aŭ interkultura, ligitaj kun specifaj medioj de sciencistoj. Ĝuste pro tio estas malfacile difini iun komunan epistemologian esencon de interkultura pedagogio. Tamen ĝenerale oni povas diri, ke ĝiajn bazojn difinas rilatoj de Mi (individua, aŭ grupa) kun aliaj - ĉefe kun Diferenculoj/Fremduloj. Kulturo kaj etno de Diferenculoj/Fremduloj estas por Mi gravaj subjektoj de observado, analizado, konfrontado kaj de sociaj sekvoj de ili (komunikado, dialogo, interagado, tensioj, konfliktoj ktp.). Oni povas priskribi tiujn ĉi procezojn en diversaj perspektivoj (individua, grupa) kaj en diversaj kuntekstoj (politike-ideologia, historia, kompara ktp.). La analizoj povas rilati kaj al subjektoj kaj al objektoj de edukaj fenomenoj en diversaj cirkonstancoj. Ne ekzistas do unu firme difinita subjekto de interkultura pedagogio. En diversaj kuntekstoj eblas nur rimarki areojn de problemoj.<sup>2</sup>

Karakteriza trajto, kiu diferencigas interkulturan pedagogion de naciaj pedagogioj estas, ke naciaj pedagogioj ĉiam direktas kontraŭ iu, aŭ iun protektas. En interkultura pedagogio jam pro dialektikaj kialoj ne eblas kontraŭstaro, aŭ atako. La plej oftaj areoj de problemoj en interkultura pedagogio estas:

- idento (kultura, etna, interkultura) - kreado de ĝi, ligita kun ĝi karakteriza personeco, sintenoj, stereotipoj, antaŭjuĝoj, tensioj, konfliktoj (precipe inter minoritatoj kaj aliaj grupoj), instruado/lernado percepti, kompreni kaj akcepti diferencojn;
- ekzisto de klare apartigitaj kulturaj grupoj kaj konsekvencoj de tiu ĉi fakto;
- kultura apudlimo en kunteksto de multkultureco kaj interkultureco (ĝia karaktero, grandeco, problemoj, perspektivoj ktp.), intranacieco kaj internacieco; okazantaj en apudlimoj procezoj de reciproka interagado de kulturoj (ekz.

<sup>1</sup> M.Abdallah-Preteille: *Vers une...*, op.cit., p.127 kaj sekvaj.

<sup>2</sup> *Ibid.*, p.140 kaj sekvaj.

prunteprenado de valoraĵoj, asimiligo, integriĝo, marĝenigo, ekskludo, diskriminacio, transdonado de kultura heredaĵo) kaj konsekvencoj de tiuj ĉi procezoj al individuoj kaj grupoj; faktoroj, kiuj mildigas aŭ forigas malfacilaĵojn en interkultura komprenado, kaj kiuj faciligas ĝin; dialogo - ĝiaj kondiĉoj kaj procezo;

- sekvoj de migrado de homoj de unu kultura medio al alia (ekz. serĉantoj de laboro, turistoj, sportistoj, membroj de familioj havantaj parencojn en diversaj landoj);
- socia, kleriga, eduka ktp. politiko de diversaj institucioj, adresata al kulturaj minoritatoj; stato kaj perspektivoj de enmigrintoj, de iliaj infanoj kaj de akceptantaj ilin socioj en rilatoj kun ili; situacio de individuoj kaj grupoj diskriminataj pro kulturaj diferencoj; rajtoj de minoritatoj (kulturaj, sociaj ktp.);
- rilatoj inter kulturoj tradiciaj kaj aliaj kulturoj (ekz. postmodernisma, virtuala, nacia);
- situacio de sistemo de klerigado kaj de ĝiaj elementoj en kultura diverseco; signoj de stereotipoj kaj antaŭjuĝoj en lernolibroj, amaskomunikiloj, literaturo ktp.; politika korekteco; kaŝitaj programoj de edukado kaj aliro al kultura diverseco en oficialaj lernejoj; interna kultura diverseco en lernejoj; akceptado/malakceptado de kultura idento de gelernantoj kaj geinstruistoj; preparado de geinstruistoj kaj geedukistoj al laboro en kulture diversigitaj medioj; edukaj agadoj (temoj, metodiko) kaj iliaj sekvoj en formala kaj malformala edukado multkultura kaj interkultura.<sup>1</sup>

De unu flanko, pripensoj en interkultura pedagogio okazas en tre alta nivelo de ĝeneraleco. De dua flanko, karakterizas ĝin ekstrema dinamismo kaj interna, tre detala diserigo kaj neceso de ĉiufaj precizigo de kultura kunteksto de analizataj aferoj. Necesas tiam nepre konsideri edukajn tradiciojn kaj psikesociajn

<sup>1</sup> Pli vaste: P.Denoux: *La recherche interculturelle en France* [en:] M.Abdallah-Preteille, A.Thomas (org.): *Relations et apprentissages interculturels*, Paris 1995, pp.161-173.

kondiĉojn de partoprenantoj de analizataj procezoj, politike-ekonomiajn cirkonstancojn de iliaj medioj - ĉefe, kiam la esploroj koncernas konfliktojn. Detaleco de la pripenso kreskas laŭ limigo de analizata areo, ĉar tio permesas rimarki specifajn individuajn trajtojn de elektita familio, aŭ persono.<sup>1</sup>

Pierre Dasen kaj Jean Retschitzki rimarkas en esploroj de kultura diverseco du komplatiĝantajn sin reciproke alirojn:

- studoj de situacioj karakterizaj en difinita areo (kun ebla komparado de funkciaj tie kulturoj kaj etnoj);
- studoj de interagado de individuoj kaj grupoj en diversaj situacioj, ligitaj kun ili fenomenoj kaj sekvoj.<sup>2</sup>

Priskribante esplorojn dum internacia kunlaboro de sciencistoj, oni foje utiligas anglalingvajn nociojn „*cultural studies*”, aŭ „*cross-cultural studies*” (komparaj esploroj, aŭ esploroj en multkultura aliro) kaj „*intercultural studies*” (esploroj en interkultura aliro).<sup>3</sup> Tamen pro terminologiaj diskutoj inter diversaj medioj, tiuj ĉi nocioj estas relativaj kaj ofte erarigaj.

Manko de terminologia unueco, plureco de kunteksto, ne ĉiam efika kunlaboro de sciencistoj kaj instruistaj medioj ktp., permesas prognozi, ke interkultura pedagogio pli malpli dinamike evoluados en diversaj direktoj, malgraŭ interna krizo karakterizanta ĝin jam de origino. Perspektivojn de tiu ĉi evoluo pritaksis Gaston Mialaret:

*„En tiu ĉi sfero necesas rimarki inflacion de nocioj; necesas forigi de mitoj popularajn banalaĵojn, kiujn oni akceptadas kiel absolutajn veraĵojn, kvankam ili ne havas sence en kunteksto de*

*nuntempa diverseco de situacio, pro historiaj kaj geografiaj faktoroj. Necesas prezenti multe pli detalajn analizojn de konceptoj de kulturo, multkultureco, interkultureco... kaj nur tiam provi prepari modelojn de praktikaj solvoj de problemoj. Atendas ilin geinstruistoj, gepatroj kaj personoj, kiuj administras sistemon de klerigado.”*<sup>1</sup>

### 3. Universala lingvo kiel ilo de interkultura edukado

#### 3.1. Lingva bazo de dialogo

Brian Groombridge opinias, ke komunikado estas kreado, ricevado, dividado kaj interŝanĝado de informoj, sentoj kaj signifoj.<sup>2</sup> Tiu ĉi procezo postulas de komunikanto konscion kaj intencan transmetado de informoj, kaj de ricevanto de la informoj postulas kapablon percepti sence de komunikaĵo. Se komunikado okazas sen problemoj, ĝi iĝas rimedo de disvolvado de individuoj kaj grupoj, kaj de iliaj socia kaj kultura integriĝo. Unu el specoj de komunikado estas ĝuste la komunikado integrita, danke al kiu okazas alproksimigo de fremdaj kulturoj kaj etnoj. Ĝi permesas eviti altan nivelon de streĉoj kaj timoj. Ĝi helpas al kreado de siaspeca „plia kulturo”, tio estas de la stato, en kiu ĉiu el la partoprenantoj de komunikado konservas propran identon kaj samtempe reciproke interŝanĝas informojn pliriĉiĝante, sen perdi ion ajn, malgraŭ ekzistantaj diferencoj.<sup>3</sup> Por ke tia situacio ekzistu, estas necesa lingvo, kies karaktero en kiel eble plej alta nivelo permesus evitadi miskomprenojn kaj

<sup>1</sup> F.Ouellet: *L'éducation interculturelle. Essai sur le contenu de la formation des maîtres*, Paris 1991, pp.81–114.

<sup>2</sup> P.Dasen, J.Retschitzki: *Recherches interculturelles* [en:] ARIC: *Socialisations et cultures. Actes du premier colloque de l'ARIC "Socialisations"*, Toulouse 1989, pp.9–10.

<sup>3</sup> R.Miguel: *La comparaison interculturelle. Logique et méthodologie d'un usage empiriste de la comparaison*, Montreal 1977; B.Troade: *Approches culturelle et interculturelle comparative: vers une intégration de paradigmes complémentaires*, Actes du VIIIème Congrès de l'Association pour la Recherche Interculturelle (ARIC) Université de Genève – 24–28 septembre 2001; [www.unige.ch/fapse/SSE/groups/aric](http://www.unige.ch/fapse/SSE/groups/aric) (10.02.2007).

<sup>1</sup> G.Mialaret: *La multiculturalité...*, op.cit., p.249.

<sup>2</sup> B.Groombridge: *Komunikowanie*. [en:] P.Lengrand (org.): *Obszary permanentnej samoedukacji*. Warszawa 1995, p.53.

<sup>3</sup> J.Nikitorowicz: *Od podmiotowości do międzykulturowości i z powrotem. Próba interpretacji niektórych perspektyw teoretycznych*. [en:] T.Lewowicki, E.Ogrodzka-Mazur (org.): *W poszukiwaniu teorii przydatnych w badaniach międzykulturowych*. Cieszyn 2001, pp.22-23; A.Tyszka: *Rozmowa kultur*, [en:] A.Kapciak, L.Korporowicz, A.Tyszka (org.): *Komunikacja międzykulturowa. Zbliżenia i impresje*. Warszawa 1995, p.21.

reciproke alproksimigadus la patroprenantojn de la procezo, ebligante ilian konatiĝon kaj faciligante ĝin. Tiucele necesas klareco, simpleco kaj samtempe riĉeco de la lingvo, ebliganta transmeti komplikajn ideojn.<sup>1</sup>

Laŭ Peter L.Berger kaj Thomas Luckmann: „*Ĉiutaga vivo estas precipe la vivo kun lingvo kaj per lingvo, kiun oni uzadas kun aliaj homoj. Tial do komprenado de la lingvo estas ege grava, ĉar sen ĝi oni ne komprenus ĉiutagan realon.*”<sup>2</sup> Manko de dialogo kaŭzas malstabilecon de socia kunvivado, aperigas miskomprenojn, konfliktojn ktp. La dialogon ne eblas funkciigi sen antaŭa trovo de komuna (laŭvorte kaj alegorie) lingvo, kiu estus la ĉefa ilo de komunikado kaj ankaŭ nemankebla rimedo de edukado.

Danke al uzado de lingvo homo povas transpaŝi ekster sian individuan sperton, ĉar lingvo ebligas pliriĉigadon de propra realo pere de pli detala rigardo al ceteraj, ĝis nun fremdaj elementoj de realo. Helpe de lingvo eblas ekkonadi aliulajn mondojn kaj tiamaniere paŝo post paŝo konstrui universalan komprenon. Nuntempe en diversaj kulturoj ĉiam pli ofta iĝas kutimo uzi pli da lingvoj krom la lingvo de majoritato.<sup>3</sup>

Kulturana diferencigon de medio nature sekvas plurlingveco de ĝia loĝantaro - kaj temas ne nur pri parolaj lingvoj. En interkultura kaj interetna komunikado tre gravaj estas ankaŭ sociaj ritoj kaj kulturaj modeloj. Al ili aldoniĝas simbolaj, malparolaj signaloj (fizika kontakto, gestoj, mienoj, signifoplenaj rigardoj ktp. - aŭ manko de ili), kaj signaloj anstataŭantaj parolon

---

<sup>1</sup> Informoj en tiu ĉi ĉapitro estas ĉerpitaj el: P.P.Grzybowski: *Interkultura edukado en Eŭropo kaj la ideo de Internacia Lingvo*. [en:] *Almanako Lorenz*. Rio de Janeiro 2000, pp.53-70; P.P.Grzybowski: *Materialoj pri Esperanto-kulturo. Lingvo kaj Movado*. Bydgoszcz 1999; P.P.Grzybowski: *Wspólny język - utopia, czy nadzieja edukacji międzykulturowej?* [en:] T.Lewowicki, J.Urban, A.Szczypka-Rusz (org.): *Język, komunikacja i edukacja w społecznościach wielokulturowych*. Cieszyn - Warszawa 2004, pp.319-332.

<sup>2</sup> P.L.Berger, T.Luckmann: *Spoleczne tworzenie rzeczywistości*. Warszawa 1983, p.72.

<sup>3</sup> W.Burszta: *Antropologia...*, op.cit., pp.62-77.

(silento, ĝemoj, onomatopeoj, rido ktp.). Ĉiuj kreaĵoj de kulturo posedas tiusence informan valoron kaj socian sencon.<sup>1</sup>

Lingvo estas do la rimedo de kreado de idento kaj samtempe dum dialogo la ilo de interŝanĝo de kulturaj valoroj kaj modeloj. En tiu ĉi konteksto ege grava estas elekto de lingvo de edukado, ĉar kun ĝi estas ligita specifa kulturo, kies celojn ĝi respeguladas.<sup>2</sup> Ne gravas, ĉu la lingvo estas natura, ĉu artefarita - grava estas ĝia praktika utileco kaj efikeco kiel ilo de komunikado.

En interlingvistiko oni indikas jenan **tiparon de artefaritaj lingvoj**:

- **lingvoj aprioraj** - vortprovizo estas kreita el vortoj artefaritaj surbaze de iuspeca (ekz. logike-filozofia) klasado de nocioj; plejparte ĝi estas subjektiva (ekz. „filozofiaj” lingvoj en la XIX-a jarcento, *globako, unilingva*);
- **lingvoj aposterioraj** - kreitaj surbaze de jam ekzistantaj, precipe naturaj lingvoj:
  - simpligitaj naciaj lingvoj - ilia vortprovizo estas ĉerpita el naciaj lingvoj, kiel la latina, aŭ la angla; gramatiko baziĝas sur tiu ĉi de natura lingvo, sed estas multe simpligita (ekz. *Basic English, latino sine flexione*);
  - naturalismaj - kiel eble plej proksimigitaj al naturaj lingvoj, ĉefe la romanikaj; ili konservas ortografiajn kaj etimologiajn tradiciojn, sed mankas en ili memstara vortprovizo (ekz. *occidental, interlingua*);

---

<sup>1</sup> D.Picard: *Communication interculturelle et rituels sociaux*. [en:] J.Demorgon, E.M.Lipiansky (org.): *Guide de l'interculturel en formation*. Paris 1999, pp.124-140; A.Triantaphyllou: *Comment communiquer sans connaître la langue de l'autre: analyse des échanges éducatifs européens*. [en:] M.Abdallah-Pretceille, L.Porcher (org.): *Diagonales de la communication interculturelle*. Paris 1999, pp.73-95.

<sup>2</sup> W.Burszta: *Antropologia...*, op.cit., p.62. - Pli vaste: C.Leray: *Langues de culture et langue(s) d'enseignement(s) dans une éducation interculturelle*. [en:] L.Marmoz, M.Derrij (org.): *L'interculturel en questions. L'autre, la culture et l'éducation*. Paris 2001, pp.149-153.

- memstaraj (malfilozofiaj) - memstara vortprovizo, kvankam bazita sur „natura” leksiko; gramatiko tre simpla kaj plej ofte apriora (ekz. *Esperanto*, *ido*, *neo*);
- miksitaj (ekz. *medial*).<sup>1</sup>

Por pli detaligi la aferon en kunteksto de internacia kaj interkultura komunikado, estas utiligataj ankaŭ jenaj nocioj:

- **lingvo internacia** - komuniksistemo kutime funkcia (foje nur periode), pli natura ol artefarita, taŭga por universala uzado, sed plej ofte uzata nur en kulture specifaj kaj etnaj medioj, aŭ sur limigitaj teritorioj; ofte ĝi estas la rimedo de politiko de superado, fare de reganta majoritato;
- **lingvo universala** - virtuala aŭ reale funkcia sistemo de potenciale universala komunikado, pli artefarita ol natura; kutime baziĝanta sur neŭtrala, universalisma, humanisma ideologio; pluraj tiuspecaj projektoj estas utopiaj kaj nur malvaste akceptataj pro ekz. malvasta utileco; la aliaj estas akceptataj pro ekz. pozitiva aksiologio, aŭ praktikeco, kaj danke al tio oni uzadas ilin.

Internacia lingvo potenciale povus iĝi universala, sed pro kulturaj, politike-ideologiaj, historiaj kaj sociaj limigoj, tio ĉi estas tre malfacila. Nur ekde la XVIII-a jarcento oni kompilis ĉirkaŭ 600 tiuspecajn projektojn kun diversaj destino, ideologio kaj uzebleco.<sup>2</sup> La plej konataj aŭtoroj de la projektoj estas: Francis Bacon, Klaudius Galenus, Józef Hoene-Wroński, René Descartes, Ramon Lullo, Thomas Morus, Izaak Newton, Nostradamus, Johann Martin Schleyer, Jean-François Sudre kaj Emanuel Swedenborg.<sup>3</sup>

<sup>1</sup> M.Jurkowski: *Od wieży Babel do języka kosmitów*. Białystok 1986, pp.146-147.

<sup>2</sup> Pli vaste: P.Burney: *Les langues internationales*. Paris 1962, pp.20-23; M.Pei: *One language for the world*. New York 1958.

<sup>3</sup> Pli vaste: L.Couturat, L.Leau: *Histoire de la langue universelle*, Paris 1903; J.Muszyński: *Zarys historii języków międzynarodowych a językoznawstwo*. Łódź 1947; C.Piron: *Communication linguistique - à la recherche d'une dimension mondiale*. Paris 1992; V.Varankin: *Teorio de Esperanto. Helpilo por superaj Esperanto-kursoj*. Saarbrücken 1977, pp.6-7.

Al naturaj internaciaj lingvoj apartenas ekz. la greka, la latina, la franca, la angla kaj kelkaj tribaj lingvoj. La greka, la latina kaj la franca estis internaciaj lingvoj nur periode kaj sur limigitaj teritorioj, kio dependis de kulturaj, sed precipe socipolitikaj cirkonstancoj, ofte devigaj por subbatitaj popoloj. La angla estas tipa nuntempa internacia lingvo de difinitaj medioj (ekz. uzantoj de Interreto). Ĝi tamen neniam iĝos universala, ĉar ĝi estas tro malfacile lernebla (aperas en tro multaj variaĵoj kaj dialektoj; posedas plursencan, malprecizecan vortprovizon; estas malfacile prononcebla ktp.) kaj precipe tro forte ligita kun anglosaksona kulturo, kio igas ĝin malneŭtrala. Post la usonaj invadoj en Irako kaj Afganio, foje ĝi estas perceptata kiel ligita kun agreseca usonigado kaj globaligo, kultura imperialismo ktp.<sup>1</sup>

La plej malmulte diskutvekaj rilate ilian internaciecon estas artefaritaj lingvoj de komputila programado (ekz. *Pascal*, *Fortran*, *Algol*, *Lisp*), relative ofte uzataj en publikaj klerigsistemoj.<sup>2</sup> De iu tempo, precipe en skandinaviaj landoj populara iĝis ankaŭ *interlingua*, utiligata kiel lingvo-ponto aŭ la enkonduka lingvo, helpanta en instruado de la latina, la franca, aŭ la hispana.<sup>3</sup>

La plej grandan popularecon kaj socian akcepton respeguliĝantan en amasa uzado en diversaj kulturoj kaj medioj, atingis la **proponita de Ludwik Lejzer Zamenhof en 1887 jaro, projekto de Esperanto**.<sup>4</sup>

<sup>1</sup> A.Cherpillod: *Espéranto ou Babel: faut choisir*. Courgenard 1995, pp.5-10.

<sup>2</sup> E.Ruiz Velasco Sanchez: *Autour de l'enseignement des langages artificiels et naturels*. [en:] L.Marmoz, M.Derrij (org.): *L'interculturel en questions. L'autre, la culture et l'éducation*. Paris 2001, p.175-191.

<sup>3</sup> B.Perucca: *Langues vivantes. l'Europe se met au diapason*. [en:] *Le Monde de l'Education*. No 5/2003, p.75. - Pli vaste: [www.interlingua.com](http://www.interlingua.com). (25.10.2010)

<sup>4</sup> Pli vaste: M.Boulton: *Zamenhof - Creator of Esperanto*. London 1980; A.Cherpillod: *L.L.Zamenhof - datoj, faktoj, lokoj*. Courgenard 1997; T.Wiśniewski: *Ludwik Zamenhof*. Białystok 1987; M.Ziółkowska: *Doktor Esperanto*. Warszawa 1959.



Esperanto estas lingvo natura (viva kaj disvolviĝanta), aŭtonomia, aposteriora, analitika (preskaŭ nula fleksio, gramatikaj formoj kreataj danke al aldonado de novaj elementoj, ĉefe prepozicioj) kaj aglutina (kun radiko oni kunmetas afiksojn, prefiksojn kaj fleksiajn formojn). Forgesinte ĝian originon, oni povus diri, ke ĝi apartenas al familio de latinidaj lingvoj (tipo franca aŭ itala, venanta de popola latina lingvo), kvankam enhavas prunteprenitajn formojn ĝermanajn (germanajn, anglajn) kaj slavajn - ĉefe rusajn kaj polajn. Statistike en Esperanto-vortaro troviĝas ĉirkaŭ 60% de latinidaj radikoj, 30% ĝermanaj kaj 10% slavaj. Esperantologiaj esploroj pravas, ke el la proponitaj de L.L.Zamenhof en la „Fundamento de Esperanto” 2629 bazaj vortoj, fremdaj al franco estas nur 13% (343 vortoj), al anglo 30% (780), al germano 32% (842) kaj al ruso 60% (1512). La lasta konkludo pli malpli rilatas ankaŭ poŝojn kaj aliajn slavojn.<sup>1</sup> Pluraj novaj vortoj poste adaptitaj kaj akceptitaj de la Akademio de Esperanto, ŝanĝis tiun rilaton profite al pli granda internacieco de la Esperanto-vortaro, kio signifas, ke la lingvo evoluas laŭ moderna maniero, konforma al celoj de ĝia kreinto. Nuntempa Esperanto estas lingvo simpla por lerni kaj praktike ĝin uzi skribe kaj parole. Ĝi estas tia danke al universala vortaro, simplaj, logikaj reguloj de gramatiko kaj vortfarado. Tamen la plej grava en priskribo de ĝia karaktero estas la devizo: **Esperanto estas ne nur lingvo, sed ankaŭ ideo** - ideo kongrua kun tiuj ĉi de interkultura edukado.

Franca lingvisto Antoine Meillet - fakulo pri hindeŭropaj lingvoj opinias, ke Esperanto estas genia sintezo de grandaj lingvoj de eŭropaj kulturoj. Krom pluraj verkistoj (ekz. Lew Tolstoj, Jules Verne, Rabindranath Tagore, Umberto Eco), same pozitive parolis pri tiu ĉi lingvo i.a. Max Müller - germana filologo kaj orientalista, ĉu usona lingvisto Edward Sapir. Opinioj de tiuj ĉi lastaj fakuloj neas la stereotipan tezon popularan inter kontraŭuloj de Esperanto, ke ĝi ne estas akceptata

<sup>1</sup> L.L.Zamenhof: *Fundamento de Esperanto*. Marmande 1963.

de sciencistoj. Krome, ne eblas neglekti la lingvon, kiu por pluraj miksetnaj familioj iĝis natura lingvo de ĉiutaga komunikado.

### 3.2. Esperanto-movado kaj Esperanto-kulturo

En historio de Esperanto-kulturo senpere ligita kun ties socia movado de esperantistoj, oni povas indiki jenajn periodojn:

**I-a (1887-1905)** - ekde la kreo de la lingvo ĝis la Unua Kongreso: evoluo de la lingvo en precipe skriba formo, ĉefe en Rusio kaj Pollando.

**II-a (1905-1914)** - ekde la Unua Kongreso ĝis la unua mondmilito: evoluo de la parola formo kaj kreado de la literaturo.

**III-a (1914-1919)** - stagnado pro la milita kaoso.

**IV-a (1920-1939)** - vasta disvolviĝo de la Esperanto-movado kaj interlingvistiko en la spirito de pacifismo kaj neŭtraleco; disvolviĝo de la scienc-teknika Esperanto-terminaro.

**V-a (1939-1945)** - stagnado pro la milita kaoso.

**VI-a (de 1945 ĝis nun)** - multflanka evoluo de la Esperanto-movado en la tuta mondo, perfektigado de la lingvo, simpligado de skribo, pliriĉigado de vortaro.<sup>1</sup>

En la unua Esperanto-libro<sup>2</sup> L.L.Zamenhof aperigis kuponetojn kun teksto de promeso, ke la leganto eklernos Esperanton, se dek aliaj milionoj promesos la samon. Tamen pli multaj interesiĝintoj ne faris la promeson, sed tuj eklernis kaj ekuzis la lingvon. Sekve de tio L.L.Zamenhof ricevadis amason da leteroj kun multaj aproboj kaj amikaj kritikoj, proponoj aŭ konsiloj por plibonigo de la lingvo. Kompreneble estis tre

<sup>1</sup> Kompilitaj en tiu ĉi ĉapitro informoj pri historio kaj socia movado de Esperanto, estas ĉerpitaj el: R.Centassi, H.Masson: *L'homme qui a défié Babel: Ludwik Lejzer Zamenhof*. Paris 1995; L.Kökény, V.Bleier (org.): *Enciklopedio de Esperanto*. Budapeŝto 1986; E.Privat: *Historio de la lingvo Esperanto 1887-1927*. Den Haag 1982; J.Żytyński: *Esperanto i esperantysty*. Warszawa 1987.

<sup>2</sup> Dr.Esperanto: *Język międzynarodowy. Przedmowa i podręcznik kompletny*. Warszawa 1887.

malfacile rekonu ĉiujn el ili, precipe ke ili ofte kontraŭstaris unu la alian. En sekvaj verkoj L.L.Zamenhof deklaris, ke li ne volas esti agnoskata kiel la kreinto de la lingvo, sed kiel ĝia iniciatoro, kaj la afero de ĝia evoluiga plibonigo kuŝas jam en en la manoj de ĉiuj uzantoj, kiujn povus reprezenti ekzemple iuspeca senpartia lingva akademio. Tiucele devus aperi pli firmaj strukturoj, organizaĵoj, kies membroj povus libere interŝanĝi ideojn kaj antaŭenpuŝi la aferon.

En la jaro 1888, en Nurenbergo (Nürnberg) naskiĝis la unua esperantista grupo, gvidata de Christian Schmidt. Ĝi estis iama klubo de volapukistoj,<sup>1</sup> kies la plej fervora membro Leopold Einstein ricevis ambaŭ librojn de L.L.Zamenhof kaj tuj konvinkiĝis pri la supereco de Esperanto super volapuko, instigante al la studado siajn gekolegojn.

Unu jaron poste aperis monata gazeto „Esperantisto”, kiu ĉe fino de la unua jaro de sia ekzistado havis 113 abonantojn kaj rapide iĝis efika ligilo inter diverslandaj esperantistoj. Ĝiaj plej multaj abonantoj estis el Rusio, teritorio de Pollando (i.a. Antoni Grabowski) kaj Francio (i.a. Louis de Beaufront). Tiun tempon markis multaj financaj malfacilaĵoj de la Esperanto-movado, kiujn helpis solvadi la helpo de L.L.Zamenhof kaj aliaj, ne ĉiam riĉaj esperantistoj. Naskiĝis novaj grupoj en Germanio, Svedio, Hispanio kaj en multaj rusaj urboj. L.L.Zamenhof publikigis en „Esperantisto” gramatikon kaj vortaron de „nova” lingvo, konstruita laŭ proponitaj ŝanĝoj. Post dufoja voĉdonado de abonantoj oni decidis tamen lasi senŝanĝe la malnovan formon de la lingvo. Oni decidis, ke Esperanto estos kulturata danke al verkado, kaj ĝia parola kaj skriba uzado.

En 1895 okazis la unua politika skandalo ligita kun Esperanto. Kaŭzis ĝin aperigo en „Esperantisto” de artikolo de la rusa verkisto Lew Tolstoj, kiu mem fariĝis fervora apoganto de la internacia lingvo. La teksto ne plaĉis al imperiestraj cenzuristoj kaj ili malpermesis daŭran eldonadon de la revuo.

---

<sup>1</sup> *Volapuko* - *volapük*, la internacia lingvo kreita de Johann Martin Schleyer.

